

# ALMANAKO LORENZ

2020

“Amu unuj aliajn, kaj vi estos feliĉaj. Prenu precipe kiel taskon ami tiujn, kiuj inspiras al vi indiferecon, malamon kaj malŝaton. La Kristo, kiun vi devas fari via modelo, donis al vi ekzemplon de tiu sindonemo; misiisto de amo, li amis en tia grado, ke li fordonis sian sangon kaj sian vivon.”

Fénelon

**AMIKEMO NE  
ESTAS NEŬTRALA**  
Probal Dasgupta

**MORTPUNO: ĈU SOLVO AŬ  
VIOLENTA-ETERNIGO?**  
Fernando Burkert Pelachini Valle

**INTERVJUO KUN  
RENATO CORSETTI**

ALMANAKO  
LORENZ

2020

# ALMANAKO LORENZ

2020

**KVARDEK NUMERO  
JARO 2020**

**ELDONIS SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ  
RIO-DE-JANEIRO (RJ) - BRAZILIO**

# ALMANAKO LORENZ

LEGANTOJ EN LA TUTA MONDO

La jarkotizo estas €20,00  
aŭ egalvaloro pagebla per UEA  
aŭ literaturaj verkoj en Esperanto.  
Konto ĉe UEA: kodo **sesl-s**

## CATALOGAÇÃO NA FONTE DO DEPARTAMENTO NACIONAL DO LIVRO

J40 **ALMANAKO LORENZ 2015** – n-ro 40 – Rio-de-Janeiro : Spiritisma

Eldona Asocio F. V. Lorenz, 2020.

185 p.; 24cm ; il.

Esperantaj tekstoj.

ISBN 978-85-86984-20-4

1. Esperanto – Spiritismo. I. Titolo. II. Serio.

CDD: 133.9

### **SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ**

Rio-de-Janeiro (RJ) - Brazilo

Tel. +55-21 98485-4539 (Whatsapp) / +55-21 2450-4768

editora\_lorenz@uol.com.br



## **ALMANAKO LORENZ**

Jara eldonajo de Spiritisma Eldona Asocio F. V. Lorenz

### **Estraro:**

Prezidanto: Robinson Mattos  
Vic-Prezidanto: Geralcino Viana Gomes  
Direktoro Financisto: Mauro Libânio da Fonseca  
Direktoro Adjunkto: João Silva dos Santos  
Direktoro Adjunkto: Celso Pinheiro


### **Komitato:**

Prezidanto: Affonso Borges Gallego Soares  
Membroj: Alberto Flores  
Amaury de Souza  
Antônio de Souza Barbosa  
Balbina Ferreira  
Cesar Soares dos Reis  
Elmir dos Santos Lima  
Ismael de Miranda e Silva  
Joel Maciel Soares  
José Roberto Motta da Silva  
Vicente Paula Werneck  
Tânia Maria Fernandes Paixão  
João Nunes Lins  
Álvaro Borges de Almeida Motta  
Rogério Mota  
Julieta Dulce do Vale Ramos de Souza  
Anstataŭantoj: Terezinha Petronília Leão dos Santos  
Lucila Soares do Vale

### **Kontrolo konsilantaro:**

Membroj: Danilo Carvalho Villela  
Eloy Carvalho Villela  
Romualdo de Castro Celani  
Anstataŭantoj: Aylton de Lima Rocha  
Suely Alves Lopes  
Kompostita de Rogério Mota  
Reviziistoj: Jader Rodrigues da Silva, Célio Freitas Martins

Presita en Rio-de-Janeiro, Brazilo



“Vi aŭdis, ke estas dirite: Okulon pro okulo, kaj denton pro dento; sed mi diras al vi: Ne rezistu al malbono; sed al tiu, kiu frapas vian dekstran vangon, turnu ankaŭ la alian. Kaj se iu deziras procesi kontraŭ vi, por forpreni vian tunikon, lasu lin preni ankaŭ vian mantelon. Kaj se iu devigas vin iri unu mejlon, iru kun li du. Donu al tiu kiu petas de vi; kaj ne deturnu vin de tiu, kiu deziras prunti de vi”.

**JESUO** (Mateo, 5: 38-42)

“Se la amo al la proksimulo estas la principo de karitato, ami siajn malamikojn estas la plej sublima apliko de tiu principo, ĉar la posedo de tiu virto estas unu el la plej grandaj venkoj kontraŭ egosimo kaj fiero”.

**ALLAN KARDEC**

“Vivu Esperanto, sed antaŭ ĉio vivu la celo kaj la interna ideo de la esperantismo, vivu la frateco de la popoloj, vivu ĉio, kio rompas la murojn inter la gentoj, vivu, kresku kaj floru la verda standardo”.

**L. L. ZAMENHOF**

“Lerni Esperanton, ĝin instrui, praktiki kaj disvastigi estas ja kontribui por konstruado de ia unuiĝinta mondo”.

**FRANCISCO VALDOMIRO LORENZ**

# INDEKSO

<b>PREZENTO</b> .....	11
<i>Fernando Burkert Pelachini Valle</i>	
<b>MORTPUNO: ĈU SOLVO AŬ VIOLENTO-ETERNIGO?</b> .....	15
<i>Irmão X, Spirito</i>	
<b>PRI MORTPUNO</b> .....	19
<i>Probal Dasgupta</i>	
<b>AMIKEMO NE ESTAS NEŬTRALA</b> .....	23
<i>Benedicto Silva</i>	
<b>ĈU MEDIUMO FRANCISCO CÂNDIDO XAVIER ESTIS ESPERANTISTO?</b> ....	27
<i>Vladimir I. Ionesov</i>	
<b>“LA ANIMO DE ARMENIO”:</b> HISTORIO DE UNU FORGESITA GOBELINO .....	33
<i>Allan Kardec</i>	
<b>ENFOKUSIGO LAŬ SPIRITISMO</b> .....	47
<i>Renato Corsetti</i>	
<b>NI, ZAMENHOF, UNUIĜINTAJ NACIOJ,</b> <b>NAIAJ KOMUNAJ AMIKOJ KAJ MALAMIKOJ</b> .....	51
<i>Anatolij Ionesov</i>	
<b>LA ARKITEKTURAJ TRADICIOJ DE UZBEKIO</b> <b>TRA LA OKULOJ DE JAPANA FOTISTO</b> .....	59
<i>Néio Lúcio, Spirito</i>	
<b>KLARIGOJ DE LA MAJSTRO</b> .....	65
<i>Ulrich Lins</i>	
<b>LA NAZIOJ KAJ ESPERANTO</b> .....	67
<b>INTERVJUO KUN RENATO CORSETTI</b> .....	73
<i>Allan Kardec</i>	
<b>FELIĈAJ TIUJ, KIUJ ESTAS MILDAJ KAJ PACAMAJ</b> .....	85
<i>Przemysław Paweł Grzybowski</i>	
<b>FAMAJ PEDAGOGOJ EN LA VIVO DE HIPPOLYTE LÉON DENIZARD RIVAIL</b> ...	91

<i>Trevor Steele</i>	<b>KAVERNHOMOJ ALTE KULTURITAJ</b> .....	99
<i>Eurípedes Alves Barbosa</i>	<b>ESPERANTO EN LA TRANSTOMBA MONDO</b> .....	103
<i>José Roberto Tenório</i>	<b>KRUCENIGMO</b> .....	109
<i>Emmanuel, Spirito</i>	<b>MORTPUNO</b> .....	113
<i>Sun Mingjiao</i> <i>Sasaki Teruhiro</i>	<b>PRI MOZI, LA FILOZOFO DE ANTIKVA ĈINIO</b> .....	115
<i>Georgi Mihalkov</i>	<b>PONTO POR INTERŜANĜO DE KULTURAJ VALOROJ</b> .....	123
<i>Antoni Grabowski</i>	<b>SONAS SONORILOJ</b> .....	129
<i>Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia</i>	<b>ESPERANTISTOJ AGANTE TUTMONDE EN ROTARY INTERNATIONAL</b> ....	131
<i>José Passini</i>	<b>LINGVAJ RAJTOJ</b> .....	135
<i>Szilard Koczkas</i>	<b>PRI LA SURAT SHABD JOGO</b> .....	147
<i>Bob Phelp</i>	<b>LA VIVO EN LA SPIRITA MONDO</b> .....	153
<i>Paul Desailly</i>	<b>LA INTERNA IDEO &amp; LINGVA JUSTECO (P. UNU)</b> <b>PREZIDENTOJ TRUMP KAJ ĜI NEGOCAS</b> <b>PRI LA KORPORACIA ANGLA LINGVO (P. DU)</b> .....	159
<i>Araceli Aguilar</i>	<b>SERĈE DE SUPERA HEROO!</b> .....	163
<i>José Luis Montes de Oca</i>	<b>TUTAMERIKAJ LANDOJ</b> .....	175
<i>Antônio Francisco, Spirito</i>	<b>STELETO</b> .....	181



## PREZENTO

Sur la spuroj de Brazila Spiritisma Federacio, *Almanako Lorenz*, krom festi sian kvardekjariĝon, ankaŭ kampanjas favore al la Vivo.

Tiucele, ni jam pritraktis tri gravajn temojn en la lastaj respektivaj eldonoj, kiel memmortigon, abort(ig)on kaj eŭtanazon.

Ĉi-jare ni proponas, kiel ĉefan temon, violenton, kun emfazo al mortpuno, malgraŭ tio, ke estos pritraktataj ankaŭ aliaj subtemoj kiel milito, hommortigo, venĝo, ofendo, malamo kaj eĉ duelo.

Memkompreneble, mankas spaco, por ke ni prikomentu kelkajn gravajn facetojn de violento. Imagu, vi, geleganto, ke en Brazilo, averaĝe mortas ĉirkaŭ 37.000 homoj ĉiujare pro aŭtotrafikaj akcidentoj. Ĉu tiu sciigo ŝokas vin? Kalkulu alimaniere: ĉiun kvaronhoron, forpasas homo en Brazilo, pro la violento de ĝia aŭtotrafiko. Ĉu silenta, ŝoka aŭ pretervidata milito?

Kaj kion diri pri la nombro de tiuj neforpasintaj, sed envolvitaj samakcidente? Jes, gekaraj, temas pri pli ol 200.000 vunditoj ĉiujare. Kaj multaj el tiuj iĝas dumvivaj invalidoj...

Kaj pro la violento de la aŭtotrafiko en Brazilo, la ŝtato elspezas miliardojn da realoj, okupas milojn da hospitallitoj, kaj oni devias nekalkuleblajn homajn atenton, forton, tempon kaj monon de la ordinara vivofluo.

Tamen, kaj danke al la malavaro kaj sindediĉo de multaj samideanoj, kontribuantoj de *Almanako Lorenz*, vi povos legi pri diversaj aliaj ege interesaj temoj, venintaj el pluraj mondopartoj.

La bunteco de la artikoloj igos vin eĉ revii pri vojaĝo al Uzbekio, Armenio, Ĉinio, Aŭstralio, Hindio k.a. Tamen, se vi ne povos vojaĝi ĉi-jare, certe eblos gustumi riĉajn informojn kaj pliinformiĝi pri iliaj temoj en Interreto aŭ rekte kontaktante ties aŭtorojn.

Tial, kiel ne tuj pensi pri tio, ke Esperanto vere plivastigas niajn horizontojn, malplilongigas la interhomajn distancojn kaj pliriĉigas niajn kulturojn kaj vivojn, kaj tion ĝi ebligas per maniero tute simpla kaj facilakirebla!

Vivu *Almanako Lorenz* kvardekjara!

Vivu Esperanto cent-tridek-du-jara!!!

Bonan legadon kaj multkolorajn revojn!!!

La Estraro.



**Deziru feliĉon al la alia tiom,  
kiom vi deziras vian propran feliĉon.**





## MORTPUNO: ĈU SOLVO AŬ VIOLENTO-ETERNIGO?

Fernando Burkert Pelachini Valle<sup>1</sup> – *Brazilo*



Ju pli proksime de siaj primitivaj sentoj, des pli violenta montriĝas homo. En la unuaj tempoj de la homa raso, ĝi konis nur la sovaĝan forton kiel rimedon por la solvo de siaj problemoj. Temis pri la leĝo de la plej forta. Kun la pasado de la miljaroj, ĝiaj instinktoj estis anstataŭitaj de la sensaĵoj kaj, finfine, ĉi-lastaj cedis lokon al la sentoj<sup>2</sup>. Sed tamen, ĉiuj individuoj konsistigantaj la homaron, ankoraŭ hodiaŭ, en pli aŭ malpli alta grado, prezentas tiujn ĉi tri elementojn: instinktojn, sensaĵojn kaj sentojn.

En la homo, do, la violento estas rekte ligita al la grado de disvolviĝo de ties sentoj. Koncerne la prilaboradon de la leĝaro reganta la socion, specife la kriminalajn leĝojn, la tendenco estas sama. Tio estas, ju pli disvolviĝinta estas la socio, des pli humanigita estos ĝiaj punkodoj, malproksimiĝantaj de la primitivaj tempoj, regataj ekskluzive de la leĝo de la forto.

Simile, alprenado de mortpuno elvidigas la primitivecon de la sentoj de iu socio. Do, ĉu ekzistus neniu ŝajna sento en socio elektinta mortpunon? Fakte, jes. Tamen, en tiu okazo kaj plejmulte, temas, envere, pri venĝosento, en kiu puno malproksimiĝas de ties reedukiva karaktero. Restas nur ĝia trajto puna.

Aliflanke, oni argumentas tion, ke estus juste forpreni la vivon de iu krimulo kondamnita, ekzemple, pro mortigo aŭ seksoperforto. Sed tamen, ĉu mortigo,

---

<sup>1</sup> Advokato, diplomita pri jurscienco ĉe Universitato Bandeirante de San-Paŭlo (UNIBAN); studento de filologio kun specialiĝo en la angla lingvo, ĉe Federacia Universitato de São João del-Rei (UFSJ). Laboras ĉe iu brazila prizono, utiliganta alternativan metodologion en la aplikado de la koncernaj punoj al la kondamnitaj.

<sup>2</sup> *La evangelio laŭ spiritismo*, Allan Karkec, ĉapitro XI, paragrafo 8.

kvankam laŭleĝe farita de la ŝtato kaj ne de iu individuo el la socio, ne plu estas mortigo? Plie, ĉu la ŝtato povas rajtigi sin je la falĉado de la vivo de socioj? Verŝajne, ĉu ne estas kontraŭsenco, permesi al la ŝtato, kiu estas la legitima reprezentanto de la socio, falĉi la vivon de iu el ĝiaj anoj, eĉ sub laŭparlamenta rajtigo?

Multaj aliaj demandas, ĉu mortigintoj ne meritas egalan sorton al tiu de ties viktimoj, tio estas, kial ne mortigi iun mortiginton? Tamen, tio ne similas multe pli al venĝo sankciita de la ŝtato ol al iu puno? En sia funkcio kiel politika povo, la Ŝtato ne povas agi pasie, kun la risko damaĝi ĝian celon. Estas premiso de ĉiu demokratia kaj homrajta ŝtato la ekzercado de la ŝtata povo kaj aplikado de la leĝoj liberigita de ĉiaj pasi-malbonaĵoj kaj ekscititaj sentoj.

Krome, sub la homa kaj laŭleĝa vidpunkto, estas tolereble, ke iu, pretekstante memdefendon kaj instigita de indignosento aŭ kolerego, forprenu la vivon de alia individuo, kiu tiam faras krimon. Ekzemple: imagu ni, ke ordinara viro, nomata Jozefo, alveninte sian hejmon post la laboro, kaptu krimulon seksperfortante lian edzinon aŭ filinon. Aŭ ĵus forpreninte la vivon de iu el ili. En tiuj situacioj, la leĝo protektos Jozefon, en la okazo, ĉu li forprenos la vivon de la krimulo, agente sub necesa sindefendo kaj instigita de la pasio de la momento. La Ŝtato, tamen, ne povas agi simile, tial, ke tio povus difekti la samdistancon inter la faktoj kaj la izonomion<sup>3</sup>, postulatajn de la aplikanto de la leĝo.

Se la preteksto de la menciita ekzemplo ekzistas, laŭ la socia vidpunkto, alidire, laŭ la materia vidpunkto, tio ne signifas, ke, koncerne la spiritan pririgardon, Jozefo ne estos respondecigata, en la okazo, ĉu li ne agis per eksceso, anstataŭ teni la vivon de la krimulo<sup>4</sup>.

Plianalizante la materian vidpunkton, oni devas konsideri lastan argumenton kontraŭ la aplikado de la violento rilate al mortpuno: la juĝan eraron. Eĉ en la plej disvolviĝintaj juĝaj sistemoj de la mondo, ne maloftas la eraroj en la konkludoj

<sup>3</sup> Egaleco de la civitanoj antaŭ la leĝaro.

<sup>4</sup> Ĉu Dio pardonas hommortigon pro memdefendo? "Nur bezono povas ĝin pravigi; sed, se oni povas gardi sian propran vivon, nepereigante tiun de sia atakanto, oni devas tion fari" (*La libro de la spiritoj*, Allan Kardec, demando 748-a).

de la kriminalaj procesoj. Ne temas pri aserto koncernanta pasintajn jarcentojn, kiam la ununura pruvo estis la konfeso, akirita pere de turmentoj, devigantaj onin rekoni la plej abomenajn krimojn, eĉ estante la akuzito senkulpa<sup>5</sup>. Temas, fakte, pri grava problemo, ofte okazinta en la pasinta jarcento kaj eĉ en la nuna, ene de diversaj kriminal-procesaj sistemoj el multaj landoj.

Konsiderinte tion, kion oni faru en la okazoj, en kiuj, post la aplikado de la mortpuno, oni malkovras la senkulpecon de la kondamnito? Kiel redoni la vivon al tiu ĝin perdinta pro juĝa eraro? Diverslande registriĝas la senkulpeco de kondamnitoj<sup>6</sup>, kio elvidigas la grandan probleblecon, ke juĝaj eraroj povas konduki senkulpulojn al la mortpuno.

Se en landoj konsiderataj disvolviĝintaj ofte okazas juĝaj eraroj, kion pensi pri la situacio en landoj, kies Ŝtatoj estas ankoraŭ duonstabilaj? Nur tiu ĉi fakto sufiĉus, por ke oni neniam pripensu pri alprenado de mortpuno, nebezonante kalkuli je ĉia ajn argumento el transcenda sfero.

Sed tamen, oni devas pritrakti ĉi-temon sub pli larĝa studkampo, tiel same atentante la spiritan vidpunkton. Tiel, mortpuno prezentiĝas ne nur malhumana kaj kruela, sed ankaŭ senefika.

Antaŭsupozante, ke neniu mortas, tio estas, neniu malekzistas pro la morto de sia fizika korpo, ne estas kialo por la aplikado de mortpuno. Do, se la vivosignifo kuŝas ĝuste en la evoluado de la homo pere de ties diversaj spertoj en la karno, kiu estas la funkcio aŭ utileco de tio, senigi de krimulo liajn pentokaj transformiĝo-oportunojn? Se estas per la reenkarniĝo, ke oni evoluas, ne estas logike malpermesi al krimulo provi reformi ĉi tie mem la neperfektaĵojn de sia karaktero kaj kiuj igis lin krimi<sup>7</sup>.

Samsence, estante la spirito senmorta kaj bezonanta elpuriĝi pere de pluraj ekzistadoj en la karno, estas nenia profito en la vivosenigo de iu sociano. Ĝuste en la socio, ke la krimulo trovos la oportunojn penti kaj transformi sin kaj, cetere,

---

<sup>5</sup> *Vigli kaj puni*, Michel Foucault, dua ĉapitro.

<sup>6</sup> Vidu la kazojn de Troy Daves, George Stinney kaj *La kvin el Central Park*, ĉi-lastan ĵus filmitan de Netflix, laŭ miniserio.

<sup>7</sup> Demando 166-a de *La libro de la spiritoj*, Allan Kardec.

klopodi ripari la faritan eraron. Antaŭtempe sendi krimulon revene al la spirita mondo estas prokrasti la solvon de la koncerna problemo. Temas pri paliativa rimedo, pli simila al venĝo ol aplikado de la justico, kiel supre dirite.

Pro tio, estas necese apartigi la krimon de la krimulo. Ĉi-lasta daŭre estas homo, malgraŭ tio, ke liaj pasintaj kondutoj estis krimaj. Konsidere al tio kaj pritraktante la temon, laŭ la brazila realo, oni povas aserti tion, ke la homa revirtiĝo, ne nur eblas, sed jam okazas de kelkaj jardekoj. Elstaras esperigaj rezultoj atingitaj tiam, kiam oni utiligas humanecan metodologion en la aplikado de la puno.

Temas pri apakeana<sup>8</sup> metodologio, en kiu prizonuloj estas stimolataj disvolvi siajn aŭtonomecojn kiel civitanoj, per la reedukiĝo. Ĝia celo estas 'mortigi la krimulon' ekzistantan en ĉiu enkarcerigito, liberigante la homon, por ke tiu ĉi ekhavu plenan vivon, redirektitan al la praktikado de bonaj agoj.

La nombroj koncernantaj la homan revirtiĝon prezentitaj ekde la aplikado de tiu metodologio estas kuraĝigaj. Se, laŭ la ordinara prizonsistemo, la indico de recidivo estas ĉirkaŭ 80%, ĉe la prizonoj, utiligantaj la menciitan alternativan metodologion, tiu indico ne atingas 10%. Tio estas, el ĉiuj kondamnitaj, elirintoj el la brazila ordinara prizonsistemo, nur 20% ne faros novajn deliktojn. Dume, ĉe prizonoj adoptintaj tiun humanecan metodologion, pli ol 90% de la eksaj enkarcerigitoj ne plu faras krimon. Tio, jes, estas ia revolucia *mortpuno* altrudinda al homo krima. Oni mortigas nur la *internan krimulon* kaj dum kvitiĝas kaj renaskiĝas ia nova homo. Tiel, plenumiĝas la celo ne nur puniva, sed ankaŭ reedukiva de la kondamna verdikto.

Rilate al la materia pririgardo de ĉi-temo, laste kaj plej surprize estas tio, ke la kosto de iu enkarcerigito en la alternativa prizonsistemo estas trione malpli kosta ol de la ordinara sistemo. Se paroli pri ĝiaj materiaj kaj logikaj flankoj, tio pravigas la alprenon de tiu metodologio, pro tio, ke ĝi havas grandan efikecon kaj samtempe estas multe pli malpli kosta. Kuniĝas, do, la celoj spirita (reedukiva) kaj materia (malpli kosta al la socio) de la aplikado de la puno.

---

<sup>8</sup> Asocioj de protektado kaj asistado al la kondamnitaj (APAK-oj) estas neregistaraj organizaĵoj (NRO-oj), kiuj utiligas alternativan sistemon en la plenumado de la puno. Por pli da informoj: [https://www.youtube.com/watch?v=Hv6uEC\\_6RrA&t=633s](https://www.youtube.com/watch?v=Hv6uEC_6RrA&t=633s) (anglalingve).

## PRI MORTPUNO

Irmão X, Brazilo



Vi scivolas pri tio, kiel la elkarniĝintaj spiritoj taksas la leĝigon de puno de morto, kaj kromaldonas: — ĉu ne estas juste senigi la fizikan korpon de la spirito, kiu iĝis krima? — ĉu licas la kunvivado inter normalaj homoj kaj perversulo?

El la spirita mondo, ni povus aldoni: — kiu el ni konvene uzis la fizikan korpon? — Kiu el ni atingis la spiritan maturiĝon de la efektiva humaneco, por sin konsideri plenekvilibra?

Ĉe la plej multaj okazoj, la ekzekucio de iu verdikto pri morto konsistas en tio, frua liberigo de la animo, kiu sin ĵetis en la profundegaĵon de la ombro. Kaj ni scias, ke nur la puno de vivo en la karno eblas realigi la revertiĝon de tiuj, kiuj iĝis memkonfesintaj krimuloj antaŭ la homaj tribunaloj.

Ne kuracinte la vundon, tempon oni perdas forpelante muŝojn.

Oni ne ŝanĝas la spiriton pereigante la karnon.

Kiam murdito ne havas sufiĉe da forto por senkulpiĝi la ofendon kaj ĝin forgesi, plej ofte li sentas sin forte altirata de tiu, kiu al li senigis la vivon, kreante la fenomenojn ordinarajn de obsedo. Kaj la viktimoj de pendumado aŭ de pafado, hakado aŭ morto per elektra seĝo, se ne senprokraste starigas en la transtombo gradojn de heroeco kaj abnegacio, ili vampirados la socian organismon, kiu trudis al ili la disiĝon de la fizika korpo, transformiĝantaj en potencajn kistojn, fermentantajn la malpacon kaj ribelon.

La surtera tribunalo neniam decidis kun sekureco pri la elpago de la krimo, sen la konstanta helpo de hospitaloj kaj lernejoj.

Juĝistoj kun pura konscienco kaj senhelpe de edukistoj kaj kuracistoj ĉiam vivos turmentitaj de la devo arestigi kaj kondamni, direktante sin de sur la digneco de la talaro por ŝultre-al-ŝultre esti kun tiuj, kiuj dediĉas sin al ies turmentado.

La funkcio de la kriminala justico, enkadre de iu civilizacio konsiderata kristana, estas, super ĉio, tiu de reedukado.

Manke de frata interkompreno sur la bazo de la interrilatoj, ni ne distanciĝos de la labirinto de revenĝo, kies celo estas konverti la mondon en eternan englutejon de renaskiĝintaj malbonaĵoj.

Jesuo-Kristo, la dia liberiganto, venis rompi la ĉenojn, kiuj alligis nin al la principoj preskribantaj punojn egalajn al ties kulpoj.

Edukado estas instigilo de procezo, kiu savas menson kristaliĝintan en la malklereco.

Organizi malliberejon revirtigi-povan, kie laboro kaj libroj trovos adekvatan utilecon, estas la solvo por la malfacila problemo de la krimeco interhoma, eĉ tial, ke la plej bona klopodo de la socio kontraŭ la deliktinto kuŝas sur tio, lasi tiun ĉi vivi riparante siajn proprajn erarojn.

Ĉiu spirito vivas en la ĉielo aŭ en la infero, kiun li kreis por si mem...

Ĉi tie, ni havas la *kampon de la efikoj*, kaj tie, sur la mondo, la *kampon de la kaŭzoj*. Kaj dum la animo restadas sur la *kampo de la kaŭzoj*, ĉiam estos oportunoj por riparo kaj reĝustigo, pligonigante la konsekvencojn.

La morto ne havigas al oni facilecon por repaciĝo. Lernantaj per la severaj lecionoj de la edukejo el la densa materio, oni rafinas siajn moralajn kvalitojn por la ascendo de la spirito.

Neniu, do, bezonas malkvietiĝi, provokante tiun aŭ tiun alian repostulon per violento.

La leĝo de la universala harmonio funkcias en ĉiuj planoj de la vivo, prenante sur sin la taskon ĉion restaŭri en la oportuna momento.

Koncerne la agon *kondamni*, kiu el ni pretiĝas por plenumi tian povon?

Kiom el ni ne estas nediskuteblaj malbonfarintoj, simple ĉar ni ne trovis la *predon*, je la preciza momento de la tento? Kiom da deliktoj ni jam faris perperse?

Nur la edukado, fundamentita en la amo, savos nin de la plurjarmila nokto el la nescio.



Se vi elmontras fortan interesîgon pri la revirtigo de la moroj, defendante per tiom da entuziasmo la laŭŝajnan leĝecon de la puno de morto, prifosu vian propran koron kaj konsciencon kaj kontrolu, ĉu ili estas senmakulaj. Se vi jam superis la embarasojn de la primitiveco de la sentoj, haviginte al si larĝskalan komprenon je kosto de ada sinofero, mi ŝatus scii, ĉu vi vere havos kuraĝon por abomeni la pekintojn de la mondo, ĵetante sur ilin *la unuan ŝtonon*.

El la libro *Leteroj kaj kronikoj*, diktita de la Spirito 'Irmão X' kaj psikografiita de la mediumo Francisco Cândido Xavier. Eldono de Brazila Spiritisma Federacio. Esperantigo far Jâder Rodrigues da Silva.





**Rebonigu viajn mizeraĵojn,  
antaŭ ol korekti la aliulajn.**



## AMIKEMO NE ESTAS NEŬTRALA

Probal Dasgupta – Hindio



Amikemo estas la vere fortika fundamento de nia movado. Ne ĉiuj esperantistoj celas pacon; multaj estas persone militismemaj. Sed enveni en la esperantistan komunumon senescepte signifas iagrade akcepti la fakton, ke la homoj en Esperantujo estas emfaze amikemaj. Sed la amikemo ne estas 'neŭtrala' (sendepende de tio, ĉu por vi neŭtraleco estas virto). Mi hodiaŭ volas neneŭtrale aludi al la budhismo – ĉe mi tio ne riskas ĉani akuzojn pri ŝovinismo, ĉar mi estas hinduo, ne budhano.

Budho predikis interalie la kultivadon de *metta* – vorto por amika kvalito en la palia lingvo, la sankta lingvo de budhismo. Iu vivlonga budhana amiko mia el Britujo apartenanta al la filozofa metio, Vipassi, foje demandis sin ĉu ni prave tradukas *metta* en niajn lingvojn per 'amikeco'. Vipassi argumentis ke budhanoj devontigas sin ne esti **amiko de** ĉiuj homoj – tio estas malebla, ĉar amikon vi devas bone koni – sed esti **amika al** ĉiuj homoj, kaj ke do *metta* tradukiĝu kiel 'amikemo'.

Vipassi, kun mi kaj kun nia barata amiko Prabodh, lanĉis en 1986 kulturejton de internacia amikeco. Tiu 'konvivio' – simpozio okazinta sesfoje, ĉiun duan aŭ trian jaron, alterne en Barato kaj Britujo – estis intensa kunesto de iuj vivlongaj geamikoj, kiuj prezentis spiritajn kaj filozofiajn pensojn kaj eĉ semajnis specifan internacian amikecon de tiuj personoj ĉirkaŭ la penso de universala amikemo. La rondo estis senmura – estis rondanoj novaj kaj rondanoj forfalaj, neniun tio ĝenis. Ni rajtas rigardi ĝin kiel ekzemplon de eksporto de la Semajno de Internacia Amikeco ekster Esperantujo. Nun la Konvivio oficiale spertas intergeneracian paŭzon, sed juna filozofo en Usono, kiu eĉ eklernetis Esperanton dum iu fazo, diradas ke li bakas la postan fazon. (Mi konfesu ke mi treege longe ne aŭdis

de li. Tamen nenio malhelpas, ke ni senrikane akceptu la oficialan rakonton pri paŭzado.)

La amikeco en la senco de konkreta rilatado inter personaj geamikoj ne estas neŭtrala kaj ne povas esti senmure universala. Sed en Esperantujo ni havas senreceptan stilon spici niajn amikecojn per amikemo, kiu efektive estas neŭtrala kaj universala. La konvivia eksperimento montris, ke per vojo budhana, filozofia, oni povas ankaŭ aliloke praktiki ion similan. En viaj diversaj medioj, vi certe trovas aliajn vojojn por kultivi la amikemon – kaj krei tian grundon sur kiun ‘sem[i] kaj sem[i], neniam laciĝ[i]’ havos pozitivan kaj prisekveblan efikon.

Minimуме, ni en la Esperanta komunumo de tempo al tempo meditado pri la fakto, ke en Esperanto multaj el ni rutine finas la leterojn kaj mesaĝojn per la formulo ‘amike,/ [persona nomo]’ – eĉ niaj rutinoj kviete plibonigas nian psikan konsiston. Kial ne ekzempli tiun rutinon tuje, tiamaniere farante el tiu ĉi teksto leteron!



**Fronte al la nokto, ne akuzu mallumon.  
Lernu fari lumon.**



## ĈU MEDIUMO FRANCISCO CÂNDIDO XAVIER ESTIS ESPERANTISTO?

Benedicto Silva – Brazilo



Chico Xavier

Jen demando, kiun ofte oni faras al mi kaj al aliaj esperantistoj.

Mi ĉiam respondas:

— Ne. Francisco Cândido Xavier neniam lernis Esperanton, sed li ĉiam interesiĝis pri nia internacia lingvo kaj ties movado.

Kaj, por pruvi tiun interesiĝon de nia fama brazila mediumo je nia internacilingvo, unu epizodo, en kiu mi partoprenis, klare montras, ke Francisco Xavier sendube agnoskis la gravecon de Esperanto kiel efika komunikilo inter la homoj, kaj eĉ inter la spiritoj en la Ĉiela Mondo.

Kvankam al kelkaj legantoj tiu epizodo povas ŝajni negrava, mi pensas, ke mi devas registri ĝin ĉi tie, ĉar ĝi rilatas ne nur al nia kara mediumo, sed ankaŭ al la genia kreinto de la internacia lingvo, D-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof, kaj al la patrono de nia **Spiritisma Eldona Asocio Francisco Valdomiro LORENZ**.

Mi ne estas certa pri la preciza dato, en kiu okazis la faktoj, kiujn mi rakontas ĉi tie, sed estis en la jaro 1972 aŭ 1973... Tiam mi loĝis en Monte Aprázivel, urbo el subŝtato San-Paŭlo.

Unu matenon, mia karmemora amiko Osvaldo Cordeiro, tre aktiva spiritisto en urbo Mirassol, telefonis al mi, por diri, ke Francisco Cândido Xavier deziras aranĝi rendevuon kun mi en la sidejo de Instituto de Difusão do Espiritismo - IDE, en urbo Araras. Laŭ Oswaldo, la mediumo demandis, ĉu mi povos plenumi

tiun rendezuon kun li. Kompreneble, mi respondis, ke mi nepre plenumos lian deziron.

Post kelkaj tagoj, en ia sabata mateno, mi veturis al Araras kun Oswaldo Cordeiro.

Tie ni estis akceptitaj de D-ro Hércio M. C. Arantes, tiama prezidanto de IDE, kiu nin kondukis al relative vasta ĉambro, kie ni salutis Chico Xavier kaj aliajn spiritistojn tie troviĝantajn, inkluzive la tiaman senatanon kaj ankaŭ spiritiston, D-ron Freitas Nobre.

Sen iu ajn formalajaĵo, meze de tiu simpla ĉambro, Francisco Cândido Xavier esprimis la ĝojon, kiun kaŭzis al li mia bonvolemo akcepti lian inviton...

Sekve, kun sia natura trankvileco, li diris al mi:

— Profesoro, certe vi jam legis la mesaĝojn, kiujn mi siatempe ricevis de la Spirito Francisco Valdomiro Lorenz, pri la kreado de Esperanto en la Spirita Mondo, far Zamenhof, antaŭ ol ĉi tiu Majstro efektivigis ĝin sur nia Planedo. Tiu serio da mallongaj mesaĝoj aperis antaŭ kelkaj jaroj en *Reformador*, revuo de Brazila Spiritisma Federacio. Miaopinie, pro sia graveco, tiuj mesaĝoj devas esti legataj de ĉiuj homoj, kiuj interesiĝas pri la problemo de lingvo internacia. Pro tio, mi estos tre ĝoja, se iam ili estos publikigitaj en aparta volumo, por trakuri ne nur nian landon, sed ankaŭ la tutan mondon...

Se ĉi tiu ne estas la ekzakta esprimo de la kara mediumo, mi tamen povas aserti, ke ĝi estas almenaŭ la esenco de lia propono...

Finante, li demandis min:

— Ĉu vi povas kaj volas traduki en Esperanton tiujn mesaĝojn?

— Jes, Chico, — mi respondis. Tion mi faros kun granda plezuro, ne nur pro tio, ke temas pri grava laboro por Spiritismo kaj Esperanto, sed ankaŭ pro tio, ke mi havos la okazon plenumi peton proponitan de vi! Por mi ĝi estos ne nur laboro, sed granda honoro!

Kaj sekve daŭrigis la mediumo:

— Kiel sciante, la menciitaj mediumaj mesaĝoj estas tre mallongaj. Ili tute ne sufiĉas por okupi la spacon de ordinara volumo. Tial, mi sugestas la jenon: unue:

ili devos aperi en du lingvoj: portugala kaj Esperanto; krom la tradukado, mi petas, ke vi mem verku ĉapitron pri Esperanto, por ke ne-esperantistaj legontoj sciu, kio ĝi estas.

Por plenumi la peton de nia kara mediumo, mi verkis en ambaŭ lingvoj la ĉapitron *Esperanto: difino kaj nuntempa movado*.

Sed la deziro de Francisco Cândido Xavier ne limiĝis nur al mia tasko. Kun la sama emfazo li petis al D-ro Elias Barbosa, kuracisto en Uberaba kaj intima amiko, ke li verku ĉapitron sub titolo *Chico Xavier kaj kulturo*; kaj al D-ro Ney da Silva Pinheiro, en Porto Alegre-RS, la komisiis la organizadon de la longa *Bibliografio de Francisco Valdomiro Lorenz*.

La tutan menciitan materialon ellaboritan de tiuj konataj spiritistoj mi esperantigis, kiel supre dirite, laŭ la peto de Francisco Cândido Xavier.

Kaj en tiu neforgesebla rendezuo, en unu el la vastaj ĉambroj de IDE, en neforgesebla pluva mateno, nia karmemora mediumo diris al mi, ke li deziras, ke tiu tuta materialo de la nova verko *O Esperanto como revelação/Esperanto kiel revelacio* devas esti aranĝita tiamaniere, ke la originaloj, en la portugala lingvo, aperu sur la maldekstraj paĝoj de la libro, kaj la koncernaj tradukoj, en Esperanto, sur la dekstraj, kvazaŭ spegulo!

Hodiaŭ, post preskaŭ duona jarcento, estas tute neimagebla la ĝojo kun kiu mi kaj miaj kunfratoj eklaboris, ne nur por plenumi la peton de Francisco Cândido Xavier, sed ankaŭ por esprimi, per nia laboro, nian dankon al la Spirito Francisco Valdomiro LORENZ, kiu en la karna vesto klopodis ne nur por mildigi la vivojn de multaj, multegaj homoj, sed ankaŭ por krei, per siaj eksterordinaraj kapablo kaj mediumeco, monumentajn verkojn sur la tereno de literaturo, lingvistiko, sciencoj, medicino, filozofio kaj eĉ tuta sciaro pri nia planedo kaj ankaŭ pri la spirita mondo...



Unua eldono de la libro



Kaj mi sentas min tre feliĉa pro tio, ke grupo da brazilaj esperantistoj, en kies koro kaj animo ardas la flamo de la plej sincera Homaranismo, havis la ideon fondi en 1975 la grandiozan *Spiritisma Eldona Asocio F. V. LORENZ*, kiel esprimon de la modesta danko de la tuta brazila kolegaro al tiu humila Geniulo!

Dua eldono de la libro, en 7 idiomoj. Eldonita de Asocio Lorenz.

Se la kara leganto, ekster Brazilo, volos ĝin ricevi, tute senpage, skribu al ni: [editora\\_lorenz@uol.com.br](mailto:editora_lorenz@uol.com.br)





**Ne riproçu sterilan grundon.  
Anstataŭ tio, donu al ĉi sterkon.**



## **“LA ANIMO DE ARMENIO”: HISTORIO DE UNU FORGESITA GOBELINO**

***Omaĝe al la 200-jariĝo de Ĝanik Aramjan (1820-1879)***

Vladimir I. Ionesov – Rusio



“La Animo de Armenio”  
65x55 cm; 30-a de novembro 1909,  
loko de elfarado – Samarkando (?)  
La aŭtoro – Anna Bahtamjan  
(A. A. Ioannesjan)



Centra parto de la gobelino

La gobelino nomata “La animo de Armenio” estas la familia relikvo lasita de miaj gepatroj kaj dum multaj jaroj konservata inter la memorindaĵoj de niahejmaj uzaĵoj. Ĝi estis kreita en 1909 fare de mia onklino Anna Bahtamjan (la fraŭlina familinomo – Ioannesjan). La historio de bildigitaj sur la gobelino imagaĵoj kaj intrigoj, kiel evidentiĝis, profunde radikas en malproksima pasinteco, en jarcentojn kaj eĉ jarmilojn. Bedaŭrinde, la bildo “La animo de Armenio” hodiaŭ estas preskaŭ forgesita.

La gobelino havas dimensionojn 65x55 cm kaj ĝi estis kreita laŭ la tradicioj de armena tapiŝteksado surbaze de gaza ŝtofo per miksita tekniko de manteksado kaj brodado. Por ĝia produktado estis uzataj lanaj, kotonaj kaj silkaj fadenoj de pli ol 20 koloroj kaj kolortonoj: blanka, nigra, ruĝa, punca, roza, verda, bruna, orbrila, flava, blua, griza, lila, viola, oliva, kaŝtana, oranĝa ka. En la centro de la gobelino, sur la hela kaj rozkolora tapiŝkampo, estas prezentita virino sidanta kun nudaj piedoj surtere.

La juna kaj funebranta virino estas vestita en la tradicia longa robo de blanka-hel-blua kolortono kun punckolora ŝalo, surĵetita sur la maldekstran ŝultron. Sur ŝia brusto estas bidkoliero el travideblaj

vitraj bidoj. La virino kun malfiksaj haroj, tristaj okuloj kaj vizaĝo apogita sur ŝian dekstran manon, kliniĝis super la ruinoj de antikvaj armenaj temploj, urboj kaj memorindaj historiaj lokoj surfone de fruktoĝardenoj, morna ĉielo kaj montopintoj de Ararat kaj Aragac. Sub la ruinoj sur la brulcindrigita kaj sangomakulita tero estas disĵetitaj glavoj, sabroj, ponardoj, tranĉiloj, pafarmiloj kaj ceteraj spuroj de masakro kaj sangoverŝo. Sube laŭ la tuta longo de la gobelino de maldekstre dekstren estas broditaj la literoj Ն.Ա.Յ.Յ.Յ. (N.A.J.J.C.) kaj la surskribo: ՈԳԻ ՀԱՅԱՍՏԱՆԻ, kio signifas “La animo de Armenio” / “Vogi Hayastani”. En la malsupra dekstra angulo estas indikita la dato de la kompletigo de laboro pri la gobelino: Ն.30 1909, t. e. la 30-a de novembro 1909 [4].

La tekstoj de la gobelino kaj la dekoracie formitaj vidaj atributoj reflektas la historian dramon okazintan al la armena popolo en la heroa lukto por konservado de ties spiritaj valoroj kaj kultura identeco. La unueco de tiu ĉi temo kombiniĝas en la gobelina enhavo kun diversspecaj eventoj, retrospektoj, datoj, roluloj, nomoj, kolortransiroj, simboloj, aludoj, referencoj, motivoj, literaj signoj kaj kodoj bildigitaj sur la tuta spaco de la brodita ŝtofo.




La Sankta martirino Ripsimija (Ripsime) (985). Konstantinopolo. Miniaturo “Minologio de Bazilo la Dua”. Vatikana biblioteko. Romo.

La prezentitaj sur la gobelino kompozicioj arigiĝas en la unuecan teman bildon, rakontantan helpe de multenombraj desegnaĵoj kaj surskriboj pri la historia grandeco kaj profunda funebro de la armena popolo. En la centro de la rakonto estas “La Animo de Armenio”, kiun personigas virinopatrino – la protektantino de la armena nacia etoso kaj defendantino de la hejmlando. La figuro de la Patrino-Armenio laŭ la armena tradicio estis nedisigeble ligita kun arketipaj motivoj de la animo, virina zorgo, sorto, funebro, plorado, vagado, espero kaj renaskiĝo.

En la historio de la gobelino apartan intereson prezentas la brila sindona laboro kaj rimarkindaj artaj kreaĵoj de la elstara armena libro-presisto, pentristo kaj publicisto Ĝanik Aramjan (1820-

1879). Ĝuste Ĝ. Aramjan desegnis la bildon de la Patrino-Armenio laŭ ĝia klasika formo, igis ĝin alirebla por vasta publiko kaj atribuis al ĝi altan estetikan forton de la nacia simbolo, necesa ne nur por la interligoj de la tempoj kaj generacioj, sed ankaŭ por la spirita transformo de la popolo. Oni devas agnoski, ke la persona kontribuo de Ĝ. Aramjan estas ĝis nun subtaksita en la armena historiografio.

Ĝanik Aramjan naskiĝis en 1820 en Nikomedia (nun Izmit), proksime de Istanbulo. Jam junaĝe li translokiĝis al Konstantinopolo, kie li komencis studi diversajn metiojn. En 1846 li veturas al Parizo, kie li unue okupiĝis pri kudrado de vestoj, sed poste li dediĉis sin al gravurarto. Ĉi tie li ĉiamaniere strebas antaŭenigi la armenan kulturon kaj ĝian alproksimiĝon al Eŭropo. En Parizo Ĝ. Aramjan klopodas organizi libro-presejon por eldoni literaturon en la armena lingvo. En la 1850-aj jaroj li ellaboras kaj publikigas la novan armenan tipografian tiparon, interrilatante ĝin kun eŭropaj poligrafiaj normoj. Tiu tiparo estis aprobita kaj ĝis nun portas la nomon Aramjan. Intertempe, li multon transprenas de la renomaj parizaj presistoj kaj eldonistoj. En iliaj presejoj Aramjan publikigas kelkajn librojn, uzante la tiparon, kiun li inventis. En 1859 li establas sian propran presejon, kie li presas klerigan literaturon pri la armena kulturo, edukado kaj historio. Ĝ. Aramjan eldonas librojn, revuojn, vortarojn, lernilojn, albumojn, afiŝojn, li verkas artikolojn por ĵurnaloj.



Ĝanik Aramjan  
(1820-1879)

Tiutempe li kunlaboras kun tiaj armenaj publicistoj kaj publikaj agantoj kiel Stepan Voskan (1825-1901), Sarkis Vanandeci (1830-1871), Gabriel Ajvazjan (1812-1880), Mikael Nalbandjan (1829-1866). Baldaŭ la presejo de Aramjan translokiĝis al Marsejlo, kie li daŭre antaŭenigas sian klerigan mision. En 1865 Ĝ. Aramjan revenas al Konstantinopolo, kie li vivis kaj laboris ĝis sia morto la 16-an de aprilo 1879. En Konstantinopolo li fariĝas direktoro de la Reĝa Presejo, en kiu estas presataj multnombraj verkoj pri literaturo, arto, historio, ekonomio kaj edukado. Samtempe kun sia eldona aktivado, Ĝ. Aramjan okupiĝis ankaŭ

pri la socia agado. La plimulto da la libroj, publikigitaj de Ĝ. Aramjan, esprimis la progresemajn ideojn de tiu tempo. Inter tiuj ĉi libroj estas, ekzemple, la verkoj: “La okcidento” de Stepan Voskan, “Agrikulturo kiel la ĝusta vojo” de Mikael Nalbandjan, “La kolombo de Masis” de Gabriel Ajvazjan (Ajvazovskij) kaj aliaj.

Entute, laŭ la datumoj de *La Armena Soveta Enciklopedio* (1974), Ĝanik Aramjan publikigis pli ol 300 librojn, el kiuj 36 – en Parizo, 4 – en Marsejlo kaj 283 en Konstantinopolo.

La socia signifo de la persona kontribuo de Ĝ. Aramjan estas plejparte determinita de la fakto, ke lia eldona agado antaŭ ĉio celis al apogo de lerneja edukado por armenaj infanoj, enkulturante ilin al la nacia historio tra la tuthomara heredaĵo kaj la interligo de tempoj.

El liaj armenlingvaj publikaĵoj precipe gravas la tiel nomata klasĉambra lernolibro (1860) [6]. En tiu ĉi lernolibro aperis 236 ilustraĵoj prezentantaj diversajn historiajn scenojn, inkluzive tiujn el la historio de la armena popolo [2; 3; 6]. La aŭtoro de multaj artlaboraĵoj estis Ĝ. Aramjan mem. Kaj sur unu el ili, prezentita sur la paĝo 94... (pensu nur!) estis reproduktita la gravuraĵo, kiu, 50 jarojn poste, iĝis fonto de inspiro por Anna Bahtamjan, kiu en 1909 kreis la memorgobelinon kun la bildo de funebranta armena virino.



La lernolibro por armenaj infanoj, eldonita de Ĝanik Aramjan, Parizo, 1860.



La ilustraĵo el la lernolibro por armenaj infanoj (1860) de Ğanik Aramjan, kiu personigas “La nunan staton de Armenio”

En la fino de la libro, Ĝ. Aramjan donas klarigon pri tiu ĉi arta temo, difinante ĝin kiel “La nuna stato de Armenio” [6, p.227]. En la lernolibro estas ankoraŭ unu rimarkinda tutpaĝa ilustraĵo [p. 96], kiu prezentas la nudpiedan junulinon kun densa kaj plektita hararo, piedirantan en funebro tra la monteta tereno. Sur la brusto ŝi havas bidojn, en ŝiaj manoj estas spegulforma objekto. Ventas, malserenas kaj ombras. Ĉirkaŭ la junulino estas ruinoj de la konstruaĵoj iam ornamintaj la urbon – temploj, palacoj, arkoj... Sub la bildo estas metita la surskribo “La Spirito de Armenio”.



La ilustraĵo kun la subskribo “La Spirito de Armenio” el la lernolibro por armenaj infanoj (1860) de Ğanik Aramjan

Baldaŭ post la publikigo de tiu ĉi lernolibro – la 6-an de aŭgusto 1861 – en la ĵurnalo “Parizo” (“Paris”) Ĝanik Aramjan aperigas sian artikolon ilustritan, plian fojon, per la sama konata gravuraĵo kun iom da aŭtora prilaboro. Jen kiel priskribas la temon de sia kreitaĵo Ĝanik Aramjan: *“Surfone de Araks kaj Ararat estas prezentitaj la ruinoj de 12 urboj: Armavir, Artaŝat, Dvin, Ani, Kars, Van ka, kaj ankaŭ la ruinoj de Eĉmiadzina katedralo. Meze de la bildo estas figurita sidanta juna virino – simbolo de renaskiĝo de Armenio”* [3].

Post kiam la bildo estis prezentita al la armena publiko surpaĝe de la Pariza ĵurnalo kaj sur apartaj afiŝoj, la verko de Aramjan iĝis eksterordinare populara. La historia temo, bildigita per tiu ĉi verko, akiras vastan nacian rekonon – armenaj virinoj, sekvante la modelon de la ilustraĵo de Aramjan, komencas teksti tapiŝojn, kudri kaptukojn, krei objektojn de dekoracia-aplika metiarto kaj per ili ornamis siajn hejmojn [3].

Ekzistas raportoj, ke la bildo de Aramjan ornamis publikajn salonojn kaj publikajn lokojn ankaŭ en aliaj urboj de la mondo, inkluzive de Moskvo, Sankt-Petersburgo, Aleksandropolo (nun Gjumri), Baku, same kiel en multenombraj armenaj komunumoj en Turkio kaj najbaraj regionoj. Kiel evidentiĝis, unu el la lokoj, kie la memoro pri la bildo de Aramjan ne nur vivis, sed ankaŭ akiris sian evoluon en la nova disvolvo de popola arto, estis urbo Samarkando.

La historio turniĝis tiel, ke ĝuste la publikigita fare de Ĝ. Aramjan en 1859-1861 bildo kun la virino sidanta sur la ruinoj de urboj kaj funebranta la amaran sorton de siaj gefiloj, duonjarcenton poste denove fariĝis modelo de paciĝo kaj graco, inspirinte Anna Bahtamjan al la kreiva procezo por krei la gobelinon “La Animo de Armenio”.

*Anna Arutjunovna Bahtamjan (Ioannesjan)* naskiĝis en 1888 kaj, kiel oni povas supozi el la surskribo de la gobelino, en antikva Karabaĥa vilaĝo Haĉmaĉ, 30 km orienten de la urbo Ŝuŝa. Ŝia infanaĝo pasis sub la forta influo de la dramecaj eventoj trafintaj la armenan popolon en la 90-aj jaroj de la XIX-a jarcento. La masakro de armenoj (1894-1896) en la Otomana Imperio kaj en la najbaraj regionoj fariĝis psikologia ŝoko por Anna. Emociaj traŭmatoj kaj la sperto de la





Anna Bahtamjan (Ioannesjan),  
1888-1956. Foto, ĉ. 1909



Anna Bahtamjan (Ioannesjan) kun sia edzo Aleksandr  
Bahtamjan (1875-1939). Foto, ĉ. 1919, Samarkando (?)



Anna Ioannesjan (Bahtamjan) kun  
siaj gepatroj kaj malpliĝaj fratino  
kaj frato. De maldekstre dekstren:  
Arutjun (patro), Anna, Marjam  
(fratino), Saarnaz (patrino), Aŝot  
(frato). Foto, 1903-1904, supozeble  
en urbo Baku (fotostudio de V.  
Rostomjan)



Preĝejo Surb Astvacacin (de Sankta Dipatrino) (1651) de  
la monaĥeja ensemblo Ŝoŝkavank. La orienta parto de la  
monaĥejo (foto de Albert Voskanjan, 2015). Ĉirkaŭaĵoj de  
Haĉmaĉ, Montara Karabaĥo



Avo Petros kaj malpliĝa frato de Anna  
Ioannesjan (Bahtamjan) - Aŝot.  
Foto (ĉ. 1907-1908), urbo Ŝuŝa (?)



Vaak (maldekstre) kaj Artaŝes (dekstre)  
Ioannesjan (malpliĝaj fratoj de Anna  
Bahtamjan), Foto, 1913. Samarkando



Anna Bahtamjan (Ioannesjan) kun sia amikino.  
Foto, ĉ. 1910-1911. Fotostudio de Eduard Klar,  
urbo Tiflis.



Samarkando. Apud la placo Registan. Foto (1900-aj jaroj).



Samarkando. Preĝejo de Sankta Georgo. Foto (1900-aj jaroj).

travivita tragedio restis kun ŝi dum la tuta vivo kaj influis ŝian artisman kreadon. Komence de la XX-a jarcento, Anna kaj ŝiaj gepatroj translokiĝis al Samarkando.

Ŝokita de la katastrofoj kaj rifuĝmigradoj trafintaj la armenan popolon, rigardante la suferojn kaj afliktiĝon de la viktimoj de amasa ekstermo de samlandanoj fine de la XIX-a kaj komence de la XX-a jarcentoj, Anna serĉas spiritan subtenon en sia kreiva laboro. Dum tiu ĉi tempo Anna Bahtamjan kreas kelkajn tapiŝformajn artobjektojn, el kiuj du rimarkindaj gobelinoj konserviĝis ĝis nuna tempo – *“Jesuo Kristo surĉiele”* kaj *“La Animo de Armenio”*.

Prezinte kiel modelon la faman bildon de Ĝ. Aramjan, Anna transformis ĝin per siaj animsentoj, aldoninte lokojn proksimajn al ŝia koro kaj memoro, markinte tion, kion ŝi pripensadis kaj vivspertis. Do, la lanĉita meze de la XIX-a jarcento fare de la armena libropresisto arta temo estis riĉigita per personigita historio de la aparta homo, per nova sperto de estetika interpreto de la vaste konataj kaj malmulte konataj temoj.



Ivan (Vaak) Arutjunoviĉ Ionesov (malpliĝa frato de Anna Bahtamjan) kaj Aleksandra Petrovna Ivanova. La gepatroj de la aŭtoro de la artikolo. Foto, 1998. Samarkando



La gobelino *“Jesuo Kristo surĉiele”* (ĉ. 1908-1910). Dimensioj: 54 x 50 cm.

La aŭtoro: Anna Bahtamjan (Ioannesjan)

Anna Bahtamjan forpasis en 1956 en Samarkando. La gobelino estis zorgeme konservita kaj restaŭrita de miaj gepatroj kaj antaŭzorgeme transdonita al la infanoj – la nevoj de Anna. La sorto turniĝis tiel, ke pli ol 60 jarojn poste (kaj 140 jarojn post la morto de Ĝ. Aramjan) la familia relikvo fariĝis ne nur memorornaĵo de la hejma internaĵo, sed ankaŭ la temo de publika prezentaĵo kaj scienca diskuto en la fakaj komunumoj de Samara (Rusio)

kaj Samarkando (Uzbekio). Evidentiĝis, ke nur konektiĝinte kun la historio de la popolo, la sorto de unu homo kapablas akiri universalan gravecon [1].

La kreaĵo de Anna Bahtamjan atestas: ju pli multe la arta verko estas plenigata per individua-personigita travivaĵo, kun des pli granda nacia kolorriĉeco ĝi estas projektata en la eksteran mondon. En nia kazo, la individua-hejma mondo tra la arto de tapiŝteksado transformiĝis en la mondon de altaj naciaj valoroj. Danke al tiu ĉi transiro, la hejma fariĝas la nacia, kaj la nacia, universala). Ni vidas la vojon, kiu kondukis nin de nuntempo al Anna Bahtamjan kaj poste sendis nin al Ĝanik Aramjan, post kio revenigis nin en la nuntempon por interkonekti la tempojn kaj ektuŝi la memoron de la generacioj, la netuŝeblajn sanktaĵojn kaj la novan socian kreivon – ĉion por fari la vivon iom pli bona, pli bonkora, pli justa.

La ricevitaĵoj de la gobelino historiaj lecionoj denove rememorigas al ni, ke, apogante sur spiritajn valorojn, homo povas venki eĉ la plej krutajn vivturniĝojn, elprovojn kaj sortoturnojn. Scio unuigas, kreivo konstruas, arto transformas, belo savas. Jes, la tempoj ŝanĝiĝas...

Samtempe oni ne devas blinde absorbiĝi je pasinteco, enkaptiĝi en ofendiĝo kaj malespero, necesas serĉi, trovi kaj formi novajn sciojn kaj utilan sperton por venki tion, kio nin disigas. Pasinteco ekzistas ne por tio, ke ĝi estu priplorata aŭ admirata. Ĝi havas malsaman destinton. Pasinteco same kiel heredaĵo kaj travivita sperto servas kiel kondiĉo por spirita transformo de nuntempo, ĝi vastigas la limojn de la kulturo por scio, kompreno kaj packreado. Kiel diris N. K. Rjoriĥ (Roerich): *“El la mirindaj ŝtonoj de la pasinteco konstruu la ŝtupojn al la estonteco”*.

La mondo neniam estis kaj neniam estos perfekta por homoj, sed tio ĉi ĉiam donas al ni la eblon ŝanĝi ion, kaj sekve la ŝancon almenaŭ iom plibonigi la mondon. Kaj ĉi tie, eble, la plej grava afero, en la vortoj de Osip Mandelŝtam, estas ne perdi la tiel nomatan sesan “Ararat”-senton – la senton de altiro de la monto [5]. Ja la montoj ne estas kreitaj por disigi nin, sed por surgrimpiti ilin kaj por esti pli proksime al la ĉielo, kiu ne havas limojn kaj malicon, kaj kie la suno estas ununura por ĉiuj.

## Literaturo

1. *Armenija: pritjaĝenie kultury (Armenio: altiro de la kulturo)*. Materialoj de la Internacia scienc-praktika forumo (Samara, 2017). Red. V.I. Ionesov – Samara: Samara Ŝtata Instituto de Kulturo, 2019. – 696 p. *Армения: притяжение культуры*. Материалы Междунар. науч.-практ. форума (Самара, 2017) = «Armenia: The Attraction of Culture» [Текст] / СГИК; под ред. В.И. Ионесова. – Самара: Самар. гос. ин-т культуры, 2019. – 696 с.
2. *Akorjan, M. Historio de generacioj: Patrino-Armenio. История поколений: Мать Армения / Ĉiutaga ĵurnalo, 02.09.2012 / «ԱԼԻԶ» (“Ondo”) / Nor-Ĝuga, Isfahan, Irano, 2012. – Retaliro: <http://www.alikonline.ir/news/social/item/13314> (konsultdato: 10.11.2017) *Акопян, М. // ՊԱՏՄՈՒԹԵԱՆ ԶԱՌՈՒԴԻՆԵՐՈՒՄ – Մայր Հայաստան / Ежедневная газета, 2 сентября 2012 г. / «ԱԼԻԶ» («Волна») / Օրաթերթ Վիրակի, 02 Սեպտեմբերի 2012. Новая Джуга, Исфahan, Иран, 2012 [Электронный ресурс].: – URL <http://www.alikonline.ir/news/social/item/13314> (дата обращения: 10.11.2017).**
3. *Gazarjan, M. Por kiu ploras? – M. Gazarjan. – Lernejo de A. Ĥudaverdjan. Nor-Ĝuga, Isfahan, Irano, 05.05.2013. – Retaliro: <http://www.alikonline.ir/news/other/item/4805> (konsultdato: 20.10.2017). *Газарян, М. По кому плачет? / М. Газарян. Новая Джуга. Исфahan. Иран. 05.05.2013 / Ո՞ւմ որքն է. ՄԱՆԻԱ ԳԱԶԱՐԵԱՆԻ Քաղաքը Ա. ԽՈՒԴԱՎԵՐԴԵԱՆԻ (Նոր Ջուղա, Վիրակի, 05 Մայիսի 2013). // Ալիք / «Волна» [Электронный ресурс] / М. Газарян. – URL: <http://www.alikonline.ir/news/other/item/4805> (дата обращения: 20.10.2017).**
4. *Ionesov, V.I. O knigopечатnike Ĝanike Aramjane i Anne Bahtamjan: istorija odnogo zabytogo gobelena (Pri libropresisto Ĝanik Aramjan kaj Anna Bahtamjan: la historio de unu forgesita gobelino) // Armenija: pritjaĝenie kultury (Armenio: altiro de la kulturo). Materialoj de la Internacia scienc-praktika forumo (Samara, 2017). Red. V.I. Ionesov – Samara: Samara Ŝtata Instituto de Kulturo, 2019. – p. 26-84. *Ионесов, В.И. О книгопечатнике Джанике Арамяне и Анне Бахтамян: история одного забытого gobelena // Армения: притяжение культуры. Материалы Междунар. науч.-практ. форума (Самара, 2017) = «Armenia:**

The Attraction of Culture» [Текст] / СГИК; под ред. В.И. Ионесова. – Самара: Самар. гос. ин-т культуры, 2019. – С. 26-84.

5. *Mandelŝtam, O. E. Puteŝestvie v Armeniju (Vojaĝo al Armenio).* / О.Е. Мандельштам // *Ĉetvjortaja proza (Kvara prozo).* – Moskva: SP Interprint, 1991. – 240 p. *Мандельштам, О.Э. Путешествие в Армению / О.Э. Мандельштам // Четвёртая проза.* – Москва: СП Интерпринт, 1991. – 240 с.

6. *Aramjan, Ĝ. Lernolibro por armenaj infanoj.* Parizo, presejo de Aramjan, 1860. – 230 p. Արամյան, Ճանիկ. Դասարան Հայկազն մանկանց. (15x9 սմ, 236 նկ., նոտա, շարվ.). Փարիզ, տպ., Արամյան, 1860. – 230 էջ.

P.S. La aŭtoro estos dankema al ĉiuj, kiuj dividos kun li iujn ajn utilajn informojn kaj fotojn respegulantajn la artan temon de la gobelino kaj de similaj artefaktoj – tapiŝoj, desegnaĵoj, gravuraĵoj ktp.

#### **Pri la aŭtoro:**

*Vladimir I. Ionesov estas doktoro pri kulturologio (Dr. Sc. habil.), kandidato de historiaj sciencoj (Ph.D), profesoro, katedrestro pri teorio kaj historio de kulturo, direktoro de Lernejo por Superaj Kulturologiaj Studoj, Samara Ŝtata Instituto de Kulturo; membro de Eŭropa Akademio de Sciencoj kaj Artoj. Poŝta adreso: P.O. Box 3004, Samara, RU-443099, Rusio. Retadreso: samartis@yandex.ru*




**Penu agi por la bono dum vi disponas tempon.**

**Estas danĝere havi la kapon ĉiam plena de  
revoj, sed la manojn senokupaj.**



## ENFOKUSIGO LAŬ SPIRITISMO

Allan Kardec – Francio



### MILITOJ

**Kiu estas la kaŭzo, kiu kondukas la homon al milito?**

“La regado de la besta naturo super la spirita kaj la plena satigo de la pasioj. En barbareco, la popoloj rekonas nur la rajton de l’ plej forta; tial, milito estas por ili normala stato. Sed, proporcie kiel la homo progresas, milito malplioftiĝas, ĉar li evitas ties kaŭzojn; kaj, kiam ĝi estas necesa, li scias kunigi kun ĝi humanecon.”

**Ĉu milito iam malaperos de sur la Tero?**

“Jes, tiam, kiam la homoj komprenos justecon kaj praktikos la leĝon de Dio; tiam, ĉiuj popoloj estos frataj.”

### HOMMORTIGO

**Ĉu hommortigo estas krimo en la okuloj de Dio?**

“Jes, granda krimo; ĉar homo, kiu forprenas la vivon de sia similulo, tranĉas ekzistadon *je kulpelpago aŭ je misio*; jen la malbona faro.”

**Ĉu Dio pardonas hommortigon pro memdefendo?**

“Nur bezono povas ĝin pravigi; sed, se oni povas gardi sian propran vivon, ne pereigante tiun de sia atakanto, oni devas tion fari.”



## KRUELECO

### Ĉu oni povas rilatigi la senton de krueleco al la instinkto de detruado?

“Krualeco estas la plej malbona flanko de la instinkto de detruado, ĉar, se detruo estas kelkafoje necesa, krueleco neniam estas tia; krueleco estas ĉiam esprimo de malnobla temperamento.”

### Ĉu krueleco ne estas kaŭzata de manko de morala sento?

“Diru, prefere, ke morala sento ankoraŭ ne elvolviĝis; sed ne diru, ke ĝi mankas, ĉar ties principo ekzistas ĉe ĉiuj homoj kaj estas tio, kio ilin poste faras bonaj kaj humanaj estuloj. Morala sento ekzistas do ĉe sovaĝulo, sed ĝi troviĝas en li, kiel la parfumoprincipo en florigermo, antaŭ ol floro disvolviĝos.”

Ĉiuj kapabloj ekzistas ĉe la homo en elementa aŭ latentata stato; ili elvolviĝas laŭ tio, kiel la cirkonstancoj estas pli aŭ malpli favoraj. La troa elvolviĝo de unuj paralizas aŭ nuligas tiun de aliaj. La superekscitado de la materiaj instinktoj sufokas, se oni tiel povas diri, la moralan senton, same kiel la kresko de la morala sento iom post iom malfortigas la pure bestajn kapablojn.

## PUNO DE MORTO

### Ĉu puno de morto estos iam forstrekita el la homa leĝaro?

“Puno de morto sen ia dubo malaperos, kaj ĝia forigo signos progreson de la homaro. Kiam la homoj estos pli instruitaj, puno de morto estos tute forstrekita de sur la Tero; tiam, jam ne estos necese, ke homoj estu juĝataj de homoj. Mi parolas pri tempo, kiu ankoraŭ estas tre malproksime de vi.”

La socia progresado sendube ne estas tute kontentiga; sed oni estus maljusta kontraŭ la hodiaŭa socio, se oni ne vidus progreson en tio, ke, ĉe la plej kleraj popoloj, puno de morto estas malpli ofte aplikata, kaj en la naturo de la krimoj, al kiuj tiu puno estas diktata. Se oni komparas la garantiojn, per kiuj, ĉe tiuj popoloj, la Justico penas ŝirmi la akuzaton, kaj la humanecon de ĝia konduto kontraŭ li, eĉ post elpruvo de lia kulpeco, kun tio, kio, antaŭ nelonge, estis kutimo, oni ne povas ne rekoni la progresojn, kiun laŭiras la homaro.

**La leĝo de memkonservado havigas al la homo la rajton antaŭgardi sian propran vivon; ĉu li ne praktikas tiun rajton, kiam li forpelas de la socio danĝeran membron?**

“Estas aliaj rimedoj eviti tian danĝeron, ol mortigo. Cetere, al krimulo oni devas malfermi, kaj ne fermi, la pordon de pento.”

**Ĉu la puno de morto, kiu povas esti forigita de civilizitaj socioj, ne estis neceso dum pli fruaj tempoj?**

“Necesoj ne estas la ĝusta vorto; la homo opinias ion necesa, ĉiam, kiam li ne trovas ion alian pli bonan; laŭgrade, kiel li sin instruas, li pli bone komprenas, kio estas justa aŭ maljusta, kaj forpuŝas de si la ekscesojn faratajn, en la nomo de justeco, dum lia tempo de neklereco.”

**Ĉu la limigo de la okazoj, ĉe kiuj estas aplikata puno de morto, estas signo de progresado de l'civilizacio?**

“Ĉu vi povas dubi pri tio? Ĉu via Spirito ne indignas, legante la rakonton pri la homaj disbuĉadoj, iam farataj en la nomo de justeco kaj eĉ, ofte, honore al Dio; pri la turmentegoj, kiujn oni igis sperti kondamniton, eĉ akuzaton, por eltiri el li, per troaj suferoj, la konfeson de krimo, kiun li, ofte, ne faris? Nu! Se vi estus tiam vivinta, ĉio ĉi ŝajnus al vi tute natura, kaj eble, se vi estus juĝanto, vi estus farinta tion saman. Tiel, kio ŝajnis justa en iu tempo, tio ŝajnas barbara en alia. Nur la diaj leĝoj estas eternaj; la homaj ŝanĝiĝas kun la progresado; ili ankoraŭ ŝanĝiĝos plu, ĝis ili harmonios kun la diaj leĝoj.”

**Kion ni pensu pri puno de morto, diktita en la nomo de Dio?**

“Tio estas eksidi sur la seĝon de Dio por mem juĝi. Kiu tiel kondukas, tiuj montras, kiel nekapablaj ili estas kompreni Dion, kaj ke ili devas ankoraŭ elpigi multe da kulpoj. Puno de morto estas krimo, kiam aplikata en la nomo de Dio; kaj kiuj ĝin diktas, tiuj respondas por ĝi, kiel ankaŭ por aliaj mortigoj.”

El *La libro de la spiritoj*. Eldono de Brazila Spiritisma Federacio.



**La kolero, la furiozeco,  
la malmodereco  
devas cedi lokon al ĝojo,  
al boneco kaj al la paco.**



# NI, ZAMENHOF, UNUIĜINTAJ NACIOJ, NIAJ KOMUNAJ AMIKOJ KAJ MALAMIKOJ

Renato Corsetti – *Italio*



## 1. La penantoj

Kio estas esperantismo? Respondas la deklaro aprobata en Bulonjo-ĉe-maro en 1905:

*La esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de la lingvo neŭtrala, kiu servu por interkompreniĝo de la diverslingvaj homoj.*

- *Lingvo internacia povas esti nur lingvo arta; perfekte vivipova kaj en ĉiuj rilatoj plej taŭga montriĝis nur unu sola lingvo: Esperanto.*
- *La aŭtoro de la lingvo rezignis pri ĉiuj personaj rajtoj rilate la lingvon kaj transdonis ĝin al la tuta mondo.*
- *La sola bazo, deviga por ĉiam kaj por ĉiuj esperantistoj estas la Fundamento de Esperanto.*
- *Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto, tute egale por kia celo.*

En la kunteksto de ĉi tiu artikolo nur la unua punkto gravas: *La esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de la lingvo neŭtrala, kiu servu por interkompreniĝo de la diverslingvaj homoj.*

Ĉi tiu punkto indikas la ĉefan taskon al esperantistoj kaj esperantistaj asocioj. Mi laciĝis dum la tuta vivo regurdi tion al ĉiuj, tiom multe, ke mi mem ne plu havas la paciencon aŭskulti min, kaj tamen la movado ĝenerale preferas iri pli facilan vojon [antaŭ jaroj oni verkis poemojn post la tria leciono, nun oni realigas filmetojn kaj metas ilin en la reton]. Mi komprenas, ke estas malfacile

alparoli homojn, kiuj ne volas esti alparolitaj, kaj certe ne pri seriozaj temoj kiel Esperanto, sed se ni ne faras tion mi maltrafas nian ĉefan celon. Esence mi ne vidas multajn **penantojn**, kelkajn jes sed ne multajn. Kalocsay delaris sin poeto sen popolo, mi estas predikanto sen publiko.

Sed ankoraŭ pli grave estas, ke ni devas peni ne nur disvastigi la lingvon sed ankaŭ ĝiajn valorojn. Ni ĉiuj scias, ke la deklaro en Bulonjo-ĉe-maro estis malvenko por la profeta vizio de Zamenhof kontraŭ la prudentega kaj praktika aliro de la francaj 'laikuloj', por kiuj Esperanto estas nur lingvo.

Zamenhof respondis la postan jaron en la Universala Kongreso en Ĝenevo per parolado, kiu meritas esti legata komplete de ĉiuj [cetere trovebla en <http://satesperanto.org/spip.php?article3019> ]:

“Ni ne estas tiel naivaj, kiel pensas pri ni kelkaj personoj; ni ne kredas, ke neŭtrala fundamento faros el la homoj anĝelojn; ni scias tre bone, ke la homoj malbonaj ankaŭ poste restos malbonaj; sed ni kredas, ke komuniĝado kaj konatiĝado sur neŭtrala fundamento forigos almenaŭ la grandan amason de tiuj bestaĵoj kaj krimoj, kiuj estas kaŭzataj ne de malbona volo, sed simple de sinnekonado kaj de devigata sinaltrudado.

“Nun, kiam en diversaj lokoj de la mondo la batalado inter la gentoj fariĝis tiel kruela, ni, Esperantistoj, devas labori pli energie ol iam. Sed por ke nia laborado estu fruktoporta, ni devas antaŭ ĉio bone klarigi al ni la internan ideon de la Esperantismo. Ni ĉiuj senkonscie ofte aludadis tiun ĉi ideon en niaj paroloj kaj verkoj, sed neniam parolis pri ĝi pli klare. Estas jam tempo, ke ni parolu pli klare kaj precize.

“El la deklaro unuanime akceptita en la Bulonja Kongreso, ni ĉiuj scias, kio estas la Esperantismo en rilato praktika; el tiu ĉi deklaro ni ankaŭ scias, ke “Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu uzas la lingvon Esperanto tute egale, por kiaj celoj li ĝin uzas”. Esperantisto sekve estas ne sole tiu persono, kiu uzas Esperanton sole kaj ekskluzive por celoj praktikaj; Esperantisto ankaŭ estas persono, kiu uzas Esperanton, por gajni per ĝi monon; Esperantisto estas persono, kiu uzas Esperanton nur por amuziĝadi; Esperantisto fine estas eĉ tiu

persono, kiu uzas Esperanton por celoj plej malbonaj kaj malamaj. Sed krom la flanko praktika, deviga por ĉiuj kaj montrita en la deklaro, la Esperantismo havas ankoraŭ alian flankon, ne devigan, sed multe pli gravan, flankon idean. Tiun ĉi flankon diversaj Esperantistoj povas klarigi al si en la plej diversaj manieroj kaj en la plej diversaj gradoj. Tial, por eviti ĉiun malpacon, la Esperantistoj decidis lasi al ĉiu plenan liberecon akcepti la internan ideon de la Esperantismo en tiu formo kaj grado, kiel li mem deziras, aŭ - se li volas - eĉ tute ne akcepti por la Esperantismo ian ideon. Por demeti de unuj Esperantistoj ĉian respondecon por la agoj kaj idealoj de aliaj Esperantistoj, la Bulonja deklaro precizigis la oficialan, de ĉiuj sendispute akceptitan esencon de la Esperantismo kaj aldonis la sekvantajn vortojn: “Ĉiu alia espero aŭ revo, kiun tiu aŭ alia persono ligas kun la Esperantismo, estas lia afero pure privata, por kiu la Esperantismo ne respondas”. Sed bedaŭrinde la vorton “privata” kelkaj amikoj-Esperantistoj klarigis al si en la senco de “malpermesata”, kaj tiamaniere, anstataŭ konservi por la interna ideo de la Esperantismo la eblon tute libere disvolviĝi, ili volis tiun ideon tute mortigi.

“Se ni, batalantoj por Esperanto, propravole donis al la vasta mondo plenan rajton rigardi Esperanton nur de ĝia flanko praktika kaj uzadi ĝin nur por nia utilo, tio ĉi kompreneble al neniuj donas la rajton postuli, ke ni ĉiuj vidu en Esperanto nur aferon praktikan. Bedaŭrinde en la lasta tempo inter la Esperantistoj aperis tiaj voĉoj, kiuj diras: “Esperanto estas nur lingvo; evitu ligi eĉ tute private la Esperantismon kun ia ideo, ĉar alie oni pensos ke ni ĉiuj havas tiun ideon, kaj ni malplaĉos al diversaj personoj, kiuj ne amas tiun ideon!” Ho kiaj vortoj! El la timo, ke ni eble ne plaĉos al tiuj personoj, kiuj mem volas uzi Esperanton nur por aferoj praktikaj por ili, ni devas ĉiuj elŝiri el nia koro tiun parton de la Esperantismo, kiu estas la plej grava, la plej sankta, tiun ideon, kiu estis la ĉefa celo de la afero de Esperanto, kiu estis la stelo, kiu ĉiam gvidadis ĉiujn batalantojn por Esperanto! Ho, ne, ne, neniam! Kun energia protesto ni forĵetas tiun ĉi postulon. Se nin, la unuajn batalantojn por Esperanto, oni devigos, ke ni evitu en nia agado ĉion idean, ni indigne disŝiros kaj bruligos ĉion, kion ni skribis por Esperanto, ni neniigos kun doloro la laborojn kaj oferojn de nia tuta vivo, ni forĵetos malproksimen la verdan stelon, kiu sidas sur nia brusto, kaj ni ekkrios

kun abomeno : “Kun tia Esperanto, kiu devas servi ekskluzive nur al celoj de komerco kaj praktika utileco, ni volas havi nenion komunan!”

“Venos iam la tempo, kiam Esperanto, fariĝinte posedaĵo de la tuta homaro, perdos sian karakteron idean; tiam ĝi fariĝos jam nur lingvo, oni jam ne batalados por ĝi, oni nur tirados el ĝi profiton. Sed nun, kiam preskaŭ ĉiuj Esperantistoj estas ankoraŭ ne profitantoj, sed nur batalantoj, ni ĉiuj konscias tre bone, ke al laborado por Esperanto instigas nin ne la penso pri praktika utileco, sed nur la penso pri la sankta, granda kaj grava ideo, kiun lingvo internacia en si enhavas. Tiu ĉi ideo - vi ĉiuj sentas ĝin tre bone - estas frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj. Tiu ĉi ideo akompanadis Esperantismon de la unua momento de ĝia naskiĝo ĝis la nuna tempo. Ĝi instigis la aŭtoron de Esperanto, kiam li estis ankoraŭ malgranda infano; kiam antaŭ dudek ok jaroj rondeto de junaj diversgentaj gimnazianoj festis la unuan signon de vivo de la estonta Esperanto, ili kantis kanton, en kiu post ĉiu strofo estis ripetataj la vortoj : ‘malamikeco de la nacioj, falu, falu, jam estas tempo’.

Esence Esperanto estas “estas frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj.”

## **2. La nuna mondo kaj niaj malamikoj**

Ĉu la nuna mondo estas frata kaj justa? Mia respondo post observado de la mondo dum la lasta jardeko estas: NE. Mi havas la saman senton, kiun esprimas Kalocsaj en pluraj versoj de “En amara horo”, kvankam mi eĉ en tiu situacio ne uzus novajn radikojn kaj parolus pri maldolĉaj tempoj.

Mi vidas tajdon de malfrateco kaj de maljusteco invadi la mondon, kun politike dekstraj registaroj, kiuj kaptas la potencon en multaj landoj. La plej grava estas la absurda prezidanto de Usono, Trump, kiu volas montri sin forta kontraŭ malfortuloj, la meksikaj enmigrintoj. Granda parto de la usonanoj, malgraŭ sia troigita kristanismo sekvas lin pri sentoj tute malaj al tiuj de la evangelio de Kristo, kiu predikis pri amo kaj pri nefarado al aliaj de tio, kion oni ne farus al si mem. Samtempe ĉi tiu lando de la fino de la dua mondmilito ne ĉesas kaŭzi militojn, ĉie en la mondo, kie oni kuraĝas ne obei al ĝiaj ekonomiaj interesoj. Mi

ne vere komprenas kial ĵurnalistoj daŭre himnas al la plej granda demokrato en la mondo, aŭ mi komprenas sed ne volas ofendi ilin, kiuj nur sekvas la implicajn ordonojn de tiuj, kiuj agas ilin. “Liberaj ĵurnalistoj” ili vokas sin.

Sed ne estas nur Usono. Brazilo sekvas ĝin kun sia prezidanto, Hindujo montras sian ekziston per subpremado de la islamanoj kaj samtempe per riproĉo al la islamanoj, kiuj volis iĝi sendependa lando, Pakistano. En mia propra lando kaj en aliaj eŭropaj landoj, same progresas faŝismecaj partioj, kiujn por ne ofendi ilin, oni nomas populistaj. Kaj ni ne forgesu Israelon, kies politiko kaj faroj lastatempe montras, ke judoj estas normalaj homoj, ne pli bonaj kaj ne pli malbonaj ol la neelektitaj popoloj.

Do, la nigra tajdo de malfrateco kaj maljusteco progresas dum samtempe la konservemaj partioj zorge provas nuligi ĉiujn sociajn konkerojn de la lasta jarcento [senpaga ŝtata san-servo, laboristaj rajtoj, minimumaj salajroj, pensioj ktp.]

Mi daŭre demandis min, pri kio ni, la socialismemuloj, kiuj regis dum la antaŭa periodo, eraris kaj puŝis la civitanojn voĉdoni por Trump kaj similuloj. Ĉar la homoj evidente ne estis kontentaj pri la politikoj de la maldekstraj registaroj kaj pri ties efiko al la vivkondiĉoj de la homoj.

Mi kredas, ke mi havas la kialon: ni, la socialismemaj registaroj, Obama en Usono, ekzemple, pluaplikis dekstrajn politikojn postulatajn de la tiel nomata libera merkato, de la novliberismaj fortoj, de la Internacia Monda Banko, de la uson-stila tutmondigo kun rezultoj malbonaj por la normalaj homoj, kiuj voĉdonis dekstren pro la espero ricevi pli bonan traktadon de la dekstraj politikistoj.

Mi povus detaligi la konkretajn ekzemplojn de Italujo kaj Grekujo, sed tio verŝajne ne estas necesa.

### **3. Niaj komunaj amikoj**

Kiu do, povas helpi nin en ĉi tiu situacio kaj kion devus fari esperantistoj, kaj ĉu Esperanto povas helpi?

La unua afero por fari estas lerni el la historio, kaj la historio instruas, ke oni ne povas sukcese kompromisi kun dekstraj ideoj. Esperantistoj provis tion en



Germanujo kaj en aliaj eŭropaj landoj ekde la 30-aj jaroj kaj la provoj ĉiam finiĝis per malpermeso de Esperanto, ĉar naciistoj ne povas akcepti kompromisojn pri la temo de frateco kaj egaleco de la popoloj. Ĉu Trump ne ripetas ĉiutage “*United States first/Unue Usono*”? Do esperantistoj devas, laŭ mi, honeste kaj malferme kontraŭi tiujn reĝimojn. Mi ne estas alvokanta al perforta kontraŭstaro sed al politika kontraŭstaro almenaŭ per voĉdonado por aliaj partioj kaj per informado pri tio, kion tiuj reĝimoj volas fari, pri ilia instigo al rasa kaj etna malamo, pri ilia malplibonigo de la kondiĉoj de la homoj, pri la daŭra malrespekto pri ĉiuj homaj rajtoj en la dua duono de la deklaro pri la homaj rajtoj


Dua fronto de la batalo estu kontraŭ tiuj progresemaĵoj, kiuj ĉiuokaze akceptas la regadon de la merkato kaj de ties leĝoj, kies damaĝoj en la fino estos konsiderataj de la homoj kiel damaĝoj kaŭzataj de socialismo.

Do, Esperanto kaj esperantistoj estu la salo de la tero en ĉi tiu danĝera momento.

Sed ni havas amikojn. Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko estas niaj naturaj aliancanoj de longa tempo. Kaj ili de tempo al tempo donis siajn signojn favorajn al Esperanto. Ili ne estas la plej perfektaj iloj por solvi la problemojn de la mondo, sed ili provas, malgraŭ la kontraŭstaro de tiuj registaroj, kiuj ne celas plur-polusan, pacan kaj justan mondon. Usono estas en la unua vico kaj la aliaj sekvas. Ĉu vi scias ke Usono kaj Israelo foriris de Unesko? Ĉu vi scias, ke Usono planas eliri el UN kaj jam reduktas siajn financajn kontribuojn?

En ĉi tiu okazo ni, la esperantistoj devas fari ĉion, kion ni povas por helpi Uneskon kaj UN-on,

ĉar aliokaze baldaŭ ne plu ekzistos tutmondaj organizaĵoj, al kiuj prezenti Esperanton. Kion oni povas praktike fari? Simple aliĝi al la movado de Unesko-klubo en via lando. Komencu viajn esplorojn ĉe <https://en.unesco.org/countries/associations-centres-and-clubs-unesco> kaj same al la asocioj por UN en via lando: [https://en.m.wikipedia.org/wiki/World\\_Federation\\_of\\_United\\_Nations\\_Associations](https://en.m.wikipedia.org/wiki/World_Federation_of_United_Nations_Associations)



**Ne vin kunligu al la tiel nomataj  
“sociaj aperitivoj”, kiuj kaŭzas bedaŭrindajn  
procesojn de alkoholismo, nek adoptu  
la pozicion de fumanto, kiu ŝajnas al vi  
distingebla kaj eleganta, sed kondukas  
al la ĉenoj de mortiga tabakismo.**

## LA ARKITEKTURAJ TRADICIOJ DE UZBEKIO TRA LA OKULOJ DE JAPANA FOTISTO

Anatolij Ionesov – *Samarkando, Uzbekio*




Japana profesia fotisto Jin Akino en Samarkando (Foto de Anatolij Ionesov)

Samarkando, Buĥaro, Ĥiva kaj Ŝāhrisabz listigitaj en la registro de monda heredaĵo de Unesko. Ĉirkaŭ triono el publikigitaj fotoj estis faritaj en Samarkando. Kaj ne hazarde, la kovrilon de tiu ĉi arta eldonaĵo ornamas la bildo de unu el la maŭzoleoj de la memora komplekso Ŝahi-Zinda. La albumo ankaŭ liveras utilajn informojn por turistoj kaj vojaĝantoj pilgrimantaj al Uzbekio: historiajn faktojn, fotoilustraĵojn, mapon kaj praktikajn konsilojn por fotado de ĉiu arkitektura objekto

En Japanio aperis nova fotoalbumo “Uzbekio: Momentoj de tradicia kulturo” de japana majstro de fotografio Ĝin Akino. Ĝi estas la unua artstila albumo en Japanio, eldonita en la ĝenro de fotolibro, specife dediĉita al la uzbecka tradicia arkitekturo per la individua rigardo de japana profesia fotisto.

La libro inkludas kolorajn fotojn de vidindaĵoj de la antikvaj urboj



Kovrilo de la fotoalbumo de Jin Akino (Foto de Jin Akino)

prezentita en la libro kaj ligita kun la retejo per QR-kodo. Tiu ĉi ret-bazita akompanado ebligas al la enhavo esti konstante ĝisdatigata.

La kovrilon de la albumo artisme dezajnis Elena Popova el Samarkando (Uzbekio). La fotolibro aperis en kvar lingvoj – angla, rusa, uzbeka kaj japana, kio signife plivastigas la geografian distribuon de tiu ĉi eldonaĵo, konatigante diverslandajn legantojn kun multjarcentaj arkitekturaj tradicioj de Uzbekio.

La fotolibro kvazaŭ resumas multjaran kreivan agadon de la fotomajstro en Uzbekio kaj ĝi fariĝis iuspeca amdeklaro de la aŭtoro al la arkitekturaj belaĵoj de nia regiono. La japana fotisto trovas neatenditajn vidangulojn kaj uzas diversajn neordinarajn metodojn de fotado por demonstri la majestecon kaj fajnecon de la senmortaj kreaĵoj de mezepokaj arkitektoj. Ja ĝuste la popolaj tradicioj faras la kulturon rekonebla, sed en ĉiutaga vivo multo ne estas rimarkata, multo estas perdata kaj forgesata. La neripetebaj momentoj ofte forvi-



Jin Akino kun samarkanda dezajnistino Elena Popova kaj ŝia patrino (Foto de Anatolij Ionesov)

ŝiĝas el memoro, pasante preter ni kaj senspure malaperante. Intertempe, ĉiu momento estas grandvalora, ĉar el inter malfacile rimarkeblaj epizodoj kaj momentoj, interŝanĝanta unu la alian, formiĝas la granda homa vivo, plena je emocioj, beleco, amo, malkovroj kaj ĉarmo. Tamen, kiom da tiaj momentoj estas nerevenigeble por ni perditaj? Kaj nur la lenso de fotilo kaj la majstreco de fotisto povas haltigi por ni tempon kaj ebligi al ni enrigardi la okulojn de eterneco, kaj sekve bildigi kaj rehavigi al ni tion, kio ŝajnus esti por ĉiam perdita.

Mi iom konatigu la legantojn de la Almanako kun kelkaj biografiaj eroj de la japana fotomajstro: Ĝin Akino naskiĝis en 1970 en urbo Fukuoka. Li diplomiĝis pri ekonomiko ĉe la Tokia Universitato kaj poste komencis sian karieron kiel sendependa fotisto. Li provis sin ankaŭ en aliaj laborkampoj. Lia fotoarta kreado



Samarkando (Foto de Jin Akino)

estas ĉefe koncentrita je naturo, arkitekturo kaj kulturo de la landoj situantaj sur la Granda Silka Vojo. La fotisto estis premiita en la internaciaj konkursoj *International Photography Awards* (Usono), *Le Prix de la Photographie de Paris* (Francio) ktp. Li prezentis siajn fotojn ĉe diversaj kulturaj eventoj, same kiel en paperpresitaj kaj elektronikaj amaskomunikiloj. Ĝin Akino partoprenis la projekton *Digital Silk Road Project*, realigatan de Unesko kaj de la Japana Nacia Instituto pri Informadiko por krei ciferecajn arkivojn de kultura heredaĵo sur la Silka Vojo. En 2007, lia fotoekspozicieto “La Vojaĝo al la Arkitektura Beleco de Samarkando” preskaŭ samtempe funkciis en Samarkando kaj Tokio dediĉe al la 2750-jara jubileo de la “Romo de la Oriento”. La verkoj de la majstro estis eksponataj en lia persona fotoekspozicio “La Koloroj kaj Formoj en la Historio de la Granda Silka Vojo: La Urboj-Perloj de Uzbekio kiel Parto de Monda Heredaĵo de Unesko” (2008) en la Samarkanda Ŝtata Muzeo pri Historio de Kulturo de Uzbekio kaj en la VII-a Taŝkenta Internacia Fotobiennale (2014). Jam de jaroj Ĝin Akino estas partoprenanto de la enciklopedia projekto “Samarkandiana” kaj de la kreiva iniciato “Belo Savos la Mondon” realigataj de samarkandaj esperantistoj. Li loĝas en urbo Funabaŝi, gubernio Ĉiba. Dum pli ol jardeko li instruas fotoarton en sia propra (privata) lernejo en Tokio.

De sur la paĝoj de sia fotolibro, Ĝin Akino invitas legantojn al la dialogo per eta epigrafo: *“Historio, tradicio kaj nia ĉiutaga vivo estas serio de unikaj momentoj, kiuj ofte preterpasas nin, forviŝiĝas el nia memoro... Nur enpenŝiĝu, kiom da tiaj momentoj estas nerevenige por ni perditaj?”*.



Dum la prezentaĵo de la fotoalbumo en Samarkando. (Foto de Anatolij Ionesov)

La prezento de la nova fotoalbumo de Ĝin Akino okazis somere 2019 en la galerio de Madraso Tilla-Kari sur la Placo Regista, en Samarkando. Lokaj muzeaj funkciuloj, artistoj, ĵurnalistoj, historiistoj, reprezentantoj de la regiona turisma departemento kaj de publikaj organizoj venis al la libroprezento por renkonti kaj bonvenigi la gaston el la lando de leviĝanta suno.

Kiel rimarkigis Ĝin Akino: *“Samarkando estas la urbo, kie mi komencis mian fotadon en Uzbekio. En 2008, danke al mia partopreno en la enciklopedia projekto “Samarkandiana”, mi havis la ŝancon okazigi mian personan fotoekspozicion en la Samarkanda Ŝtata Muzeo pri Historio de Kulturo de Uzbekio... La albumo estas*



Jin Akino dum la libroprezento. (Foto de Anatolij Ionesov)



Jin Akino montras sian fotoalbumon al televidjurnalistino en Samarkando (Foto de Anatolij Ionesov)

*rezulto de mia pli ol 12-jara fotado en Uzbekio. Mi pensas, ke mi ne povus sole prepari kaj publikigi ĝin. Por mi gravas, ke mia fotolibro estas frukto de komunaj klopodoj de la kolegoj el Uzbekio kaj Japanio. Mi tutkore dankas ĉiujn, kiuj helpis min en la laboro pri tiu ĉi eldona projekto. Mi esperas, ke la amikeco kaj kunlaboro inter niaj landoj daŭre disvolviĝos kaj plifortiĝos. Fotado kutime estas ege soleca laboro, en kiu oni devas esti konstante ege koncentrita por ĝustatempe trovi kaj ne preteratenti la plej trafan momenton por bildigi foje nevideblajn aŭ malfacile distingebajn objektojn. Sed, aliflanke, danke al mia fotolaboro, mi povis konatiĝi kun multaj homoj en Uzbekio kaj establi kun ili fruktodonan*

*kunlaboron. Al mi estus interese ekscii, kiu(j)n sento(j)n spertos la leganto, kiam li/ŝi malfermos mian fotolibron? Kiajn imagaĵojn kaj asociiĝojn ligitajn al la kultura tradicio li/ŝi havos?”.*

Dum la prezentaĵo, Ĝin Akino detale rakontis, forme de la lumbild-prelego, pri la novaperinta albumo kaj ties koncepto, pri la fotoj publikigitaj en tiu ĉi eldonaĵo. Li ankaŭ donis praktikajn konsilojn al lokaj amatoraj fotistoj kaj demonstris, kio estas la matrica QR-kodo kaj kiel ĝi funkcias.

La evento okazis kadre de la enciklopedia projekto “Samarkandiana” dediĉe al la Internacia UN-Jardeko pri Proksimigo de Kulturoj.




Ankaŭ menciindas, ke aŭguste 2019, la librolanĉo de la nova fotoalbumo de Ĝin Akino okazis en la art-galerio NIW, en Tokio.

Jin Akino en la tradicia uzbeka vesto  
(Foto de Anatolij Ionesov)



Urbo Buĥaro



Urbo Ĥiva



Samarkando



Samarkando



Uzbekaj tapishoj

Fotoj de Jin Akino



## KLARIGOJ DE LA MAJSTRO

Meze de edifa konversacio, Sara, la edzino de Benjamenino, la kaprobredisto, aŭdinte komentojn fare de la Majstro Jesuo-Kristo, dum mildaj interpretadoj en la hejmo de Kapernaumo, kun ravitaj okuloj pro la novaj revelacioj, demandis:

- La ideo pri la Regno de Dio en niaj vivoj estas vere sublima. Tamen, kiel familiariĝi kun ĝi? Ni ade akompanas la predikojn ĉe la lago, kaj ni scias, ke la Bona-Novajo konsilas, super ĉio, amon kaj pardonon... Mi dezirus esti fidela al tiuj principoj, sed mi sentas min forte ligita al malnovaj normoj. Mi ne sukcesas senkulpigi tiujn, kiuj min ofendas, mi ne komprenas vivon, en kiu ni ŝanĝas niajn avantaĝojn per aliulaj intereso, mi amas miajn havaĵojn kaj mi estas ĵaluza pri ĉio, kion mi akceptas kiel mian proprajn.

La sinjorino konfesadis kun simpleco, malgraŭ la desapontita rideto de iu, kiu trovas obstaklojn preskaŭ nevenkeblajn.

- Por tio \_ intervenis Petro – estas ne malhaveble la bonvolo.
- Kun fido je Nia Ĉiela Patro – diris la edzino de Simono – ni trapasos la plej amarajn embarasojn.

En ĉiuj kunestantoj vidiĝis netrankvila espero, koncerne la elparolon de la Sinjoro, kiu, tuj post longa silento, komentis:

- Sara, kiu estas la plej grava laboro en via domo?
- Estas la kaprobredado – ŝi reiris kurioze.
- Kion vi faras por konservi la lakton neŝanĝebla kaj pura por la hejmprofito?

- Sinjoro, antaŭ ĉio, estas nepre necese lavi singarde la vazon, en kiun ĝi estos enverŝata. Se iu ajn putrorestaĵo restas en la amforo, baldaŭ la tuta likvaĵo acidiĝas kaj jam ne utilos por la plej delikataj uzoj.

Jesuo ridetis kaj klarigis:

- Tiel estas la ĉiela revelacio en la homa koro. Se ni ne purigas la vazon de l'animo, la kono, kvankam supera, intermiksiĝas kun la malpuraĵoj de nia interno, *kvazaŭ degenerante, malpliigante la kvanton da bonaĵoj, kiujn ni povus rikolti*. Fakte, Moseo kaj la Profetoj estis kuraĝaj portantoj de Diaj Mesaĝoj, sed la idoj de la Elektita Popolo ne sufiĉe purigis la vivan ujon de l' spirito por ilin ricevi. Kaŭze de tio, niaj nuntempuloj estas samtempe justaj kaj maljustaj, kredemaj kaj malkredemaj, bonaj kaj malbonaj. La pura lakto de la altaj lumigoj penetras la koron, kiel nova nutraĵo, sed tie intermiksiĝas kun la rustaĵo de l' malnova egoismo. El la renoviga laboro de l' animo restos, do, la vinagro de la nekompreno, prokrastante la efektivan laboron de la Regno de Dio.

Kortuŝite kaj silente, la malgranda kunvenantaro en la vizitoĉambro de Petro ricevis la subliman kaj simplan lecionon.

Tamen, la majstro, stariĝante kun diskreto kaj humileco, karesis la harojn de la sinjorino, kiu Lin alparolis, kaj bonkore konkludis:

- La roso sur hela lilio estas ĉiela diamanto, sed, sur la polvo de la vojo estas kotguto. Ne forgesu ĉi tiun simplan kaj klaran veraĵon de la naturo.

El la libro *Jesuo en la hejmo*, diktita de la Spirito Néio Lúcio kaj psikografiita de la mediumo Francisco Cândido Xavier. Eldono de Brazila Spiritisma Federacio. Esperantigita de Jader Rodrigues da Silva.

## LA NAZIOJ KAJ ESPERANTO

Ulrich Lins – *Germanio*



Malfermo de la 25-a UK en Kolonjo, fine de julio 1933. Parolas la nazia urbestro Günter Riesen

En la somero de la jaro 1932 estis decidite, ke la venonta Universala Kongreso (UK), la 25-a, okazu en la germana urbo Kolonjo. Invitis la urb-estro mem, Konrad Adenauer. Tuj eklaboris Loka Kongresa Komitato (LKK), kiu same kiel Germana Esperanto-Asocio (GEA) antaŭĝojis pri la evento kaj esperis, ke ĝi altiros proksimume du mil partoprenantojn.

Sed baldaŭ regis necerteco kaj timo. Fine de januaro 1933, Adolf Hitler iĝis kanceliero; nazioj gajnis potencon. Ĉiuj amikoj de Esperanto en Germanio sciis, ke en sia libro *Mein Kampf* Hitler atakis Esperanton, nomante ĝin lingvo de judoj. La nazia gazetaro per multaj malbelaj artikoloj kontraŭstaris la planon organizi mondan Esperanto-kongreson en Kolonjo. La maltrankviliĝo kreskis, kiam Adenauer en marto estis eksigita de la nazioj. Esperantistoj en eksterlando rimarkis la ŝanĝiĝintan situacion, kaj multaj ne plu volis vojaĝi al Germanio. En junio 1933, la Komitato de UEA eĉ diskutis la demandon, ĉu nuligi la kongreson.

La novaj regantoj anoncis, ke gastoj el eksterlando ne timu ĝenon. La semajna gazeto *Heroldo de Esperanto* aperanta en Kolonjo klopodis trankviligi la esperantistojn, dum la eksterlanda gazetaro multe raportis pri la unuaj agoj de subpremo kontraŭ judoj kaj komunistoj; *Heroldo* esprimis la esper-plenan opinion, ke la kongreso utilos al la germana Esperanto-movado.

Heroldo de Esperanto



## KOLONJO, KRON' JUVELA EL URBOJ LA PLEJ BELA

(LAŬ MALNOVA SENTENCO)

La Ĉefurbestro de la Urbo Kolonjo, Dr-ro h. c. Konrad Adenauer, Prezidanto de la Prusa Stata Konsilantaro:

**M**i gojas, ke mi havas okazon, per tiu ĉi vojo transdoni al la Universala Kongreso de Esperanto en Parizo miajn plej bonajn salutojn kaj bondezirojn por sukcesplena laboro. La celadoj, per la vivanta parolo de la lingvo konstrui ponton de popolo al popolo kaj krei interkomprenilon en la laŭlitera senco de tiu ĉi vorto, meritas plej viglan subtenon kaj akcelon. La esperantistoj ĉiulandaj, en sia klopodo krei mondlingvon, jam atingis grandajn sukcesojn, pro kiuj mi sincere gratulas. Mi gojas kaj estas dankema pro tio, ke la Jubilea Kunveno de la Universala Kongreso de Esperanto en la venonta jaro okazos en Kolonjo. Kolonjo, kiu tra jarcentoj estas la tradicia kultura ponto inter oriento kaj okcidento, estas ĉiel taŭga por digne kaj gastame akcepti inter siaj muroj tian kunvenon de homoj mondkomprenemaj kaj laborantaj por reciproka interkompreniĝo. El tuta koro mi tial prezentas jam hodiaŭ al la Universala Kongreso de Esperanto mian bonven-saluton kaj tiun de la urbo Kolonjo, fidele esperante, ke la alproksimiĝo de ĝi al la resaniĝo de ĝi tutmonda ekonomio ĝis tiam decide progresos.

Kolonjo, la 14-an de julio 1932.

Konrad Adenauer invitas la kongreson al Kolonjo. La postan jaron li estos eksigita de la nazioj. (Germana Esperanto-Biblioteko, Aalen)

Fine de julio komenciĝis la UK, kun nur 900 kongresanoj. En la kongresmalfermo parolis la nova, nazia urb-estro. Li aperis en bruna ĉemizo, kun svastikaj flagoj ĉirkaŭe. La vorton “Esperanto” li ne diris, sed nur esprimis sian kontenton, ke la multaj eksterlandanoj ĉeestantaj en la salono de nun povos raporti, ke en Germanio regas ordo.

Poste okazis la jar-kunveno de GEA. Ĝi akceptis novan statuton, en kiu ne plu estis skribite, ke la asocio estas politike neŭtrala. Judoj kaj komunistoj ne plu rajtos proponi sin por gvidaj oficoj en la asocio. Multaj germanaj esperantistoj ne estis kontentaj, tamen ili konsentis, kontraŭvole, akcepti tiajn limigojn por daŭrigi la laboron por Esperanto. Kelkaj opiniis, ke necesas plene akcepti la nazian politikon. Aperis Esperanta traduko de parolado de Hitler, kaj eĉ stariĝis “Nova Germana Esperanto-Movado”, kiu celis uzi Esperanton por popularigi la nazian ideologion eksterlande.

Ĉio ĉi ne helpis. Kiel ni nun scias, la germana polico tre atente observis la Esperanto-movadon (ĝi havis spionon kun scio de la lingvo) kaj en 1936 ĝi konsilis, ke GEA “liber-vole” malfondu sin. Rezulte, ekde la 20-a de junio 1936 ne plu eblis labori por Esperanto en Germanio. Eĉ pli frue, en aŭgusto 1935, la nazia Esperanto-movado jam devis ĉesigi sian agadon. La nazia registaro opiniis, ke ĉia ligo de Esperanto kun la nazia ideologio estas ne nur malakceptebla, sed punenda.


### Pri la verkinto

**Ulrich Lins** estas germana historiisto. Li verkis la libron *La danĝera lingvo*, kiu temas pri persekutoj kontraŭ Esperanto precipe en Germanujo kaj Sovetunio.

### Novaj vortoj

**judo:** membro de religia grupo, kiu nun loĝas ĉefe en Israelo, sed ankaŭ en multaj aliaj landoj.





**svastiko:** signo uzata en hinduismo (hinda religio), sed ankaŭ de la germanoj inter 1933 kaj 1945.

Bildo: MennasDosbin CC BY-SA 4.0



uea.facila  
FACILAJ ARTIKOLOJ EN ESPERANTO


El uea.facila



**Horo malplena estas ĉiam danĝera mensa spaco.**

**Donacu ĝin al via proksimulo, al ia ajn societo  
aŭ asocio, kiu sin dediĉas al bonfaro  
kaj konstruo de vivoj.**





INTERVJUO

## Renato Corsetti

Italio

### 1 – Kiu estas Renato Corsetti? Kie vi naskiĝis, familio, profesio...?

Mi naskiĝis en Romo la 29-an de marto 1941 en laborista familio. Mia patro estis ŝoforo kaj mia patrino dom-mastrino. Mi unue studis en la universitato de Romo ekonomion kaj laboris en banko dum la unua parto de mia vivo. Poste, dum la dua parto, mi studis lingvistikon kaj laboris en la universitato de Romo.



Renato inter unu kaj du jaroj

### 2 – Kiam, kie kaj kial vi interesiĝis pri Esperanto?



Renato, 20-jara

Kiam mi estis juna, mi multe interesiĝis pri lingvoj. Unu el miaj instruistoj volis, ke mi iĝu instruisto de la latina, alia en la universitato volis, ke mi iĝu instruisto de la franca. Nature mi renkontis Esperanton en mia legado pri lingvoj. La unua puŝo konkreta al Esperanto venis al mi, kiam mi dum la 50-aj jaroj de la pasinta jarcento partoprenis tendaron de junaj katolikoj en Germanujo kaj mi ricevis flugfolion pri Esperanto de loka esperantisto [loka stultulo nomis lin la estro de la tendaro]. Mi konservis tiun folion kaj proksimume en 1960 hazarde vidis lernolibron de Esperanto en roma librovendejo. Mi aĉetis



ĝin kaj memlernis la lingvon. Poste mi bezonis kelkajn jarojn por trovi la romajn esperantistojn. Ĉiuokaze la ĉefa kialo por interesiĝi pri Esperanto estis la interesiĝo pri lingvoj.

### 3 – Kion reprezentas Esperanto por via vivo?

Ĉion. Se la unua motivo estis lingva, la dua estis politika. En la 60-aj jaroj estis en Eŭropo la studentaj ribeloj, kaj mi tuj kaptis la ideon, ke Esperanto estas ilo por justeco en la kampo de lingvoj, ke ĝi estas faktoro por plibonigi la mondon. Kaj tiu ideo restis ĉe mi la tutan vivon. Eble mi devas diri, ke mia unua gepatra lingvo ne estis la itala, sed dialekto de la itala. Eble pro tio mi estis preta kompreni iom plie la situacion de homoj, kiuj ne parolas la grandajn oficialajn lingvojn.



La soldato Renato, 24-jara



Renato kaj la filo Gabrielo

#### 4 – Kiujn funkciojn vi okupis en la E-medio?

Mi faris ĉion de sekretario de la loka grupo al prezidanto de TEJO kaj same en la plenkreska movado mi laboris loke, lande kaj internacie.



Estraro de Universala Esperanto-Asocio en aprilo 2005. De maldekstre: Ulla Luin, Maritza Gutiérrez González, Renato Corsetti, Ans Bakker-ten Hagen, Claude Nourmont, Yu Tao, Amri Wandel

#### 5 – Kion vi povas diri pri via periodo en la prezidanteco de UEA?

“Reĝino, vi ordonas, ke mi parolu pri neparolebla doloro” diras Eneas al la reĝino Didono, kiu petas lin rakonti pri la falo de Trojo laŭ la poemo Eneido. Tion mi diras al vi.

Mi estis kontenta esti prezidanto de UEA kaj pensis, ke mi povas ŝanĝi la mondon, sed mi ne povis kaj mia plej granda malsukceso estis ke mi ne sukcesis interesi la strukturojn de UEA pri Esperanto, alivorte pri la disvastigo de

Esperanto kaj de ĝiaj valoroj tra la mondo. La granda deziro tiam en UEA estis zorgi pri la Esperanto-parolantaro kaj vendi al ili servojn kaj varojn, kaj tion mi ne sukcesis ŝanĝi. La sekvo estis, ke UEA daŭre perdis pli da membroj kaj iĝis pli kaj pli margena en la movado ĝis la nunaj financaj problemoj. Esence mia generacio transprenis vivantan asocion de la antaŭa generacio kaj kapablis nur detrui ĝin kaj oni ankoraŭ nun ne komprenas kie estas la kerna problemoj.



Universala Kongreso de Esperanto, Roterdamo 2008. Eksprezidanto Renato Corsetti dum "Estraro respondas"

## 6 – Ĉu okazis al vi iu kuriozaĵo en Esperanto-komunumo?

Mi ne havas apartan kuriozaĵon por rakonti. Mi daŭre ĝuis ĉiun aspekton de la Esperanto-mondo kaj mi amikiĝis kun la plej malsamaj esperantistoj de Moskvo al Hindujo. La Esperanto-mondo estas plena je admirindaj homoj.



Renato kaj polaj esperantistoj en Torun, IJK 1972

## 7 – Kiujn librojn vi rekomendus al niaj legantoj? Ĉu vi mem estas aŭtoro de libro(j)?

La librojn de Claude Piron kaj la librojn de mia edzino, Anna Lowenstein, ĉar ili estas interesaj kaj verkitaj en klara Esperanto.

## 8 – Se vi povus reveni en la tempon, ĉu vi farus ĉion denove pri Esperanto? Kial?

Jes, ĉar mi estas konvinkita, ke per Esperanto oni kontribuas al pli bona mondo en la kampo lingva-kultura.



De maldekstre Fabiano, Renato, Gabrielo kaj Anna

## 9 – Ĉu vi ne povus iom rakonti pri via familio?

Jes, certe. Nuntempe mia familio en mallarĝa senco konsistas nur el du maljunaj geedzoj: mia edzino kaj mi. Niaj filoj vivas kaj laboras eksterlande. Bonŝance la tuta familio parolas Esperanton, kaj tio estas plia motivo por familia unueco.

## 10 – Kion vi ŝatas fari dum libera tempo?

Promeni kaj pensi.

**11 - Kiom da idiomoj vi parolas?**

Mi parolas la italan kaj Esperanton. Bone mi legas la anglan, la francan la hispanan. Malfacile mi legas la germanan kaj la portugalan. Mi havas supraĵan konon de aliaj lingvoj.

**12 – Viaj planoj kaj revoj por la estonteco?**

Vidi la Esperanto-movadon marŝi antaŭen fiere.

**RAPIDAJ PENSOJ****Dio**

Dio ekzistas en ni, en nia konscio pri ni mem, pri la aliaj, pri la mondo.

**Amo al la proksimulo**

Ĝi estas la ĉefa ordono en ĉiuj religioj. Ĉio cetera estas nur aldonaĵoj.

**Interna ideo de Esperanto**

Ĉiuj homoj kaj ĉiuj kulturoj estas samvaloraj kaj same indaj je konsidero. Celu pacon, dialogon kaj toleremon. Oni devus multe pli instrui ĝin kune kun la lingvo.

**Universo**

Mirinda kreaĵo, se dio ne kreis ĝin, la afero estas ankoraŭ pli mirakla.

**Kion vi bezonas por esti feliĉa?**

Manĝi en itala restoracio.

**Virto kiun vi plej ŝatas?**

La instruistino, pri kiu parolis Zamenhof en unu el siaj inaŭguraj paroladoj, kiuj aĉetis malmultajn manĝaĵojn por povi provizi sin pri informiloj pri Esperanto.

**Malvirto kiun vi plej malŝatas?**

Aroganteco kaj perforto.

**Homo**

Hektoro en la poemo Iliado.

**Ŝatata frazo**

La azena ŝarĝo ekvilibriĝas dum la irado = Estas senutile detale plani, prefere oni korektu la misojn dum la plenumado de aferoj. Kampana proverbo en mia denaska dialekto.

**Ŝatataj verkistoj**

Claude Piron kaj Anna Lowenstein, mia edzino. Nazim Hikmet kaj Konstantino Kavafis en naciaj lingvoj.

**Ŝatataj poetoj**

Nazim Hikmet kaj Konstantino Kavafis.

**Ŝatata komponisto**

Mozart.

**Kiun specan muzikon vi plej ofte aŭskultas?**

Italajn popolajn kantojn.

**Paco**

La ĉefa celo de Zamenhof, kiu devus esti la ĉefa celo de la homaro.

**Preferataj ŝatokupoj**

Apenaŭ ekzistas krom Esperanto kaj lingvolernado.

**Universala Kongresoj de Esperanto**

Mi partoprenis tro multajn pro mia aĝo sed ili ĉiam estas portantoj de novaj amikecoj.

**Eldonejo Lorenz**

Unu el la plej grandaj Esperanto-agantoj, vera kolono de nia kulturo. Ĝi provas transdoni spiritan mesaĝon malfacile kompreneblan de nuntempaj homoj.

**Vivo**

La plej granda afero de homoj. Oni utiligu ĝin por plibonigi la mondon, en kiu oni naskiĝis.

**Zamenhof**

Homo, kiu bone utiligis sian vivon.

**Konkludaj vortoj**

Dankon pro la intervjuo!



Probal Dasgupta, Nelida Weidmann, Renato Corsetti



La Universala Kongreso de Esperanto, Gotenburgo 2003. Kunsido de la Eŭropa Esperanto-Unio. De maldekstre Renato Corsetti, Sean O'Rian, David Ferguson (nun Daffyd ap Iago), Etsuo Miyoshi kaj Marko Lin



Estraro de Universala Esperanto-Asocio, aprilo 2004, antaŭ la Centra Oficejo. De maldekstre Andrej Grigorjevski, Humphrey Tonkin, Renato Corsetti, Lee Chong-Yeong, Ans Bakker, ĝenerala direktoro Osmo





Renato Corsetti prelegas dum la 44a Malferma Tago en la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio



Renato kaj edzino, Anna Lowenstein.



**Kion vi faras al la aliaj, tio ĉiam revenos al vi.**

**La semado postvenas al la rikolto.**

**Vi rikoltos laŭ tio, kion vi semas.**



## FELIĈAJ TIUJ, KIUJ ESTAS MILDAJ KAJ PACAMAJ

Allan Kardec – Francio



### OFENDOJ KAJ PERFORTOJ

*Feliĉaj estas la humilaj, ĉar ili heredos la teron (Mateo, 5.5).*

*Feliĉaj estas la pacigantoj, ĉar filoj de Dio ili estos nomataj (Mateo, 5.9).*

*Vi aŭdis, ke estas dirite al la antikvuloj: Ne mortigu, kaj kiu mortigos, tiu estos en danĝero de juĝado; sed mi diras al vi, ke kiu koleras kontraŭ sia frato, tiu estos en danĝero de juĝado; kaj kiu diros al sia frato: Raka, tiu estos en danĝero de sindrio; kaj kiu diros: Malsaĝulo, tiu estos en danĝero de Gehena de fajro (Mateo, 5.21, 22).*

Per ĉi tiuj maksimumoj Jesuo faras leĝon el dolĉeco, el mildeco, el afableco kaj el pacienco; li do kondamnas perforton, koleron kaj eĉ ĉian malĝentilan esprimon de iu kontraŭ siaj similuloj. Raka estis ĉe la Hebreoj malŝata vorto, kiu signifis *sentaĝulo*, kaj kiun oni ekparolis kraĉante kaj flanken turnante la kapon. Lia parolo estas ankoraŭ pli severa, ĉar li minacas per la fajro de l' infero ĉiun, kiu diros al sia frato: malsaĝulo.

Estas evidente en tio, kiel en ĉiuj cirkonstancoj, ke la intenco pligravigas la kulpon; sed kial simpla parolo povas havi tian gravecon, ke ĝi meritis tian severan malaprobbon? Tial, ke ĉia ofenda vorto esprimas senton kontraŭan al la leĝo de amo kaj de karitato, kiu devas regi la interrilatojn de la homoj kaj teni inter ili konkordon kaj unuecon; estas atenco kontraŭ la reciproka bonvolemo kaj la frateco; nutras malamon kaj malfavoremon; fine tial, ke post la humileco antaŭ Dio, la karitato al la proksimulo estas la unua leĝo de ĉiu kristano.

## LA VENĜO

La venĝo estas unu el la lastaj restaĵoj de la barbaraj moroj, kiuj iom post iom forviŝiĝas el inter la homoj. Ĝi estas, kune kun la duelo, unu el la lastaj postesignoj de tiuj sovaĝaj moroj, sub kiuj baraktis la homaro ĉe la komenco de la kristana epoko. Tial la venĝo estas certa signo de la neprogresinta stato de la homoj, kiuj ĝin praktikas, kaj de la Spiritoj, kiuj povas ankoraŭ inspiri ĝin.

Do, miaj amikoj, tiu sento neniam devas vibrigi la koron de iu ajn, kiu diras kaj deklaras sin spiritisto. Venĝi estas, vi tion scias, tiel kontraŭa al tiu preskribo de la Kristo: "Pardonu viajn malamikojn!", ke tiu, kiu rifuzas pardoni, ne nur ne estas spiritisto, sed ankaŭ ne estas kristano. La venĝo estas inspiro des pli pereiga, ĉar la falseco kaj la malnobleco estas ĝiaj konstantaj akompanantoj.

Efektive, kiu forlasas sin al tiu fatala kaj blinda pasio, tiu preskaŭ neniam venĝas malkaŝe. Se li estas la pli forta, li ĵetas sin kiel rabobesto sur tiun, kiun li nomas sia malamiko, kiam la vido de tiu flamigas lian pasion, lian koleron kaj lian malamon. Sed plej ofte li kovras sin per hipokrita ŝajno, kaŝante en la fundo de sia koro la malbonajn sentojn, kiuj lin animas; li ekprenas malrektajn vojojn, sekvas en la ombro sian malamikon, kiu nenion suspektas, kaj atendas la taŭĝan momenton, por sendanĝere frapi; li sin kaŝas de sia kontraŭulo kaj ĉi tiun senĉese spionas; li faras abomenajn kaptilojn kaj en oportuna momento verŝas venenon en lian kalikon.

Kiam lia malamo ne iras ĝis tiaj ekstremoj, li atakas sian viktimon en ties honoro kaj korinklinoj; li ne hezitas eĉ antaŭ la kalumnio, kaj liaj perfidaj sugestoj, lerte disemitaĵoj per ĉiuj ventoj, iom post iom amasiĝas sur la vojo. Sekve, prezentante sin en la lokoj, kie pasis la venena blovado de la hipokritulo, la persekutato miras, tie trovante nur malvarmajn vizaĝojn, kie li antaŭe vidadis amikajn kaj bonvolemajn mienojn; li konsterniĝas, kiam la manoj, kiuj iam serĉadis la lian, nun rifuzas ĝin premi; fine li sentas sin neniigita, vidante, ke liaj plej karaj amikoj kaj parencoj deturniĝas de li kaj lin evitas. Ha! La fiulo, kiu tiel venĝas, estas centoble pli kulpa, ol tiu, kiu alfrontas sian malamikon kaj lin insultas rekte en la vizaĝon.

For do tiujn sovaĝajn kutimojn! For tiujn morojn de aliaj tempoj! Ĉiu spiritisto, kiu pretendus hodiaŭ havi la rajton venĝi, ne indus plu esti ano de la falango, kiu prenis kiel devizon: “Ekster karitato, nenia savo!” Sed ne, mi ne povus reteni min ĉe la penso, ke iu membro de la granda spiritista familio iam kuraĝos atenti pri ricevita ofendo, krom por pardoni. (Julio Olivier. Parizo, 1862.)

## LA MALAMO

Amu unuj aliajn, kaj vi estos feliĉaj. Prenu precipe kiel taskon ami tiujn, kiuj inspiras al vi indiferentecon, malamon kaj malŝaton. La Kristo, kiun vi devas fari via modelo, donis al vi ekzemplon de tiu sindonemo; misiisto de amo, li amis en tia grado, ke li fordonis sian sangon kaj sian vivon. La ofero, kiu vin devigas ami la homojn, kiuj vin insultas kaj persekutas, estas dolora; sed ĝuste ĝi lokas vin super ili; se vi ilin malamus, kiel ili malamas vin, vi ne valorus pli ol ili; tia amo estas la senmakula hostio, kiun vi oferas al Dio sur la altaro de viaj koroj, hostio de agrablaodoro kaj kies parfumo suprenflugas al Li. Kvankam la leĝo de amo ordonas, ke ĉiu amu sendistinge ĉiujn siajn fratojn, ĝi tamen ne kirasas la koron kontraŭ la malbonaj agoj; ĝi, kontraŭe, trudas la plej doloran provon, kaj mi tion ja scias, ĉar en mia lasta surtera ekzistado mi spertis tian torturon; sed Dio estas ĉie kaj punas en la nuna kaj en la alia vivo tiujn, kiuj malobeas la leĝon de amo. Ne forgesu, miaj karaj filoj, ke la amo proksimigas al Dio, kaj la malamo malproksimigas de Li (Fénelon. Bordeaux, 1861).

## LA DUELO

Vere granda estas nur la homo, kiu, konsiderante la vivon kiel vojaĝon, kiu kondukos lin al difinita celo, preterlasas la malglataĵojn de la vojo; li neniam eĉ dum momento permesas al si deflankiĝi de la rekta vojo; lia rigardo estas konstante turnita al la celo, kaj do nemulte gravas al li, ke rubusujoj kaj dornoj minacas gratvundi lin; ili apenaŭ lin tuŝas, sed ne difektas, kaj li tamen daŭrigas sian iradon. Riski siajn vivtagojn, por venĝi ofendon, estas retroiro antaŭ la provoj de la vivo, estas ĉiam krimo en la okuloj de Dio; kaj se vi ne estus tiel trompitaj,

kiel vi estas, de viaj antaŭjuĝoj, tio estus ridinda kaj grandega frenezaĵo en la okuloj de la homoj.

Estas krimo ĉe la hommortigo per duelo; via leĝaro mem ĝin rekonas; neniu rajtas, en ia ajn okazo, atenci kontraŭ la vivo de sia similulo; ĝi estas krimo en la okuloj de Dio, kiu starigis vian kondutregulon; en la duelo, pli ol en ĉio alia, vi estas juĝantoj en via propra afero. Memoru, ke vi estos pardonitaj nur tiel, kiel vi mem pardonos; per pardono vi alprokisimiĝas al Dio, ĉar pardonemo estas frato de potenco. Dum guto da homa sango, verŝita per mano de la homoj, fluos sur la tero, la vera regno de Dio ankoraŭ ne estos alveninta, tiu regno de pacigo kaj de amo, kiu por ĉiam forpelos de via planedo malamon, malkonkordon, militon. Tiam la vorto duelo ekzistos en via lingvo nur kiel malproksima, nepreciza rememoro pri iu fora pasinteco; la homoj konos inter si nenian alian antagonismon, ol la noblan konkuradon en la farado de la bono (Adolfo, episkopo de Alger. Marmande, 1861).

## LA LEĜO DE AMO

La amo resumas la tutan doktrinon de Jesuo, ĉar ĝi estas la plej altgrada sento, kaj la sentoj estas la instinktoj, levitaj al la nivelo de la plenumita progreso. Ĉe sia deirpunkto, la homo havas nur instinktojn; pli progresinta kaj koruptita, li havas nur sensaciojn; instruita kaj purigita, li jam havas sentojn; kaj la delikatega punkto de la sento estas la amo, ne la amo en la vulgara senco de la vorto, sed tiu interna suno, kiu centrigas kaj kunigas ĉe sia ardanta fokuso ĉiajn aspirojn kaj ĉiajn revelaciojn superhomajn. La leĝo de amo anstataŭigas la personecon per la kunfandiĝo de l' estuloj; ĝi nuligas

la sociajn afliktojn. Feliĉa tiu, kiu, superante sian homecon, amas per larĝa amo siajn dolorfratojn! Feliĉa tiu, kiu amas, ĉar li ne konas angorojn de l' animo, nek de la korpo; liaj piedoj estas malpezaj, kaj li vivas kvazaŭ transportita ekster sin mem. Kiam Jesuo eldiris tiun dian vorton "amo", tiu vorto skuis la popolojn, kaj la martiroj, ekzaltite de espero, malsupreniris en la cirkon.


Spiritismo siavice venas eldiri duan vorton el la dia alfabeto; estu atentaj, ĉar tiu vorto levas la ŝtonon de la tomboj malplenaj, kaj la reenkarniĝo, triumfante

super la morto, revelacias al la homo duonblindigita lian intelektan heredan posedaĵon; jam ne al la turmentoj ĝi kondukas lin, sed al la konkero de lia memo, altigita kaj transfigurita. La sango elaĉetis la Spiriton, kaj la Spirito devas hodiaŭ elaĉeti la homon el la materio.

Mi diris, ke en sia komenco la homo havas nur instinktojn; do tiu, kies instinktoj regas lin, estas pli proksime de sia elirpunkto, ol de la celo. Por antaŭenpaŝi al la celo, la homo devas venki la instinktojn profite de la sentoj, tio estas, perfektigi ĉi tiujn lastajn, sufokante la latentajn ĝermojn de la materio. La instinktoj estas la ĝermado kaj la embrioj de la sento; ili portas en si la progreson, same kiel la glano kaŝgardas la kverkon; la malplej progresintaj estuloj estas tiuj, kiuj, nur iom post iom senvestiĝante de sia krizalido, restas sklavigitaj al siaj instinktoj.

La Spirito devas esti kulturata kiel kampo; ĉia estonta riĉeco dependas de la nuna laboro, kaj pli, ol la surterajn bonojn, tiu laborado alportos al vi gloran altiĝon; kaj tiam, komprenante la leĝon de amo, kiu unuigas ĉiujn estulojn, vi ektrivos la trankvilajn plezurojn de l' animo, kiuj estas la antaŭĝuado de la ĉielaj ĝojoj (Lazaro. Parizo, 1862).

El *La Evangelio laŭ Spiritismo*. Eldono de Brazila Spiritisma Federacio.





**Ne forgesu la personojn, kiuj vivas en situacioj  
pli humilaj kaj malfacilaj ol la viaj.**





## FAMAJ PEDAGOGOJ EN LA VIVO DE HIPPOLYTE LÉON DENIZARD RIVAIL

Przemysław Paweł Grzybowski – Pollando



Allan Kardec

*La principo de pliboniĝo kuŝas en naturo de kredoj, ĉar la kredoj instigas al agoj kaj modifas sentojn; ĝi kuŝas ankaŭ en ideoj enradikigitaj infanaĝe kaj identigitaj kun spirito - same kiel en ideoj, kiujn posta disvolvo de inteligento kaj racio povas nur plifortigi kaj ne detrui. Per edukado do, ankoraŭ multe pli ol per instruado, oni transformos la homaron.*

Allan Kardec

Pri la unuaj jaroj de edukado de H.L.D.Rivail ne konserviĝis certaj informoj. Oni nur povas suspekti, ke en la periodo 1810-1814, pro sia aĝo li partoprenis kursojn de elementa lernejo. Tre probable, precipe nestabila politika situacio de Francio en la periodo 1814-1815, devigis gesinjorojn Rivail sendi sian filon eksterlanden, kie li povus akiri pli vastan edukitecon en trankvilo. Ili elektis la lernejon direktatan de **Johann Heinrich Pestalozzi** en Yverdon, en svisa kantono Vaud.

Inspiris ilin verŝajne la libro "Spirito de la edukmetodo de Pestalozzi, sekvata kaj praktikata en la Instituto de Edukado en Yverdon, en Svislando". Ĝi estis eldonita en 1812 de **Marc-Antoine Jullien de Paris**, kiu dum ses jaroj studis ĝuste en Yverdon kaj kelkfoje helpadis al J.H.Pestalozzi



Pestalozzi

finance. Siatempe li loĝis en Lyon - la naskiĝurbo de H.L.D.Rivail, do povas esti, ke ili konis unu la alian.

M.-A.Jullien de Paris estas agnoskata fama pedagogo. Li naskiĝis en 1775 en Francio. Fininte elementan lernadon li komencis en Anglio studojn pri diplomatio, kaj ekde la 18-a jaraĝo li sekvis militistan karieron, kio estis utila interalie dum la Franca Revolucio. Liaj interesoj estis tre vastaj: ĵurnalismo; verkado; edukistaj aferoj; vojaĝoj tra Egiptio, Germanio, Italio, Nederlando kaj Svislando. En 1794, M.-A.Jullien de Paris estis elektita kiel membro de la Plenumkomisiono



Marc-Antoine Jullien

pri Publika Edukado. En 1817 li eldonis anonime la libron „Skizoj kaj antaŭpreparo al la laboro pri kompara edukado” (poste reeldonitan sub lia nomo, kun ŝanĝita titolo), enhavantan la unuan en la mondo programon de esploroj, celantaj kompari diversajn eduksistemojn, kio gvidus al plialtigo de nivelo de la franca edukado per uzo de la plej bonaj modeloj ekzistantaj en aliaj landoj. Pro tio li estas nomata „la patro de kompara pedagogio”. En tiu ĉi verko M.-A.Jullien de Paris proponis, ke oni kolektu ĉiujn eblajn informojn, kiuj permesos difini kaj priskribi regulojn de instruado kaj edukado - kio helpos pritaksi la eduksistemon ekzistantan en certa lando. Liaj konsideroj aperis danke al profunda pripensado de stato de liatempaj eduksistemoj: „*Ĉiu pensanta homo, kiu observas la staton de moralo en diversaj landoj de Eŭropo, ĉagrenita konstatas, ke edukado, kiun nun ofertas familio kaj publika eduksistemo, estas ofte nekompleta, erara, sen reciprokaj ligo kaj konformeco de ĝiaj sinsekvaj gradoj; sen harmonio inter la fizika, morala kaj intelekta sferoj de edukado, formado de kiuj devus esti submetita al iu komuna celo; fine, ĝi ne respondas al realaj bezonoj de infanoj kaj gejunuloj, same rilate al sociaj postuloj, kaj ankaŭ al bezonoj de nacioj kaj registaroj.*”<sup>1</sup> Bedaŭrinde, pro manko de interesatoj kaj materiaj rimedoj, la plano de M.-A.Jullien de Paris ne estis realigita. En 1818 li kreis la „Enciklopedian

<sup>1</sup> M.-A. Jullien de Paris: *Esquisse d'un ouvrage sur l'éducation comparée*. Bureau International d'Éducation, Genève 1962, p.5.

Revuon”, kaj en 1830 fondis en Parizo kelkajn orfejojn, edukejojn kaj lernejojn por plenkreskuloj. Indas menci, ke H.L.D.Rivail mem uzis la duan eldonon de la verko de M.-A.Jullien de Paris pri la metodo de J.H.Pestalozzi. Ĝi aperis en 1842, do ĝuste en la momento, kiam H.L.D.Rivail mem praktikis la edukarton.

La menciita supre **J.H.Pestalozzi** estis svisa verkisto kaj pedagogo, kiu elpensis programon de progrese disvolvado de homaj fakultoj, samtempe entuziasme propagandante kaj praktikante instruadon al malriĉuloj. Studinte en Zürich teologion, juron, agronomion kaj ĝardenarton, li kreis en Menhof institucion ligitan kun farmbieno, destinitan al orfoj kaj forlasitaj infanoj. En 1799 li laboris kiel instruisto de popola lernejo en Burgdorf, kie li finkompilis originalan metodon de edukado de junaj infanoj. Unu jaron poste J.H.Pestalozzi kreis tie sian propran edukejojn kaj porinstruistan seminarion, kiun oni translokis al Münchenbuhsee kaj Yverdon. Li opiniis, ke ĝusta edukado de homo eblas nur kiam ĝi okazas en la medio libera de individua kaj socia egoismo. Lia opinio, teoria scio havas sian valoron, nur kiam oni scipovas uzi ĝin praktike. Tiuj ĉi reguloj transformis lernejojn en lokon amikan al infanoj. J.H.Pestalozzi atribuis tre gravan rolon al preciza preparo de instruisto (precipe el psikologia vidpunkto), al valoroj de edukado en familio kaj al rolo de virinoj en tiu proceso.

Parolante pri la lernejo en Yverdon, fakte necesus nomi ĝin edukcentro. Ĝia ĉirkaŭaĵo estis belega: pitoreska lago ĉirkaŭata de poplaj aleoj - ĉio instiganta al promenadoj en freŝa aero kaj al naĝekzercoj. En sufiĉe granda kastelo troviĝis mezlernejo por knaboj, instruista seminario kaj instituto por knabinoj. En la seminario disvolvidis siajn kapablojn 188 geinstruistoj el diversaj landoj. Pri graveco de tiu ĉi loko atestas vizitoj interalie de la prusa, la nederlanda kaj la hispana reĝoj kaj de la rusa caro. La centro disvolviĝadis sufiĉe bone, kaj en la periodo 1807-1812 loĝis tie ĉi ĉirkaŭ 200 gelernantoj. Poste la centro komencis faladi: aperis materiaj malfacilaĵoj, inter instruistoj aperis kvereloj. Svisoj (ĉefe katolikaj pastroj) atakadis la direktoron, akuzante lin, ke en mezlernejo li mekanike imitas metodojn de elementaj studoj, kio malaltigas nivelon de edukado. Eksterlandaj gelernantoj ofte havis problemojn kun lernado, ĉar ili ne sufiĉe bone regis la germanan kaj la francan lingvojn, kiuj estis uzataj dum lecionoj. J.H.Pestalozzi ĉagrenita de problemoj kun siaj kunlaborantoj, finfine

forveturis en 1824 al sia centro en Neuhof. Unu jaron poste, la lernejo en Yverdon estis fermita. Ĝia kreinto mortis malsana kaj tute forgesita en 1827.

En la enkonduko al la „Praktika kaj teoria kurso de aritmetiko, laŭ la principoj de Pestalozzi, kun modifoj” aperinta en 1823 jaro, jam post la morto de J.H.Pestalozzi, H.L.D.Rivail tiel aludis pri sia majstro: „*Li okupiĝis pri infano tuj, kiam ĝi forlasis la brakojn de naturo, por akompani ĝin en ĝia evoluo. Li observadis la manieron, en kiu disvolviĝadis ĝiaj imagoj, studadis ĝiajn bezonojn kaj kapablojn. Sekve, surbaze de pluraj observoj li kreis metodon, kiu strebas precipe al utiligado de ĉiuj kapabloj, kiujn la infano ĉerpis el naturo, kio permesos al ĝi ĝuste taksu realecon kaj akiri kutimon de ordigado de siaj imagoj.*”<sup>2</sup> Li skizis ankaŭ la ĉefajn regulojn de la metodo de J.H.Pestalozzi:

1. *Formi ĉe infanoj naturan observosentumon, direktante ilian atenton sur la objektojn, kiuj ilin ĉirkaŭas.*
2. *Formi inteligentecon, akompanante lernanton survoje al memstara malkovrado de reguloj.*
3. *Ĉiam transiri de konata al nekonata, de afero simpla al komplika.*
4. *Eviti ĉiun mekanikecon, danke al klarigado al lernanto pri la celo kaj kialo de ĉio, kion li faras.*
5. *Kontroli, ke li esploru per fingro kaj okulo ĉiujn verojn. [...]*
6. *Ne lasi al memoro tion, kion oni ne povas kapti per inteligento.”*<sup>3</sup>

H.L.D.Rivail proponis tamen ligi la metodon de J.H.Pestalozzi kun la klasika metodo de instruado. Krome, li aprobis kaj varme rekomendis uzadon de didaktikaj helpiloj. En la „Praktika kaj teoria kurso...” li skribis: “*Prezentu kvinon al persono, kiu ne scias ciferojn. Ĉu ĝi scias, per si mem, la nombron, kiun oni volas tiel prezenti? Sed prezentu al ĝi kvin fingrojn, kvin ŝtonojn, kaj ĝi tuj priskribos ilian kvanton. [...]* Tiel okazas, ĉar aritmetiko devas esti traktata ne nur

<sup>2</sup> H.L.D.Rivail: *Cours pratique et théorique d'arithmétique, d'après la méthode de Pestalozzi, avec modifications.* Imprimerie de Pilllet Aîné, Paris 1824, vol. I, p.VII.

<sup>3</sup> H.L.D.Rivail: *Cours Pratique...*, ver.cit., p.XIJ-XIIJ.

*kiel scienco, sed kiel rimedo por disvolvi racion de infano, rimedo de formado de ĝia pritakso kaj de al kutimigo al precizemo.*"<sup>4</sup> Siajn spertojn kun la svisa majstro, H.L.D.Rivail mencias ankaŭ en la "Traktato pri pedagogio".

Unu el la personoj, kiuj grave influis la estontan agadon de H.L.D.Rivail estis ankaŭ **Alexandre Boniface** - tre lerta instruisto, gramatikisto kaj verkisto, kiu instruis en Yverdon en la periodo 1814-1817, aprezata kiel sperta fakulo pri franca kulturo. En la „Praktika kaj teoria kurso...” lia lernanto tiel priskribas sian majstron: "[...] *Sinjoro Boniface, disĉiplo de Pestalozzi, la instruisto distingiganta ne nur pro sia erudicio, sed ankaŭ pro sia instrualento. Neniu pli bone ol li posedos la arton de amikeco; mi eĉ diros pli - la arton esti adorata de gelernantoj. Li estis unu el miaj unuaj majstroj kaj mi ĉiam memoros la plezuron, kun kiu mi kaj miaj kunlernantoj frekventadis liajn lecionojn. Plena de amo al infanoj, penetrata de vera filantropio, li kreis lernejon ĉe la strato Tournon, en antaŭurbo Saint-Germain, prave meritantan laŭdojn, kiujn esprimis pri ĝi eĉ la plej eminentaj personoj. Li estas la aŭtoro de pluraj verkoj, inter kiuj la plej estiminda estas la «Kurso de linia desegnado».*"<sup>5</sup>

A.Boniface fondis en 1822 la menciitan unuagradan lernejon, bazitan sur pestalozziaj principoj (pri kiuj li fervore propagandis en Francio), adaptitaj al kondiĉoj de la franca eduksistemo. La lernejo akiris vere bonegan reputacion. Ekde 1826 kunlabore kun Claude-Lucien Marle, A.Boniface publikigis la „Gramatikan kaj didaktikan ĵurnalon de la franca lingvo”, en kiu aperigadis siajn verkojn membroj de la kunfondita de li Gramatika kaj Literatura Societo de Parizo. Li verkis plurajn grandsukcesajn librojn pri gramatiko, en kiuj li strebis subteni propagandon de uzado de simpligita ideologia analizo. La didaktika verko „Skizo pri la franca gramatiko...” en la periodo 1829-1873 havis 19 reeldonojn! A.Boniface postulis, ke la franca gramatiko estu bone komprenebla ne nur al fakuloj, sed ankaŭ al simplaj homoj, kiuj devus klare scii ĝiajn regulojn. Aliajn literaturajn verkojn li kreis laborante interalie kun D.E.Lévi-Alvarès, kun kiu kunlaboris ankaŭ H.L.D.Rivail.

<sup>4</sup> Samloke, p.XIV kaj poste.

<sup>5</sup> Samloke, p.X.

Estas malfacile agnoski, ĉu H.L.D.Rivail lernis ĉe A.Boniface en Parizo. Tamen certe Boniface instigis lin verki la "Praktikan kaj teorian kurson de aritmetiko...", liverante la ideon kaj multajn konsilojn. Ankaŭ li grave kontribuis al la dua volumo de tiu ĉi verko per ideoj por ties ekzercaro.

En la sama teksto Rivail esprimas sian dankon ankaŭ al Sinjoro Ampère – membro de Universitato, kiun li informis pri sia ideo. Temas pri **André Marie Ampère** - la fama fizikisto kaj matematikisto, siatempe unu el la plej kleraj instruistoj, kiu devenis ankaŭ el Lyon, kaj kies filo estis preskaŭ samaĝa kiel H.L.D.Rivail. Ekde 1808 A.M.Ampère estis la ĝenerala inspektoro de la Universitato. Tiu ĉi funkcio devigis lin interesiĝi pri ĉio, kio rilatis al konduto kaj progreso de gelernantoj kaj instruistoj en ĉiuj parizaj edukejoj. Ne estas do mirige, ke ĝuste al li, la dekokjaraĝa H.L.D.Rivail dediĉis sian unuan verkon. Krome li apartenis al la Societo de Elementa Instruado kreita ĝuste de A.M.Ampère, kies celo estis liveri al popolo la intelektan kaj moralan edukitecon konforman al ĝiaj bezonoj.

En la biografio de H.L.D.Rivail aperas ankaŭ lia kolego nomita Lévi-Alvarès, kun kiu li kunlaboris preparante diversajn publikigaĵojn. Kvankam tiuperiode aktivadis kelkaj pedagogoj kun tiu ĉi nomo, tutcerte temas pri **David Eugène Lévi-Alvarès**, kiu naskiĝis en Bordeaux en 1794 en juda familio, kaj estis edukata en Choisy-le-Roi. Iom da tempo en 1814 li pasigis en militservo, estante soldato de la 10-a linia regimento en Italio. Reveninte hejmen li dediĉis sin al libera instruado, donante privatajn lecionojn kaj speciale interesiĝante pri instruado de virinoj. Li kreis propran instrumentodon, kiu estas konata sub lia nomo. Ĝi celis plialtigi instrunivelon de junulinoj, variante kaj multobligante objektojn de iliaj studoj. En 1825 D.E.Lévi-Alvarès kreis en Parizo kurson pri baza instruado, kiu iĝis tre populara. En tiu ĉi agado helpis ankaŭ lia filo. En 1832 kunlaborante kun iu S-ro Tourneau, sub aŭspicioj de la Magistrato li kunfondis kurson por instruistinoj. Verŝajne en iu(j) el tiuj ĉi entreprenoj partoprenis ankaŭ H.L.D.Rivail, kiel amiko kaj kunlaboranto de D.E.Lévi-Alvarès - eble faris tion ankaŭ S-ino Rivail. Pro siaj meritoj, la 10-an de januaro 1837, D.E.Lévi-Alvarès ricevis la Honoran Legion. Kreinte la menciitan instrumentodon, li bezonis specialan materialon. Tiucele, li verkis plurajn teoriajn legaĵojn kaj lernolibrojn, el kiuj kelkaj estis aprobitaj de la

ĉefepiskopo de Parizo. La plej ofte citataj estas la verkoj: „Klasika mnemozina” (1826), „Novaj elementoj de ĝenerala historio” (1829), „Skizaĵoj pri historio” (1830), „Patrino instruistino” (1834-36 - trivoluma), „Progresigaj legaĵoj” (1838-40 - kvarvoluma), „Imagoj pri sciencoj” (1844), „Normalaj diktaĵoj de ekzamenoj” (1849 - kun H.L.D. Rivail), „Lernolibro de historio pri antikvaj popoloj” (1854), „La franca literaturo” (1858). D.E.Lévi-Alvarès mortis en 1870. En lia familio estis pluraj pedagogoj, el kiuj menciataj estas ankaŭ almenaŭ lia filo kaj nevo.



**Neniu solvos viajn problemojn, se vi mem  
ne decidus alfronti ilin kaj ilin solvi.**





## KAVERNHOMOJ ALTE KULTURITAJ

Trevor Steele – Aŭstralio



Mi ja kredas, ke ni spertas diversajn vivojn, kaj ŝajnas estis fakto, ke kelkaj homoj povas aŭ konscie aŭ nekonscie “reiri” al pasintaj vivoj.

Ĉu mi havas tiun psiĥan fakulton, mi ne certas, kaj mi ne povas ĵuri, ke tio, kion mi nun skribos, vere venas el “foraj memoraĵoj” aŭ estas fantaziaĵo. Neniu kredis min, mi tamen rakontos!

Ripetfoje ŝajnas, ke mi ree spertas fragmentojn de vivo el glaciepoko (en Eŭropo, probable). Strange estas, ke mi ŝajnas esti duopulo: mi observas kiel homo de la dudekunua jarcento sed samtempe mi mem partoprenas en vivo okazinta antaŭ pluraj jarmiloj.

Oni povus imagi, ke la vivo de tiuj antikvaj homoj kaŭrantaj en kavernoj kaj tremantaj pro malvarmo ĉirkaŭ fajro estis tre malriĉa intelekte kaj kulture kaj spirite, almenaŭ kompare kun nia nuntempa vivo, tiel riĉa je amuzaĵoj kaj distraĵoj kaj aliro al sciofontoj. Sed laŭ miaj memoraĵoj (?) estis tute alie. La vivo en la kavernoj (kie ja brulis fajroj) estis miajuĝe pli riĉa multmaniere ol nia nuna. Mi “aŭdas” belan kantadon: kaj ne estis arioj de unu-du talentuloj, ĉiuj kune kantis. Kaj ili ne kantis ŝablonajn vortojn de iuj “tekstoj” hereditaj de la prapatroj, ili mem konstante elpensis novajn vortojn, kaj ame konkurencis inter si por trovi la plej taŭgajn esprimojn.

Kantado estis do kvazaŭ la centra kulturaĵo de tiuj kavernohomoj, sed ili havis ankaŭ riĉan trezoron da rakontoj. Refoje: ne estis rakontoj prezentataj de iuj memorlertuloj; la auskultantoj kunmuldis la historiojn kaj aldonis proprajn detalojn, tiel ke la rakontoj daŭre evoluis. Kaj la memorpovo de homoj, kiuj nek legas nek skribas, multe superas nian.

Tiuj homoj mortis relative junaj - mi neniam vidis vere maljunan vizaĝon. Sed ili ne fuĝis de la morto. Ili sciis, ke morto estas ĉiutagaĵo kaj ke postmorte la animo iras al alia mondo. Ĉu oni mortis tre juna aŭ relative “mezaĝa”, ne multe gravis.

Estante ano de civilizacio, kiu juĝas pasintajn epokojn grandparte el teĥnika vidpunkto, mi volonte demandus miajn kunhomojn, kiajn ilojn ili uzis, ekzemple por mortigi bestojn, kies karnon ili manĝis kaj kies haŭtoj provizis korpokovraĵojn por homoj. Klarajn respondojn mi ĝis nun ne ricevis, sed mi komprenas, ke ĉasado estis kolektiva agado, kaj ke la bestoj ofte oferis la propran vivon por vivteni homojn - entute la distingo inter homoj kaj bestoj estis foje neklara.

Do kreaĵo de mia fantazio? Eble. Mi mem ne povas decidi.



**Envio estas grava malamiko, kiun vi devas  
kontraŭbatali en via intima mondo.**

## ESPERANTO EN LA TRANSTOMBA MONDO

Eurípedes Alves Barbosa – *Brazilo*



Estas sciate, ke en la spirita mondo estas intensa laborado por spiritismo kaj Esperanto. Ekzistas akademioj kaj aliaj organizaĵoj por disvastigi kaj instrui nian karan lingvon. Foje, Francisco Valdomiro Lorenz, ekster la fizika korpo, vizitis esperantistan lokon en la transtomba mondo, nomatan *Palaco de la Propagandistoj, Verkistoj kaj Poetoj de la Lingvo Esperanto*, laŭ artikolo de Affonso Soares, aperinta en la revuo *Reformador* de decembro 1983.

Elkarniĝintaj esperantistoj atestis pri tio pere de la mediumeco de Chico Xavier, Divaldo Pereira Franco, Yvonne do Amaral Pereira, Francisco Valdomiro Lorenz, Porto Carreiro Neto, Dolores Bacelar, Raul Teixeira kaj aliaj.

Niaj spiritaj amikoj klopodas ĉefe helpi nin sendante kuraĝigajn vortojn. Ili scias, ke ni kelkfoje malentuziasmiĝas kaj malinteresigas antaŭ la obstakloj de la vojo. Ili diras: “ne rezignu, marŝu antaŭen.”

La malrapida marŝado de Esperanto malkontentigas nin kaj pluraj el ni forlasas la movadon, bedaŭrinde.



Bezerra de Menezes

Emmanuel instruis, ke Jesuo-Kristo venis al la mondo antaŭ du mil jaroj, ke lia Evangelio ne estas konata de la tuta homaro, kaj ke malmulte da homoj praktikas vere liajn ekzemplojn kaj instruojn. Spiritismo kaj Esperanto kompare kun Evangelio estas en la infana aĝo

Pritraktante tiun temon, oni ne devas ignori la senkomparan libron *La lingvo*

*veninta el la ĉielo*, eldonitan portugallingve de Brazila Spiritisma Federacio kaj Eldonejo Lorenz, en 2017. Temas pri kolekto de mesaĝoj senditaj de elkarniĝintaj Spiritoj pri Esperanto. Tiu verko estas leginda pro ties riĉa kaj bela enhavo.

En ĝi, oni trovas skribaĵojn de la Spiritoj Emmanuel, Bezerra de Menezes, Erasto, André Luiz, Camilo Castelo Branco, Castro Alves, Cruz e Souza, Abel Gomes, João Ernesto, Estevina Magalhães, José Tosta kaj aliaj.

Ismael Gomes Braga skribis la mesaĝon *Esperanto enmode*, en la 30-a de januaro 1979, mediume ricevita de Divaldo Pereira Franco, direktita al la tiama prezidanto de Brazila Spiritisma Federacio, Francisco Thiesen. Jen parto de la teksto:

[...] Niaj amikoj Wantuil, Porto Carreiro, Abel Gomes, Lorenz, Estevina Magalhães, Irthes Terezinha kaj aliaj, kune kun ni, feliĉaj, envolvas vin en kareso kaj danko, petante de la Sinjoro benon al vi dum via laboro por la disvastigado de Evangelio, Spiritismo kaj Esperanto. [...]

La supera Spirito Bezerra de Menezes, pere de la psikografio de Divaldo Pereira Franco, en la 3-a de novembro 1985, informis, ke la elkarniĝintoj Ismael Gomes Braga, Porto Carreiro Neto, Estevina Magalhães, Abel Gomes, Francisco Valdomiro Lorenz – pioniroj de la trilogio *Evangelio, Spiritismo kaj Esperanto* – kun la koroj plenaj de danko, preĝas favore al la sistematigita studo de Esperanto tiam kreita de Brazila Spiritisma Federacio.

Neniam antaŭe mi aŭdis aŭ legis pri Estevina kaj Irthes Terezinha. Mi trovis tiujn nomojn en *La lingvo veninta el la ĉielo*. Tial mi demandis al mi mem: Kiuj kaj kiaj ili estis?

Por respondi la demandojn, mi esploris la aferon ĉe la biblioteko de Brazila Esperanto-Ligo kaj ĉe tiu de Brazila Spiritisma Federacio. Mi trovis malmulte da informoj pri Estevina kaj sufiĉajn klarigojn pri Irthes Terezinha.

Kiel dirite, estas intensa aktivado por Spiritismo kaj Esperanto en la spirita mondo. Granda nombro da spiritoj senlace laboradas por niaj idealoj, inkluzive anonimuloj. Mi kaptas la okazon por danki al tiuj karaj gefratoj pro la disvastigado kaj instruado de Esperanto. Ili meritas niajn sincerajn omaĝojn.



F. V. Lorenz

Sciigi vin pri la vivo kaj agoj de tiuj gefratoj estus mia modesta omaĝo. Ili estas modeloj por ni. Sed pro manko de sufiĉa spaco, mi preferas skribi pri la malpli konataj laborantoj. Vi jam sufiĉe bone konas la biografion de Lorenz, Ismael, Porto Carreiro Neto, kiuj estas gigantoj en la du movadoj.

Nun mi honore prezentas al vi nian tre amatan Estevina-n, kiu estis membro de la tiam Brazila Ligo Esperantista, vivinta kaj forpasinta en urbo *Niterói*. Post longa kaj dolora malsano, ŝi elkarniĝis la 14-an de junio 1940.

La revuo *Brazila Esperantisto*, majo/junio 1940, publikigis la nekrologon de tiu samideanino:



Ismael Gomes Braga

Nur 11 tagoj pasis post la morto de Odilon de Araújo, kaj jam denove la Anĝelo de la Morto vizitas nian brazilan Esperantujon! La 14-an de junio mortis nia samideanino fraŭlino Estevina de Azevedo Magalhães. Ŝi estis fervora esperantistino, ano de niaj Ligoj, kaj pacience instruis la lingvon al siaj junaj fratoj.

Ŝi estis 35-jara. Orfo de ambaŭ gepatroj, ŝi fariĝis estrino de granda familio konsistanta el gefratoj pli junaj ol ŝi. Ŝi brave venkis sian grandan laboradon kaj trovis ankoraŭ sufiĉe da tempo por instrui la lingvon, organizi la korespondadon de la knabinoj kaj legi literaturon.



Porto Carreiro Neto

Ankaŭ la gazeto *Pernambuco Esperantista*, junio/julio 1940, aperigis nekrologon pri Estevina Magalhães.

Ŝi aliĝis al la 9-a Brazila Kongreso de Esperanto, okazinta en *Rio de Janeiro* en la jaro 1936.

Nia kara samideanino estis granda amikino de Ismael Gomes Braga kaj, en la spirita mondo, ŝi daŭrigas sian laboradon por Evangelio, Spiritismo kaj Esperanto, sub la kunordigado de Ismael.

Mankas pli da detaloj pri la vivo de Estevina, sed mi kuraĝas diri, ke ŝi estas supera Spirito, bonkora, kuraĝa kaj laborema.



Irthes Terezinha

Ankaŭ meritas nian atenton la elstara samideanino Irthes Terezinha Lisboa de Andrade, kiu naskiĝis en urbo *Ubá*, la 21-an de aŭgusto 1925, kaj forpasis en la sama urbo la 15-an de julio 1977, je la aĝo de 52 jaroj.

Ŝi studis kaj iĝis instruisto. Poste, ŝi ekinstruis ĉe *Ginásio Municipal Raul Soares*, kie ŝi estis ankaŭ secretario. Tamen, pro kancero, Irthes forlasis la oficon.

Kiam Irthes estis sepjara, ŝi estis atakata de malkonfortaĵoj, ekzemple: teruraj bildoj, noktaj ŝvitoj kaj timigaj aperaĵoj. Kuracistoj ne solvis la problemojn kaj ŝia patro kondukis ŝin al spiritisma mediumo. Pro la helpo de la mediumo ŝi pliboniĝis. La spirita gvidanto de la mediumo diris, ke la knabino plenumos gravan taskon estonte.

Irthes estis katolikino, sed ne kredis je la dogmoj de tiu religio. Tiutempe, ŝia patrino, ankaŭ katolikino, suferis fortan spiritan perturbon. La patrino ricevis helpon en spiritisma centro, kien ŝi iris kune kun la edzo. Tial la paco revenis al la hejmo de la familio.

Irthes interesiĝis pri spiritismo, kiam legis la verkon *La evangelio laŭ spiritismo*. En julio 1945, ŝi komencis aktivadon en la *Spiritisma Centro Ismael*, en *Ubá*. Tie, la mediumeco de Irthes disvolviĝis: psikografio kaj psikofonio. Ŝi donis specialan atenton al la tasko nomita “infana evangelizado”, dum sinsekvaj 32 jaroj.

Irthes posedis talenton por poezio kaj muziko, sed en la praktiko ŝi ne havis eblecon praktiki tiujn artojn.

En 1950, ĉe spiritisma seanco, en urbo *Leopoldina*, kun partopreno de la famekonata mediumo Francisco Cândido Xavier, ŝi ricevis el transtomba mondo la unuan soneton. Post la seanco, la mediumo klarigis al Irthes jenon: “multe da poetoj elkarniĝintaj volas labori pere de via mediumeco.”

De tiam Irthes ricevis poemojn subskribitajn de Júlio Diniz, Antero de Quental, Auta de Souza, Valado Rosas, Azevedo Cruz, Casemiro Cunha, Maria Dolores, João de Deus kaj aliaj. Ŝi ricevis ankaŭ mesaĝojn de Bezerra de Menezes kaj de aliaj superaj Spiritoj. La mesaĝoj kaj poemoj aperis en la revuo *Reformador* kaj en aliaj gazetoj aŭ revuoj.

Ŝi estis kompetenta oratoro kaj partoprenis en pluraj spiritismaj aranĝoj kaj solenaĵoj, en urboj de la subŝtatoj *Minas Gerais*, *São Paulo* kaj *Rio de Janeiro*.

Ŝi prelegis en la unua spiritisma semajno de urbo *Bicas*, kiam ŝi ricevis omaĝon. Post la brila parolado, famaj spiritistoj gratulis ŝin, nome Leopoldo Machado, Amadeu Santos, Jaques Aboab, Sebastião Lasneau kaj Germano dos Anjos.

Kiel esperantisto, Irthes estis la dua sekretario de la *Esperantista Klubo João Ernesto*, fondita la 31-an de majo 1959, en *Ubá*. Ŝi verkis kronikojn por la radioprogramo *Tarde Esperantista*, elsendata de *Rádio Sociedade Ubaense* en la jaroj 1953, 1954, 1955.

En la 2-a de aprilo 1977, Irthes skribis: “Spiritismo estas mia ĉielo sur la tero, mia lumigilo, mia lumo, mia konsolo, kaj ĉio bona, kion mi deziris en la vivo.” Ŝi elkarniĝis la 15-an de julio 1977.

Irthes, kiel elkarniĝinta, verkis la libron *Restos nur amo*, portugallingve kaj medieme ricevita de Heloísa Silva Porto, loĝanta en urbo *Muriaé*. La libro estis eldonita en 2007, de la eldonejo *Mythos Editora Ltda*.

Mi certas pri tio, ke en la spirita mondo multe da elkarniĝintaj esperantistoj intense laboras por niaj idealoj, inter kiuj Estevina Magalhães kaj Irthes Terezinha.





**Malĝojo estas kaŭzo de sufero.  
Ne vin ligu al ĝi, nek permesu, ke ĝi infektu  
vin per siaj toksaĵoj. La kulturo de malĝojo  
malfermas vojon al pluraj malsanoj de la menso,  
de la emocio kaj de la korpo.**

# KRUCENIGMO

José Roberto Tenório – Brazilo



## krucenigmo

En la grizaj fakoj aperos la nomoj de du libroj jam tradukitaj al Esperanto kaj en la cirkloj aperos la nomoj de du gravaj nuntempaj prelegistoj.

Kreema; elpensema	Romano de la spirita aŭtoro Emmanuel	Sencerimonia; familia		Romano de la spirita aŭtoro Emmanuel	
		Nomo de la litero N	Batu per martelo		
				Cifero 9	
				Spiritisma prelegisto	
Malsata "?" novelaro de la hindo Tagore	Pri tiu kiu kapablas fidi		Lupo-blek' Rusia Akademio de Sciencoj		
Tiu kiu suferas					ĉi-momente
Monunu' de Serbio					"?" al laboro!
					Simbolo de la kemia elemento Lantono
Unu el la apostoloj de Jesuo		Peko-frukt' laŭ Biblio Reciprok-inklinul'	Malhaste; malrapide		Esperanta sufikso
					Ekstremaĵ' de birda buŝo
Mediumo, bonfaranto kaj fama prelegisto					manĝebla radik' Sufikso en "duiliono"
Majstro en tibeta Budhismo	Sciige; informe				
	Filo de la fil(in)o				
					Islama juĝist'
Perant' inter dio(j) kaj homoj		Morale bona			
		Sufikso			
Kolektive; kune			River' en Svislando		
Azia lando kie situas la fama urbo Petra					

Solvoj

A	S				P
I	N	V	E	N	T
S	T	O	N	O	N
A	G	H	U	R	L
S	U	F	E	R	A
D	I	N	A	R	E
J	U	D	A	S	O
M		L	U	J	
D	I	V	A	L	D
L	A	M	A	O	S
J	I	N	D	I	K
S	A	N	K	T	U
R	E	E	T	I	K
O	P	E	R	O	D
J	O	R	D	A	N

Helpe: 4 - hurĵ, kadi. 5 - dinar. Rodan, ŝtono. 7 - senĝena.



**Neniam perdu la esperon. Kiu malesperas,  
tiu jam perdis antaŭe parton de la lukto,  
kiun li entreprenos.**



## MORTPUNO

Emmanuel, *Spirito*



Ĉiuj fondintoj de la plej grandaj religi-institucioj, ankoraŭ aktive influantaj la homan komunumon, forpasis sekuraj pri tio, ke ili elplenumis siajn misiojn.

La plejaĝula Moseo mortis sur la elstara Nebo, kontemplante la promesitan Kanaanon.

Sidarto Gotamo, la inspirita konstruinto de budhismo, post longa vivo riĉa je lumigaj faroj, forlasis la fizikan korpon, ene de florplena ĝardeno el Kuŝinagaro.

Konfuceo, la saĝulo, kiu organizis tutan sistemon de moralaj principoj por la ĉinoj, trovas la morton en paca atmosfero, surlite kuŝanta sub la flegado de sia zorgema nepo.

Kaj iom poste, Mahometo, la fondinto de Islamo, kiu konsentis esti adorata de siaj disĉiploj, kiel neperebla, mortas en Medino, estante ankoraŭ sufiĉe forta, atakita de abomena febro.

Koncerne Jesuon, tamen, la forpaso estas malsama.

La dia fondinto de kristanismo, difininte la universalan religion de amo kaj saĝeco, plena de juna vivipoveco, estas haltigata de senbaza persekutado, arestita kaj sendita en karceron.

Neniu ekzamenis Liajn antecedentojn nek havigis al Li rimedojn por defendi sin.

Malkonfesa de siaj plej intimaj amikoj, Jesuo sin trovis tute sola, inter ruzaj juĝistoj, kvazaŭ ŝafido forlasita meze inter ŝakaloj.

Kuniĝas egoismo kaj krueleco cele Lin kondamni al suprema sinofero.

Herodo, la patrono de la socia ordo, invitita al manifestiĝo en lia kazo, ordonis tion, ke oni Lin traktu kiel histrionon.

Pilato, respondeca pri la justico kaj sindetene, ne havigis al Li la naturan rajton.

Kaj, fordonita al la popolo, ribelanta en la spirita blindeco, Li estis preferita anstataŭ Barabaso, la krimulo, por suferi la eksterordinaran verdikton.

Supozeble, cele igi nin kompatemaj, Jesuo, en silento, akceptis elporti la erarojn de la homa justico, samniveleigante, en la kruco, inter la insultitoj kaj viktimoj senkaŭzaj de ĉiuj tempoj de la Homaro.

Kristanoj el ĉiuj religioj interpretantaj la Evangelion kaj el ĉiuj partoj de la mondo, atentaj al la ekzemplado de la Eterna Bonfarinto, apartigu la krimulon de ties krimo, same kiel vi lernis disigi la malsanulon de ties malsano!

Eduku la malvirtigintan fraton, same kiel vi prizorgas la malsanan kompanion!

Ekstermu en definitivo la glavon kaj tranĉilegon, sufokrimenon kaj pendumilon, gilotlinon kaj fusilon, elektran seĝon kaj gaskameron el via penologia kampo, kaj ni kunpreĝu al Dio, petegante, ke Li nin inspiru paciencon kaj kompatemon, unuj kontraŭ la aliaj, ĉar, ankoraŭ hodiaŭ, enkadre de niaj prijuĝoj, eblos aŭskulti, el la fundo de nia konscienco, la ĉielan avizon de nia Dia Majstro, maljuste kondamnita al la morto: — *Kiu el vi estas senpeka, tiu unua ĵetu la ŝtonon!*

El la libro *Religio de la spiritoj*, diktita de la Spirito Emmanuel kaj psikografiita de la mediumo Francisco Cândido Xavier. Eldono de Brazila Spiritisma Federacio. Esperantigita de **Jader** Rodrigues da Silva.



## PRI MOZI, LA FILOZOFO DE ANTIKVA ĈINIO

Sun Minĝiao kaj Sasaki Teruhiro  
– el Zaozhuang-a Universitato – Ĉinio



En septembro 2017, la esperantigita libro *Mozi* estis eldonita de Xueyuan-eldonejo en Pekino. D-ro Sasaki Teruhiro, eks-profesoro de Saitama Universitato el Japanio, kaj instruisto de la japana lingvo kaj Esperanto en Zaozhuang-a Universitato en Ĉinio, esperantigis ĝin dum laboro de kvin jaroj. En la mondo, nemultaj homoj scias pri Mozi. Fakte, li iam estis same fama kiel Konfuceo. En Ĉinio, oni nomis la studon pri Mozi kaj lian ideon *Mohismo*. En la antikva historio de Ĉinio, aperis prospera situacio pri mohismo, sed li kaj liaj doktrino kaj ideo malaperis preskaŭ du mil jarojn. Finfine, liaj ideoj reviviĝis, pro bezono de la moderna

mondo. Japana esperantisto Hori Yasuo diris: *Mia impresio estas unufraze: Genio de Esperanto kaj genio de Prof. Sasaki revivigis Mozi-on en la nuna mondo*. Tio signifas, ke la nutempa mondo bezonas mohismon.

En la homa historio, naskiĝis grandegaj pensoj dum la kvina jarcento a. K. En Hindio aperis Budho, en Grekio, Sokrato, Platono, kaj en Ĉinio, Konfuceo, Mozi, Laozi k.a. Iliaj ideoj ĉiam vivas kaj brilas. Dum la transira epoko de printempo-aŭtuno kaj milito-regnoj de antikva Ĉinio, jam ekfloris grandaj pensoj, kiel konfuceanismo, taoismo kaj mohismo. Tio montras la gravecon kaj la grandan influon de ideoj kaj pensoj de Mozi.

Kio li estis? Liaj posteuloj nomis lin sciencisto, klinikisto, milististo, filozofo, pacemulo k.c., sed lia plej glora nomigo estis sanktulo inter ordinaraj popolanoj. Liaj ideoj kaj doktrinoj rilatas al superaj kampoj.

Mi montras kelkajn ideojn al la esperantistoj.

## 1. REKOMENDO DE KLERULOJ

En la libro, Mozi notas: “Tiel la antikva reĝo Yao, promociinte Shun el la provinco Fuzezhijang, konfidis al li la regadon, kaj tiel paco regis sub la ĉielo. Yu, promociinte Yi el la provinco Yinfang, konfidis al li la administradon, kaj tiel estis la unuigitaj landoj en la regno. Tang, promociinte Yi Yin el laboristoj en kuirejo, konfidis al li la administradon, kaj sukcesis en la projekto. La reĝo Wen, promociinte Hong Yao kaj Tai Dian el fiŝkaptistoj, konfidis al ili administradon, kaj konkeris okcidentajn regnojn.”

Spite de la malalta rango, ĉiu ajn povas esti promociita, kondiĉe de tio, ke oni estu kapabla. Sed la estro devas esti sufiĉe saĝa, ke li povu eltrovi la kapablulon. Rekomendi klerulojn estas la tasko de saĝa estro.

Se malsaĝuloj oficas en regno, certe aperas malordo. Mozi asertis: “La ordo estas tio, ke la noblaj kaj la kleraj oficistoj regas super la malsaĝaj kaj la maldecaj; la malordo estas tio, ke la malsaĝaj kaj la maldecaj regas super la noblaj kaj la kleraj. Tial oni scias, ke la estimo de kleruloj estas la bazo de la regado. Tiel do la antikvaj sanktaj reĝoj profunde respektis kaj estimis klerulojn, kaj komisiis al talentuloj la aferojn. Ili ne partiemis promocii siajn parencojn laŭ nepotismo, ne tro favoradis la riĉajn nek la nobelajn, ne inklinis al favorado nur al la aspekte belaj.”

Laŭ Mozi, homoj havas naturan inklinon lerni desupre. Do la tasko rekomendi klerulojn estas ligita kun teorio de akordiĝo.

## 2. UNIVERSALA AMO

Filozofio de Mozi estas fama pro ĝia devizo de universala amo. Por Mozi, amo estas ne nur la antonimo de malamo, sed ankaŭ de aparta amo. Sinjoro Sasaki Teruhiro uzas ofte la terminojn *makroamo* kaj *mikroamo* anstataŭ *universala*

kaj *aparta amo*, pro tio, ke aparta donus miskomprenon, havantan signifon *neordinara, speciala*. Laŭ Mozi, *makroamo* estas internaciismo, kaj *mikroamo* signifas limigitan amon, interne de la koncerna plimalvasta societo. Koncepto pri lojaleco kaj fila obeemo, kvankam ignoras egoismon kaj havas altruismon, tamen, estas limigitaj al mikroamo, kiu turnas sin interne de la mikrokosmo: *nacio, partio, tribo* aŭ *familio*. Kvankam tia amo estus altruismeca, ĉar homoj ofte sindonas al sia nacio kaj tribo, tamen, ĝi estas nur aparta altruismo, limigita al la koncerna sfero. Tia mikroamo ofte iĝas malamo al eksteraj homoj, ĉar ĝi apartigas homojn disde homoj. Siavice, makroamo transiras ĉiun ajn limon.

El la vidpunkto de Mozi, malvasta mikroamo (limigita altruismo) ofte inklinas al kolektiva egoismo, naskanta agreson kaj atakadon kontraŭ la aliaj. Kiel ŝanĝi mikron en makron, kaj kiel kunlui egoismon kun altruismo? Mozi pledas: “Amu la aliajn, kiel sin mem.” Tiu konkludo estas tute sama al kristanismo. Diferenco kuŝas en tio, ke la lasta apogas sin sur Dio, Mozi, sur ĉielo.

Makroamo ĉe Mozi ne estas io mistera, nek abstrakta, sed io praktika, surbaze de reciproka profito. Kiel disvastigi konduton de makroamo, kaj praktiki ĝin en la reala vivo? Mozi sin turnas al suprujoj, por ke ili nur ĝoju la agon de makroamo, kaj tiel subuloj simile faros tion, kio al supro plaĉas. En la praktika filozofio de Mozi tre gravas, ke suprujoj morale perfektigos sian personecon, ĉar subuloj kutimas imitadi supruojn. Tiu argumento estas same trovebla en la ĉapitro *Akordiĝo*. Rolo de estroj estas decida, do la estroj devas altigi sian personecon. Kaj aldone, laŭ Mozi, reciproka amo grandiĝas per la bona rezulto de reciproka profito pli kaj pli, kiel ĉenreakcio. Efektiviĝos makroamo per reciproka ago inter alta kvalito de estro kaj natura profitamo de popolo.

Fakte, la amo de Mozi estas simila al amo de kristanoj kaj Zamenhof, tial ke ĝi estas utila al la tuta mondo.



Poŝtmarko pri Mozi



### 3. NEATAKO

En transira epoko de printempo-aŭtuno al milit-regnoj, Mozi kritikis agresadon de la grandaj regnoj al malgrandaj. Li akuzas agreseman militiron, kiu kontraŭas al makroamo kaj al interprofitigo. Milito estas nepravigebla masakro.

“Mortigo de unu homo estas konsiderata kiel maljusto, kaj tio nepre estas mortomerita krimo. Sekve, laŭ tia logiko, mortigo de dek homoj estas dekobla maljusto, kaj tio nepre estas dekoble mortomerita krimo. Kaj mortigo de cent homoj estas centobla maljustego, kaj nepre estas centoble mortomerita krimo. Tiel, ĉiuj sinjoroj en la mondo scias, ke tio estas konsiderata maljusto. Sed nun, spite de tio, ke maljustega devus esti konsiderata la agreso al alia regno, tute kontraŭe, ĉi tio estas rigardata kiel laŭdinda kaj justa, tiom oni tute ne trovas ĉi tion maljusta, ke oni restigas al posteuloj la admiron eĉ per skribaĵoj.”

Tiu argumento similas al logiko en *Krimo kaj puno* de F. M. Dostojevskij, ke mortigo de unu homo estas krimo, sed mortigo de multaj homoj estas honorigata kiel heroa ago.

Laŭ Mozi, militiro estas malŝparado de homoj kaj resursoj, do tio estas kontraŭ ekonomio.

Estas notinde, ke Mozi predikis la ideon de neagresado ĝuste en la transforma procezo de printempo-aŭtuno, tiam, kiam la pli grandaj regnoj englutis la malpli grandajn. Necesas atenti, ke Mozi kaj mohistoj zorgadis pri la defendo de tiaj malgrandaj regnoj, kiel Song, Lu kaj Zheng, kiuj iam havis brilan pasintecon. Ili estas nur kompare pli malgrandaj ol la aliaj regnoj, kiel Chu-regno kaj Qin-regno. En tiu tempo, tio estis kontraŭ la fluo de historia procezo. En Qin-regno, dum ĝi estis malgranda, mohistoj estis dungitaj kiel konsilistoj kaj specialistoj de defendo. Nun, tie estas elfositaj la bambuaj dokumentoj pri defenda teorio de mohistoj en ruino de Qin-regno. Tio montras, ke mohistoj altigis la milit-teknikon por defendo.

La ideo de neatako renaskiĝis en nuna tempo, kiel Tolstojismo kaj Gandhiismo. En la japana postmilita konstitucio estas enkondukita la kontraŭ-milita naŭa klaŭzo. Do nun la mohismo kun la ideo de neatako ĝuas grandan realecon.

Tio estas paca ideo por nuntempa batalema mondo.

Hori Yasuo skribis en artikolo: “Nun ni vivas en la epoko de malamo kun multaj bataloj en la mondo. Regas multaj despotoj, kiuj agas agreseme, diskriminacie, malestime al saĝuloj, kaj malame, nome kontraŭ la ideo de Mozi. Unu el tiuj estas nia japana ĉefministro Abe. Li organizas sian kabineton, kolektante siajn flatemajn amikojn, kaj ne aŭdas kritikojn de aliaj. Li estas ĉiam atakema al siaj kontraŭuloj kaj al aliaj ŝajne malamikaj landoj. Mozi taksus, ke Japanio estas en danĝero.”

#### 4. ŜPARADO

En kritiko de malŝparado manifestiĝas simileco de Mozi al rusia narodnikismo. Ambaŭ ne povas toleri tian malprudentan vivon de nobeloj, vivantaj pompe, dum al popolanoj mankas la plej necesaj vivrimedoj. Mozi akuzis tiun krimon kiel “ŝtelado de manĝaĵoj kaj vestaĵoj”. La grava celo de Mozi estas por la bonstato de ĉiuj suferantoj, por ke la malsataj havu manĝaĵojn, la frostiĝantaj, vestojn, kaj la laborantaj, ripozon. Mozi vidas, ke suferigas popolanojn la superflua malŝparado je militiro, konstruado de luksegaj palacoj aŭ tomboj, longdaŭraj funebroj, muzikoj k.s. Mozi estimas la antikvajn sanktajn reĝojn pro ŝparado ekonomia.

Nuntempe, je limigita resurso, oni rigardas tiun opinion prava. Sed Xun-zi, fama konfuceano, mallaŭdis la ekonomion de Mozi tiel troŝparema, ke ŝrumpas, laŭ Xun-zi, la landa ekonomio. Li skribis en la ĉapitro *Ŝtat-riĉigo* jene: “Per ŝparado ekonomia oni alportos malriĉiĝon al la tuta mondo.” Laŭ Xun-zi, “la tero produktas tiom abunde, ke restos al vivantaj homoj superfluo de nutraĵo kaj vestaĵo, kaj ne okazos mizerego en regno, do Mozi troigis sian pesimismen”.

Interese estas, ke tia ekonomia polemiko jam ekzistis en la antikva Ĉinio. Sed ĉi tie Xun-zi inklinas al troa estimo je konsum-ekonomia efekto de malŝparemo. Xun-zi mem predikadis gravecon de ŝparado, do eĉ el lia vidpunkto mohismo ŝajnis tro ŝparema.

#### 5. SIMPLA FUNEBRO

Unu el la gravaj disput-punktoj inter konfuceanoj kaj Mozi konsistis en la maniero de funebro. Por konfuceanoj, longdaŭra funebro kaj luksa tombo estas

nepre necesaj por esprimo de fila pietato. Mozi severe kritikas tion pro diversaj kialoj. Nun, en nia epoko, rilate al simpla funebro, Mozi estas prava. Sed en Ĉinio longe ne estis akceptata la pledo de Mozi pri simpligo de funebro.

Rilate al la funebro okazis tre interesa renverso inter du ideoj. Mozi, kredante je Spiritoj, pledas por simpligo de funebro kaj tombeto, sed kontraŭe, konfuceanoj, indiferentaj al Spiritoj, pledas por longdaŭra funebro kaj tombego. Konfuceanoj rigardas la familion ĉefa respondeculo por funebro, sed Mozi, kredanta je Spiritoj, konsideras la komunan sanktejon kiel la ĉefan bazon por respektado al mortintoj. Sed danke al la luksa tombego konserviĝis subtere la antikva ĉina civilizacio, kiun oni povas vidi nun, ekzemple, en muzeoj, la terakotajn soldatojn kaj ĉevalojn.

## 6. KONTRAŬ MUZIKO

Muziko ludas gravan rolon en konfuceanismo kune kun decreguloj. Konfuceo mem estis bona ludanto de muzikilo. Kaj lerte ludi muzikilon estas unu el la gravaj kvalifikoj de ties disĉiploj. Konfuceo diris: “Kiel do fuŝludas You (Zilu) grand-liron, estante unu el miaj disĉiploj. Aliaj disĉiploj ne respektas Zilu pro tio.”

Mozi persiste tenis sin kontraŭ muziko. Tiu sintenado estas kontraŭ konfuceanismo kaj etendiĝo de la ekonomia ideo pri ŝparo. Laŭ Mozi, muziko malhelpas al la popolo labori kaj al oficistoj okupiĝi pri administrado, kaj li kritikas muzikon, ke “per ekspluatado de la popolo oni ricevas la belsonon de grandaj sonoriloj, tamburoj kord- kaj blov-instrumentoj”. Estas klare, ke kritiko al muziko estas direktata al malŝparo far reĝoj, dukoj kaj nobeloj, sed ne al distro kaj amuzo de popolanoj.

Xun-zi kontraŭargumentas jene:

“La vojo de antaŭaj reĝoj estis promocii decregulojn kaj muzikon. Sed Mozi ignoris tion. Ŝatis muzikon la sanktuloj. Eblas utiligi muzikon por plibonigo de la popola koro kaj de ŝanĝo de moroj, profunde emociigante homojn.”

Laŭ Xun-zi, muziko igas popolon iri al justa vojo, do, muziko estas grava instrumento por regi homojn, sed Mozi ignoras tiun valoron.

Tamen, ni devas direkti nian atenton al la kaŭzo, kial Mozi kontraŭas al muziko. Li diras jene: “La afero de justuloj por la mondo ne estas plezurigi per beleco okulojn kaj orelojn, nek buŝon per dolĉaĵo, nek korpon per diboĉo.”

Mozi asertas, ke asketismo estas necesa por la vivmaniero de justuloj-inteligentuloj.

**Koncernaj materialoj:**

1. *Mozi* esperantigita de Sasaki Teruhiro, eldonita en 2016, Pekino, Xueyuan-eldonejo
2. Hori Yasuo, *Genio de Esperanto kaj genio de Sasaki revivigis Mozi-on en la nuna mondo*.



**Vivu ĉiam pace.**

**Konscienco trankvila, kiu ne alportas  
memriproĉon pro pasintaj agoj, ne timas  
estontajn, naskas harmonion.**

**Nenio ekstera perturbas trankvilan koron,  
kiu pulsas laŭ la takto de la ĝuste  
plenumita devo.**

**La paco meritas vian tutan klopodon  
atingi ĝin.**



## PONTO POR INTERŜANĜO DE KULTURAJ VALOROJ

Georgi Mihalkov – *Bulgario*



La problemo pri la interŝanĝo de kulturaj valoroj en la multetna Eŭropo estas tre aktuala. En la nuna mondo ege disvastiĝas la kultura interŝanĝo, sed tre grave estas, ke la etnoj en la Eŭropa Unio konservu sian identecon kaj daŭrigu sian kulturen evoluon. Eŭropa Unio iĝos pli prospera, se sukcesos konservi la variecon de la etnaj kulturoj. Tiam la eŭropa kulturo iĝos pli kolora kaj pli riĉa.

Nun la plej grava tasko de la eŭropaj landoj kaj la etnoj en tiuj ĉi landoj estas pli bone ekkoni la diversajn naciajn kulturojn. Dank' al la interŝanĝo de la kulturaj valoroj inter la eŭropaj landoj, la eŭropanoj sukcesos ekkoni la morojn kaj la tradiciojn de la homoj, kiuj loĝas en la diversaj landoj kaj tio helpos por ilia unuiĝo, ilia amika kunvivado kaj libera interŝanĝo de kulturaj kaj materiaj valoroj. Estas ĝenerala vero, ke nur dank' al la evoluo de la homa kulturo la homoj pli bone povos kompreni unu la alian.

La eŭropaj landoj jam devas trovi novajn eblecojn al kunlaboro kaj unu el la vojoj, kiuj gvidas al amikeco kaj paca konekzisto estas la kulturo, la ekkono de la riĉaj kulturaj valoroj de la diversaj landoj kaj etnoj.

Ĉiu eŭropa lando evoluis laŭ sia specifa kultura vojo, kreis siajn kulturajn valorojn. La natura deziro de la homoj estas ekkoni la historion, la kulturon la vivmanieron de la homoj, kiuj loĝas en aliaj landoj.

La plej granda barilo antaŭ tiu ĉi natura homa emo estas la diversaj lingvoj. Homoj, parolantaj diversajn lingvojn, ne komprenas unu la alian kaj ofte rilatas malamike unu al alia. Ili rigardas suspekto al la nekonataj homoj, kiuj parolas nekompreneblan por ili lingvon kaj tio ne nur malproksimigas, sed timigas la homojn.

Pro tio Esperanto, la lingvo internacia, estas la plej unika rimedo por interŝanĝo de kulturaj valoroj en la multetna Eŭropo. Esperanto estas la mirakla ponto dank' al kiu la homoj el la diversaj eŭropaj landoj povas pli bone ekkoni la kulturajn valorojn de Eŭropo kaj pli efike kunlabori.

Unu el la plej bonaj rimedoj proksimiĝi unu al alia, penetri en la pensmanieron de la aliaj, en iliajn morojn, tradiciojn, naciajn kaj etnajn trajtojn kaj specifan karakteron estas la literaturo.

Dum jarcentoj la eŭropaj landoj kreis riĉajn valorajn literaturojn, kiuj eniris en la trezoron de la eŭropa kulturo. La diversaj landoj investis energion, monon, strebojn por traduki la plej gravajn verkojn de la eŭropaj verkistoj en siajn naciajn lingvojn. Ni eĉ ne povas imagi kia grandega laboro estas tio: pretigi tradukistojn, kiuj perfekte posedu la pli gravajn eŭropajn lingvojn, certigi rimedojn por la eldono de tiuj ĉi verkoj, disvastigi la librojn, verki literaturajn studojn, analizojn pri la klasikaj eŭropaj verkoj kaj verkistoj, ĉar oni instruas ilin en la lernejoj.

Tamen okazas, ke la loĝantoj en multaj eŭropaj landoj ne povas ekkoni gravajn verkistojn kaj verkojn de la pli malgrandaj eŭropaj etnoj. La unua kialo estas la manko de tradukistoj, kiuj bone konas la lingvojn de tiuj ĉi pli malgrandaj nacioj kaj etnoj.

Ekzemple la bulgara literaturo estas preskaŭ nekonata en multaj eŭropaj landoj, ĉar tie ne estas tradukistoj, kiuj bone regas bulgaran lingvon kaj kiuj povus traduki bulgarajn beletrajn verkojn. Ekzemple en Eŭropo oni pli malpli konas la verkojn de la klasikulo de la bulgara literaturo Ivan Vazov kaj ĉefe lian romanon "Sub la Jugo", kiu estas la unua bulgara romano. Feliĉe tiu ĉi romano estas tradukita en Esperanto kaj dank' al la Esperanta traduko multaj eŭropaj esperantistoj tralegis ĝin kaj iom pli detale ekkonis la bulgaran historion, la bulgarajn tradiciojn kaj morojn.

La samon, ni la bulgaroj, povas diri pri la literaturoj de la aliaj pli malgrandaj eŭropaj etnoj kaj nacioj. Ekzemple en Kroatio, Hungario, Greklando, Rumanio, Albanio, Serbio, Bosnio, Finnlando, Svedio, Norvegio kaj en aliaj landoj estas multaj talentaj verkistoj, sed la bulgaraj legantoj preskaŭ ne konas ilin. Oni tradukis en bulgaran lingvon la verkojn de iom pli konataj verkistoj el pli malgrandaj

eŭropaj landoj, kiel ekzemple kelkajn verkojn de Miroslav Krleža, Branislav Nuŝiĉ, Ivo Andriĉ, Mihaj Eminesku, Mihail Sadovjanu, Nikos Kazandzakis, Konstantinos Kavafis, Odiseas Elitis, Janis Ricos, Ismail Kadare, Ŝandor Petofi, Endre Adi, Joĵef Atila kaj aliaj.

Bedaŭrinde bulgaraj legantoj preskaŭ ne konas la nuntempajn verkistojn el la pli malgrandaj eŭropaj landoj.

Tio estas la grava rolo de Esperanto, ĉar malgraŭ la malfacilaĵoj, malgraŭ la manko de rimedoj, en Esperanto ekzistas sufiĉe bona libroeldona reto, kiu bone funkcias. Dank' al Esperanta libroeldonado la esperantistoj havas eblecon ekkoni la literaturojn de pli malgrandaj eŭropaj nacioj kaj etnoj kaj tio sendube multe helpas por la kunfandiĝo de la multetna Eŭropo.

Ni, la esperantistoj bone scias la avantaĝojn de la esperantaj tradukoj. Ja, multe pli facile estas traduki libron en Esperanton ol fari tion en iu ajn nacian lingvon. La tradukebloj de Esperanto estas multe pli grandaj kaj pli bonaj. Ĉiu Esperanta traduko estas farita en la koncerna lando kaj tio signifas, ke unue la elekto de la traduko estas bona, ĉar la Esperanta tradukisto bone konas la verkon kaj li tradukis ĝin ne laŭ ies peto aŭ ordono, sed li mem deziris traduki ĝin kaj li opiniis, ke tradukante ĝuste tiun ĉi libron, li montros al la eksterlandaj legantoj interesan kaj allogan legaĵon. Due, la traduko estas preciza, kompetenta, ĉar la tradukisto profunde kaj detale konas sian nacian lingvon el kiu li tradukas. Trie la tradukisto scias, ke li tradukas la libron por legantoj, loĝantaj en diversaj landoj kaj ne nur por legantoj de unu sola lando.

Esperanto vere estas unika rimedo por la kunlaboro en la multetna Eŭropo kaj kunvivo de la eŭropaj nacioj. Esperanto kaj literaturo, originala kaj tradukita ne nur proksimigas la geesperantistojn.

La Esperanto-literaturo, kreita de la eŭropaj esperantistoj, sendube prezentas unikan miraklan ponton kaj, kiel diris la talenta kroata verkisto, nobel-premiito, Ivo Andriĉ, ĝi estas ponto, kiu simbolas la eternan homan deziron “pacigi kaj kunigi ĉion”.



Tradukante en Esperanton kaj kreante originale en Esperanto ni, la esperantistoj de eŭropaj landoj konstante konstruas pontojn, kiuj similas al sagoj pafitaj kuraĝe al la estonto. Sagoj, kiuj celas superi la malamon, la konfliktojn.

Nia tuta espero estas, ke en tiuj ĉi pontoj de interkompreniĝo kaj amikeco, en tiuj ĉi pontoj, sur kiuj ni kune trapasos man' enmane kaj atingos la alian bordon – ni trovos la estonton, kie regos frateco kaj amikeco!



**Konservu vian emocian regadon  
en ĉiaj situacioj.**

**Nervaro maltrankvila, vivo malfeliĉa.**

**Se malfacilaĵoj minacas  
vian ekvilibron, preĝu.**

**Preĝo estas efika kedikamento kontraŭ ĉiuj  
malsanoj de la animo.**



## SONAS SONORILOJ

Antoni Grabowski



En la kampaniloj sonas sonoriloj;  
Ankaŭ en la koro sonas sentvekiloj;  
Ploras la gepatroj pro l' amataj filoj,  
Kiu sian vivon al Patruj' oferis;  
En heroaj luktoj ili tre suferis,  
Sed liberon sanktan por la mond' konkeris.

Sonas en la jaroj dolĉaj rememoroj  
Pri l' feliĉaj tempoj, de la sort' favoroj,  
Tamen ankaŭ pri la malĝojegaj horoj,  
Pri l' disiga voko de l' severa devo,  
Pri la neniigo de belega revo,  
De fataleventoj – ve! – pri la ricevo.

Ploru kaj suferu, sed ne malesperu,  
Vi gepatroj, kaj pro l' filoj eĉ fieru;  
Ili mortis sur la ter', sed konsideru  
Ke la vera vivo estas ja eterna;  
En la mond' spirita la dolor' konsterna  
Malaperas en la daŭra ĝoj' interna.

Spirito: Antoni Grabowski  
Mediumo: Francisco Valdomiro Lorenz  
*Reformador*, Jan. 1948, p. 4

Kunlaboris: Aymoré Vaz Pinto

**Antoni Grabowski** naskiĝis en la 11-a de Junio 1857 en Nowe Dobra kaj elkarniĝis la 4-an de Junio 1921 en Varsovio, Pollando. Li estis ano de la Slava Literatura Socio kaj aktivulo de la unuaj movadoj por la Lingvo Internacia. Grabowski dialogis kun Zamenhof kaj estas zupozite, ke tiu estis la unua dialogo en la Lingvo Internacia kun ties kreinto.



**Fariĝu amiko de ĉiuj homoj.  
La amikeco estas trezoro de la spirito,  
kiu devas esti dividita inter la aliaj estuloj.**

## ESPERANTISTOJ AGANTE TUTMONDE EN ROTARY INTERNATIONAL

Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia – *Germanio/Italio*



En nia *Almanako* jam antaŭe ni skribis pri Rotary, unu inter la plej tradiciaj ne registaraj organizaĵoj tutmonde, kiu kunigas milionon da solidaraj volontuloj por doni sian kontribuon al pli justa kaj pli paca mondo. Rotarianoj realigas ĉiujare milojn da edukaj kaj humanecaj projektoj kaj programoj per sia fondaĵo.

Rotary estas konstanta membro de la Unuiĝintaj Nacioj, en kiuj kunlaboras preskaŭ 200 nacioj kun nur tri membroj, kiuj ne estas landoj: La Ruĝa Kruco, La Vatikano kaj Rotary.

Vi eble demandas kial ankaŭ Rotary? Ĉar 40% de la fondintoj de la U.N. tuj post la dua mondmilito estis rotarianoj. Pro tio en ĉiuj sesioj de U.N. rotarianoj daŭre partoprenas.

Tutmonde ekzistas Rotary kluboj, kiuj kunlaboras kun la lokaj administracioj por solvi enlandajn problemojn rilate san-asiston, edukadon, purakvo-provizon kaj solvodon de konfliktoj. En sep internaciaj universitatoj, Rotary ofertas senpage dujarajn kursojn por pacstudoj kaj konfliktsolvo.

Kiel tutmonda organizaĵo Rotary konsistas el 550 distriktoj kun ĉirkaŭ 35.500 lokaj kluboj. La monda prezidanto, la guberniestroj de la distriktoj kaj la klubprezidantoj estas ĉiujare nove elektitaj. Ĉiuj postenoj estas honoraj kaj sekve ne pagitaj. Ĉio tio garantias larĝan demokration kaj konstantan renovigon.

La internacia lingvo Esperanto ekde la dudekaj jaroj de la pasinta jarcento ĉiam estis viva en la rotaria movado. Kiam la britoj portis la idealojn de Rotary al la francoj, kies lingvo tiam estis la monda lingvo (ne la angla kiel nun) ekestis diskutoj pri kian lingvon uzi en komunaj sociaj projektoj. Por ne kvereli pro lingva hegemonio ambaŭ saĝe decidis utiligi Esperanton! Fakte Rotary havis unue francan kaj sekve britan esperantiston kiel mondprezidanton en la tridekaj jaroj.

Post la dua mondmilito, tamen, la angla venkis, sed ni, esperantistoj, ĉie en la mondo, daŭrigas nian taskon konsciigi pri solidara komunikado ĉie.

La miloj da kluboj sekvas komunajn organizajn regulojn kaj ĉiuj membroj, dum siaj profesiaj aŭ turismaj vojaĝoj tra la mondo estas en ĉiuj kluboj ĉiam bonvenaj. Tiu avantaĝo estas speciale interesa por esperantistoj, kiuj partoprenas universalajn aŭ landajn kongresojn, ĉiam kun la ebleco esti bonvena en rotaria klubo de la koncerna urbo. Kaj jen bonega okazo prezenti Esperanton al lokaj Rotary kluboj, kion ni povis fari en Jerusalemo, Osaka, Pekino kaj multaj eŭropaj Rotary kluboj.

Pro la daŭra plibonigo de la komunikad-teknologioj ankaŭ Rotary adaptiĝis al la novaj kondiĉoj. Eksperimente la organizaĵo enkondukis la koncepton de e-kluboj, tio estas elektronikaj kluboj, kiuj ne funkcias per fizikaj renkontoj ĉiŭsemajne, sed la devigaj renkontoj okazas en retgrupoj kun specialaj difinoj.

Tiu nova regulo permesis al tiuj rotarianoj, kiuj estas ankaŭ esperantistoj en tradiciaj kluboj, krei tute novan e-klubon, kiu funkcias nur en Esperanto. La membroj povas loĝi en iuj ajn nacioj, ĉar niaj renkontoj okazas en nia klubhejmo en la monda retejo.



La nomo de la Rotary e-klubo, kiu uzas Esperanton en siaj kontaktoj kaj projektoj, estas bazita en la brazila distrikto 4560 kaj nomiĝas Rotary Club Esperanto Brasil.

La unikaĵo estas ĝia konsisto de esperantistoj el diversaj nacioj, sed sen lingva altrudo pro la komuna neŭtrala lingvo. Tiel ni havas membrojn en Kanado, Usono, Svedio, Germanio, Pollando, Italio, Dubai, Kongo kaj Brazilo.

Sed ĉar rotarianoj, kiel ankaŭ esperantistoj, ofte vojaĝas profesie aŭ turisme, okazas la plej interesaj renkontoj inter la membroj, kiuj praktike ne konas unu la alian.

Dum la lasta UK en Finnlando renkontiĝis klubmembroj, same kiel dum la lasta itala nacia kongreso de Esperanto. Dum NASK en Usono renkontiĝas

kanadaj kaj usonaj rotarianoj. Nia klubo venkis praktike la lingvan baron, sed tamen devas respekti dum siaj vidkonferencoj la internacian hor-diferencon, ĉar dum Wally en Vancouver matenmanĝas, brazilaj membroj tagmanĝas kaj en Dubai Julio jam eventuale dormas...

Jen ekzemplo, kiam pasintsemajne nia membro Julio, loĝanta en Dubai, flugis al Kinŝasa en la D.R.Kongo, por trejni sportistojn en la Pacoludo Ĉukpilko kaj konatiĝi kun rotarianoj en loka Rotary klubo kaj speciale kun nia klubmembro Jean Bosco Malanda Lutete.



Rotarianoj en Kinŝasa



Jean Bosco kaj Julio

Tiuj interkontinentaj renkontiĝoj favoras niajn diverstipajn projektojn. Ekzemple, nia klubo ekipis kongan sancentron en Lukaka per necesaj materialoj por povi servi la lokan komunumon, kie estas granda neceso kontroli la tropikajn malsanojn kiel ebolon, aideson, naskokontrolon, protekton de virinoj ktp.



Kuracistoj en Ukrainio

Klubprezidantoj en Lisbono

Rotary ankaŭ de jaroj financas vakcinojn kontraŭ la poliomjelito. Nia klubo subtenas tiun projekton, same kiel trejnadon de kuracistoj en Ukrainio por kirurgioj de vizaĝrekonstruo.

Se inter la legantoj de nia Almanako troviĝas esperantistoj kiuj sentas same la feliĉon povi servi al tiuj, kiuj bezonas nian helpon, ni volonte atendas vian kontakton en nia retejo <https://rotaryclubdeesperantobrasil.org/>



**Dum vi disponas pri rimedoj  
kulturu la solidarecon.**

**Vi estas socia estulo, kaj bezonas  
la kunvivadon kun via proksimulo, por ke  
vi atingu la celojn por kiuj vi renaskiĝis.  
La solidareco estas unu el la plej valoraj  
iloj por la sukceso de la provo.**

**Fariĝu utila, estu ĝentila, disdonu la bonecon,  
kaj kompanse neniam vi troviĝos sola.**





## LINGVAJ RAJTOJ

José Passini – *Brazilo*



Celante internacian komunikadon, homo ĉiam suferas limigon en sia lingva rajto, kiam estas devigata al la studado de nacia lingvo apartenanta al alia popolo, kiu ĝin parolas denaske.

Kiam oni uzas la lingvon de la interparolanto, tio estas, la lingvo, kiun li uzas ekde sia infaneco, la nedenaska parolanto suferas malavantaĝon, ĉar lia atento estos dividita inter la uzado de la fremda lingvo, kiun li estas devigata paroli, kaj la temo pri kiu li argumentas.

La timo fari prononcajn erarojn aŭ uzi strangajn dirmanierojn timigas tiun fremdan uzanton, ĉar li memoras ridindajn frazojn eldiritajn de alilandanoj, kiam ili klopodas paroli lian lingvon.

Kelkfoje la denaska parolanto bone komprenas kion la eksterlandano diras. Bone komprenas, sed ridetas, ĉar li parolas en nekutima maniero. Ĝis tiam, tiu homo pensadis, ke li bone regas tiun fremdan lingvon, ĉar li kapablas legi, aŭdi kaj kompreni ĝin, ne konsciante, ke la pasiva uzado de naturaj lingvoj estas multe pli facila ol la aktiva, precipe la parolata.

La malfacilaĵoj en la buŝa uzado de fremda lingvo ne estas nur en la prononco, sed en la sintakso, tio estas la kutimo aranĝi la elementojn de la frazoj, kiun ĉiu popolo faras siamaniere.

La avantaĝo kiun ĝuas la denaska parolanto estas ege evidenta, kiam lia interparolanto uzas lian lingvon. Ĉiokaze estas pli facile al la denaskulo diskuti, argumenti, influi, konvinki, vendi, eĉ imponi siajn ideojn, ĉar la nedenaskulo devas atenti ne nur la diskutatan temon, sed ankaŭ zorgi por ne sin esprimi maladekvate aŭ ridinde.

Oni vidas do, ke elekti nacian lingvon por la rolo de internacia komunikilo signifas malrespekti nediskuteblan rajton de ĉiuj popoloj, kiuj ne havas tiun lingvon kiel sian patrinan idiomon, kaj samtempe doni al la popolo, kiu parolas ĝin kiel sian ĉiutagan lingvon, multon da avantaĝoj, kontraŭ kiuj leviĝus la ceteraj popoloj, kiuj plendus la saman rajton ne elspezi tempon, penon nek monon necesajn al la lernado de fremda lingvo.

Neniu saĝa homo kontraŭstaras liberan lernadon de fremdaj lingvoj. Ĉiu idiomo lernita signifas larĝan fenestron malfermitan al alia kulturo, alia vivmaniero, alia mondo. Sed ne estas la sama afero deviga lernado de nacia fremda lingvo por uzado en akademiaj aktivecoj, en profesiaj rondoj aŭ en politikaj diskutoj.

La lingvo de alia popolo lernata pro bezono de komunikado fariĝas vera atenco kontraŭ la egaleco de lingva rajto inter la homoj.

Kiom da jaroj oni bezonas por lernado, kiu ebligas nur mezbonan regadon de fremda lingvo?

Ĉu estas juste, ke la denaskaj parolantoj de difinitaj naturaj lingvoj ĝuu facilecon en la komunikado, dum popoloj de aliaj lingvoj elspezas tempon kaj monon celante komunikadon malbonan, ne trafan, malperfektan kaj eĉ servilan?

La lernado de fremda lingvo por tiuj, kiuj estas devigataj uzi ĝin kiel internacian idiomon, makulas naturan rajton pri egaleco, ĉar devigas iun uzi lingvan kodon prezentantan malsaman nivelon pri facileco / malfacileco inter la du interparolantoj.

Sed, se ĉiuj volus uzi la rajton paroli sian propran lingvon, la komunikado ne estus ebla en la mondo, escepte se oni uzus la helpon de tradukantoj. Efektive, tradukado ja reprezentas pozitivan paŝon en la kampon de respekto al lingvaj rajtoj. Sed, la tradukistoj tre ŝarĝas la komunikadon, precipe la buŝan, kiu, en pluraj kazoj ne sukcesas atingi akcepteblan nivelon de akurateco.

Kvankam ne alvenante al la ekstremo de la kruela ĝitala diraĵo *traduttore traditore* (tradukanto perfidanto), estas facile agnoski ke la figuro de tiu "tria" persono inter verkisto kaj leganto, aŭ – pli grave – inter parolanto kaj aŭskultanto

malpligrandigas – kiam ne komplete viŝas – multajn gravajn nuancojn de skribita teksto aŭ de buŝa komunikado.

Traduki ne signifas nur simple anstataŭigi vortojn de unu lingvo per ĝiaj respondaj en la alian, kiel laikoj ĝenerale pensas. Se tradukado estus tiel simpla tasko, antaŭ multe da tempo komputiloj jam estis operaciintaj same kiel kompetentaj homaj tradukistoj.

Traduki signifas bone kompreni mesaĝon, interpreti ĝin komplete kaj profunde, kaj poste, rekodigi ĝin en alian lingvon. Tiu lingvo ne malofte prezentas specifajn trajtojn en sia strukturo, en siaj esprimrimedoj, kelkfoje tre malsamajn al tiuj de la lingvo en kiu la mesaĝo estis prilaborita en sia origino.

Traduki signifas transigi ideojn de unu universo al alia, ĉar ĉiu homa parola grupo vidas kaj sentas sian realaĵon laŭ propra koncepto, konstruante tiamaniere sian lingvan universon. Naturaj lingvoj estas simbolaj kaj spegulas la mondon ekde sia aparta vidpunkto, ĉirkaŭliniigante la rezonadon ene de lingvaj limigoj de ĉiu popolo. Pro tio, altnivela traduko postulas – krom sufiĉe bona nivelo de kono de la temoj pritraktataj – profundan regadon de la du lingvoj, kio nepre necese inkludas profundan konon de la psikologiaj aspektoj de tiuj lingvoj.

Skribita traduko estas pli simpla. En la soleco de sia kabineto, la tradukisto havas sufiĉan tempon por serĉi, analizi, kompari, mediti kaj, finfine – eĉ post konsulto al kolego – decidi la plej taŭgan formon.

Sed, dum buŝa tradukado – ĉu paralela, ĉu samtempa – la psikologia trudo de eblaj komparoj, fare de personoj kiuj regas la du lingvojn, kelkfoje ĝenas la tradukiston. Krom tio, oni devas konsideri la premon de la tempo. La tradukanto bezonas iel traduki tiun periodon, ĉar alia venos tuj, sen ŝanco esti ripetata. Malgraŭ la kompetenteco de la tradukanto, oni perdas la elokventecon, la voĉajn nuancojn, la vervon, la magnetismon, resume, la senton de la oratoro.

La afero fariĝas pli grava kiam la tradukanto agas kiel interpretisto, antaŭ du interparolantoj. Ĉiokaze aliaj aspektoj devas esti konsiderataj: la fizikan ĉeeston de la personoj; la fizionomion; la mienon; la tembron de la voĉo. Ĉio tio influos favore aŭ malfavore, se ne en la tono, almenaŭ en la elekto de vorto aŭ

de esprimo, kiun li uzos. Interpretisto estas homa estulo, havanta preferojn kaj antipatiojn. Li ne estas maŝino!

Kelkfoje, malgraŭ sia honesta zorgo, la interpretisto ne sukcesas doni al la mesaĝo tiun dezireblan koloron aŭ tiun saman emfazon kiun li aŭdis, ĉar li estas tradukisto, lingvo-interpretanto, kaj ne aktoro kiu kapablas komplete preni sur sin la personecon de tiu, kiu eldiras sian mesaĝon.

Nur en komunikado tre simpla, la mesaĝo ne ricevas la influon de la tradukanto. Kaj tiu ĉi influo varias ekde simpla “maŝina” traduko, estinganta la brilon, la emfazon, la magion de la parolanto, ĝis la ekstremo ebligi konsciajn aŭ nekonsciajn forigojn aŭ aldonojn de ideoj.

Pro tio, en konversacio inter parolantoj de malsamaj idiomoj, la komunikado estos pli efika kiam ĝi okazas rekte, ĉar tiamaniere oni forigas la intermetitan personecon de la tradukanto.

Tamen, rigardante la aferon el la vidpunkto de justeco, de respekto al la lingvaj rajtoj de la popoloj, tiu rekta komunikado devas esti efektivigata pere de unu lingvo, kiu apartenas al neniuj de la interparolantoj.

Al neniuj de la interparolantoj kaj al neniuj nacio. Oni devas atente rimarki, ke lingvo estas kondukilo de moroj, de pensmanieroj, de sociaj kondutoj, de artoj, de kredaĵoj, de aliaj produktoj de aktivecoj de iu socia grupo, tio estas, de la kulturo de iu popolo, kiu uzas ĝin ĉiutage.

Tradukante verkon en nacian lingvon, oni malofte celas ĝian mondan disvastigon, esceptante kiam temas pri scienco aŭ tekniko. Ekzemple: portugallingva literatura verko, ne estos legata de danoj, de hungaroj, de svedoj kaj de aliaj popoloj pere de rekta traduko el la portugala en tiujn lingvojn. Ĝenerale oni trovas portugallingvan literaturon tradukitan en tiujn lingvojn, ne rekte el la originala fonto, sed el traduko jam farita en la anglan aŭ en la francan. Se ne pasos tra la filtro de la interesoj de parolantoj de la angla kaj, ne tiom alte, de la franca lingvo, la verkoj de pluraj popoloj ne havas eblon fariĝi konata en la mondo.

Ankaŭ la kontraŭo estas vera: legantoj de la portugala lingvo ne havas oportunon koni amason da verkoj originale skribitaj en minoritataj lingvoj, kiel

la jam cititaj, escepte se tiuj verkoj estis antaŭe tradukitaj en la anglan aŭ en la francan. Estas facile konstatabla la fakto, ke pluraj danaj, hungaraj, svedaj, norvegaj kaj aliaj verkoj estas tradukitaj en la portugalan, ne rekte el la originalo, sed el ties traduko en la anglan aŭ en la francan. Multaj homaj komunumoj malofte havas oportunun koni la verkojn de aliaj popoloj pro tiu damaĝa selektado.

La rekta traduko en neŭtralan lingvon, kontraŭe, estus destinita al ĉiuj popoloj, kaj multe faciligus senperan aliron al la monda literaturo, al popoloj en kies lingvoj la tradukoj ne estus rentodonaj.

La uzado de internacia neŭtrala lingvo ne estas nur teoria revo, kiel kelkaj diras, ĉar en Eŭropo, la popoloj jam havis efikan komunan komunikilon: la latinan lingvon, kiu estis ilo por diplomacia komunikado, por scienca disvastigado, por politika kaj filozofia diskutado, eĉ por instruado en universitatoj dum pluraj jarcentoj.

Estas notinde, ke la lingvo, kiu estis uzata kiel interlingvo, ne estis tiu sama idioma ĉiutage parolata de la popolo, la tiel nomata *Sermo Vulgaris* (Vulgara Lingvo). Ĝi ne estis tiu lingvo submetita al la nestabileco de la natura evoluado de lingvoj, kiu iom post iom transformiĝis en la diversajn romanidajn lingvojn. La idioma uzata en internaciaj komunikadoj estis produkto stabila, zorge prilaborita de gramatikistoj kaj stilistoj de la latina mondo, kiu hodiaŭ povus esti nomata planlingvo.

La cirkonstanco, ke ĝi apartenis al neniuj popolo, donadis al la latina lingvo la plej gravan kondiĉon por roli kiel interlingvo: la politika neŭtraleco.

La naturaj lingvoj ĉiam alfrontas gravajn reagojn en ilia uzado kiel internaciaj lingvoj. Reagoj, kiuj varias laŭ la regionoj, kie oni pretendas uzi ilin. Verdire, ne ekzistas eĉ unu natura lingvo, kiu garantias al sia parolanto liberan uzon en la tuta mondo, eĉ ne en la tuta Eŭropo.

Malgraŭ tio, kelkaj nacioj politike kaj ekonomie potencaj vikle agas kaj investas altajn sumojn, celante disvastigi – eĉ trudi – siajn idiomajn kvazaŭ internacia komunikilo, ĉar neniuj povas nei la politikan prestiĝon kaj ekonomiajn avantaĝojn, kiuj revenas kiel altaj dividendoj, pro la bone faritaj investoj.

Agnoski la uzadon de lingvo de alia popolo kiel dua lingvo signifas rezigni aŭtentikan nacian lingvan rajton. Signifas levi alten la landon uzantan tiun lingvon al la rango de kultura metropolo. Tia agado signifas psikologie sin submeti al ĝi, akceptante ĝian politikan kaj kulturajn influon, en la plej profunda senco de la vorto.

Reliefigante la gravecon de tiu ĉi problemo, oni ne defendas absurdan naciismon, tute fermitan al renovigantaj ideoj alvenantaj de eksterlando. Saĝeco montras, ke neniu lando efektive progresas se ĝi sin fermas al la saniga konfrontado kun ideoj generitaj en la etoso de aliaj kulturoj. Oni deziras nur elmontri la riskon de perdo de naciaj karakterizoj, kiel konsekvenco de forta influo veninta el difinitaj kulturoj, kiun oni nekonscie ricevas.

Nuntempe, oni konstatas la pligrandigon de konscio rilate al la konservado de naciaj trajtoj ne nur en malgrandaj etnaj grupoj, sed ankaŭ en nacioj. La zorgema konservado de tiuj propraj karakterizoj estas esenca por subteni la unuecon de socia grupo, ĉu malgranda ĉu granda. Kaj en la centro de tiuj kungluaj faktoroj de unu popolo, de unu etna grupo, troviĝas la lingvo, kiel determina faktoro por la subteno de nacia unueco.

La nivelo de tiu konsciado pri la rolo de lingvo kiel faktoro de aparta etno estas tiel alta ke, en la jaro 1966, en Barcelono, kongreso okazigita de uzantoj de minoritataj lingvoj produktis dokumenton titolita *Universala Deklaro de Lingvaj Rajtoj*.

Dante Alighieri bone komprenis la valoron de lingvo kiel esenca elemento por reunuigi Italion, kiam, en la dektria jarcento verkis sian faman *Dian Komedion*. Li uzis la toskanan dialekton – kun kelkaj malgrandaj adaptoj – celante, ke ĝi fariĝu la lingvo de la tuta Italio. La uzado de lokaj dialektoj daŭris kaj restas ankoraŭ en la intimeco de familia vivo, sed la akcepto de la tiel nomata *Madrelingua* (patrina lingvo) estas fakto en la komunikado oficiala kaj neoficiala en nacia nivelo.

En la deknaŭa jarcento, la saman ideon havis Eliezer Ben-Jehuda, kiu simpligis la strukturon de la hebrea lingvo, renovigante ankaŭ ĝian vortprovizon, celante kapabligi ĝin al la moderna parolado kaj servi kiel nacian lingvon de Israelo.

Paralele al tiu konsciigo pri naciaj valoroj, oni rimarkas, ekde kelka tempo, la naskiĝon de planeda konscio. Nuntempe, popoloj kiuj ankoraŭ ne lernis dividi siajn riĉaĵojn, jam dividas kaj partoprenas almenaŭ komunajn problemojn. La urĝa bezono konservi la loĝeblecon de la Planedo oportunigas, tiurilate, pli da dialogoj ol sukcesis eĉ la religioj.

Naskiĝas en la homo la ideo pri apartenado al unu komunumo, kiu transcendas la mallarĝajn limojn de la nacioj. Homo jam komencas vidi mondon, en kiu la uzado de inteligenteco sin turnu ankaŭ al la kreado kaj kulturado de paca klimato.

La apero de planeda konscio estas pli ol dezirebla – ĝi estas nepre necesa al la survivado de la Homaro. Kaj tiu bonaŭgura planeda konscio devas aperi ne kiel opozicio al legitima naciismo, kulturita de ĉiuj popoloj, sed kiel pli granda dimensio, kiel forta antaŭeniro de la homa penso.

Tiu konscio pri apartenado al komunumo, kiu ŝvebas super la mallarĝaj naciaj limoj prezentas novan dimension en la historio de la Homaro. Sed ĝi ne povos plene efektiviĝi pere de simplaj politikaj katekizadoj.

Nur pli granda kaj efektiva homa kontakto ebligos la aperon de tiu alte dezirinda supernacia konscio.

Societoj, organizaĵoj, laborgrupoj monde agantaj ekaperas en granda kvanto. Ili signifas novan ŝtupon de la evoluo en la homara historio. La homa socia konscienco, kiu komenciĝis kun la elvolviĝado de la triba konscio, nun pligrandiĝas, transpasante la naciajn limojn.

Ĉiokaze oni devas reliefigi la notindan agadon de Eŭropa Unio, kie dudek ok landoj kunvivadas, serĉante pacajn solvojn por siaj komunaj problemoj.

Aliflanke, oni bedaŭras, ke ĝuste sur tiu kampo – tiel promesoplena – eble la plej grava strebo celanta pacan kunvivadon en la tuta historio de la Homaro – perdiĝas la plej noblaj klopodoj celantaj inteligentan kaj vere humanecan kunvivadon, pro la fortaj lingvaj baroj, kiuj stariĝas, tio estas, la uzado de dudek tri malsamaj lingvoj.

Veraj lingvaj baroj ĉar – pro la manko de komuna lingvo, libere agnoskita de ĉiuj – oni devas uzi tiujn kriplajn tradukajn rimedojn jam cititajn. Ŝajnas ironio la

fakto, ke jam ekzistas komuna nenacia monero libere kaj inteligente adoptita, flanke de manko de interkonsento pri adopto de komuna lingvo.

Kial oni ne adoptas neŭtralan lingvon, artefarite kreitan kiel Eŭron? La respondo estas evidenta: Ĉe unu flanko estas la terura regado de nacioj, kiuj ne volas rezigni la facilecon, kiun ili havas pro la ne bezono lerni alian lingvon, tiamaniere sin metante en la saman nivelon kun la aliaj nacioj, kiel indikas la justeco; ĉe la alia flanko survivas la servileco kaj la kontentiĝema spirito de la reprezentantoj de la ceteraj landoj.

Claude Piron, denaska parolanto de la franca, psikologo, profesoro, poligloto, tradukisto de UNO kaj de MSO dum pluraj jaroj, denuncas, ke en la sidejoj de Eŭropa Unio ne estas fidela observado de la lingva rajto de ties ŝtataj membroj:

*“(…) en la sekretario, ĝenerale oni ne uzas la nederlandan, la gregan, la finnan kaj aliajn lingvojn “nefortajn”. Kelkaj lingvoj estas “pli egalaj ol la aliaj”, ĉu kiam iu deziras esti dungita kiel funkciulo de Eŭropa Unio, ĉu kiam unu civitano aŭ parlamentano bezonas interkomunikiĝi kun la administraciantoj.”*

Sur la scienca kampo la situacio estas la sama. Sciencistoj vojaĝas al malproksimaj lokoj celante prezentadon de la rezultoj de siaj esploroj, sed ilia prezentado ne disvolviĝas tiel rapide kaj efike kiel ili esperis pro la lingvaj malfacilaĵoj.

Amaso da altvaloraj spertoj ne estas komplete partoprenataj, aŭ eĉ perdiĝas, kiam mankas komuna lingvo en internaciaj simpozioj, kongresoj kaj similaj renkontiĝoj.

La malprofito estas malpligranda kiam temas pri skribita komunikado, pere de libroj aŭ de periodaĵoj, ĉar la leganto havas tempon por uzi vortaron aŭ peti helpon de tradukisto.

En internaciaj kongresoj, kie partoprenantoj de sesioj por sciencaj komunikadoj aŭ debatoj devenas el malsamaj landoj, la lingvaj baroj malpligrandigas la rezultojn de la renkontiĝo.



En tiuj kongresoj, la malobservo de la lingvaj rajtoj de la uzantoj de minoritataj lingvoj estas facile konstatebla.

Estas tre evidente, ke la parolantoj de la tiea nacia lingvo – suprenigata al la kondiĉo de internacia komunikilo – ĝuas multe pli da facileco por prezenti kaj debati siajn ideojn. Pro tio, multaj el la partoprenantoj de tiaj kongresoj legos en siaj hoteloj la tekstojn de prelego aŭ de komunikado bone aŭdita, sed nur duonkomprenita.

Legante la tekstojn, ili pli bone povos kompreni la enhavon, sed perdis la oportunon debati, aŭ peti klarigojn pri la temoj.

Se, kiel demonstrate, naturaj lingvoj ne taŭgas por la rolo de interlingvo, la unika alternativo estas la uzado de konstruita lingvo, kiu devas esti neŭtrala, sen iu ajn politika, filozofia, kultura aŭ aparta etna ligilo.

Tiu ĉi ideala kondiĉo estos plenumata nur de idiomo ligita al neniu popolo, tio estas, lingvo konscie kreita celante la rolon de internacia komunikilo, lernota de ĉiuj popoloj, kiel dua lingvo. Tiu ĉi estas la justa kaj simpla solvo por la problemo, ĉar ĉiufoje la lingvoj de interparolantoj estos malsamaj, ili uzos tiun lingvon internacian.

Tiu monda komunikilo jam ekzistas. Ĝi komenciĝis kiel simpla projekto eliranta el la cerbo kaj el la koro de idealisma junulo, kiu, antaŭvidante la mondon, en kiu li ne sukcesus vivi, prezentis, en 1887, anticipan solvon de tiu ĉi grava homa problemo.

Kvankam ne profesia lingvisto, lia universala kaj socilingvistika konceptoj transcendis la epokon. Li sciis, ke estis lanĉanta nur projekton, proponon ebligantan naskiĝon de lingvo, kiu reprezentos gravan paŝon, veran markoŝtonon en la historio de la Homaro.

Oni devas rimarki, ke tiu ĉi paŝo en la historio de monda komunikado ne estis farita de iu ajn ekstera forto. Ĝi devenis el la evolua forto imanenta en ĉiu homa estulo, ĉar la monda komunumo, kiu adoptis, kiel ilo por supernacia komunikado, la projekton de la pola junulo, donis al ĝi la spiron de vivo, suprenigante ĝin al la stato de vivanta lingvo, kiu jam konas maturiĝan periodon jam de pli ol unu jarcento.

La komunumo uzanta Esperanton, malgraŭ tio, ke ĝi konsistas el la plej vasta etna kaj socia kultura varieco, kiun la mondo konas, tiu komunumo konstituas harmonian homan grupon, kiu kuniĝas ĉirkaŭ noblaj idealoj pri frateco, komprenado, respekto al ĉiaspeca kulturo, al etnaj diversecoj kaj precipe al la legitima rajto sinkomuniki rekte kun la tuta mondo.

jose.passini@gmail.com



**Ne laciĝu ami.**

**Eble la respondo de la amo ne venos tuj.  
Kredeble vi surpriziĝos pri la reagoj, kiujn  
ĝi favoras. Eble kelkaj el ili estas malkuraĝigaj.  
Okazas ke, nekutimiĝintaj al la puraj sentoj, la  
personoj reagis per mekanismon  
de memdefendo.**

**Tamen, insistante, vi sukcesos elmontri  
la gravecon de tiu senlima sento, kaj vi imitos  
tiujn, kiujn vi amas, ricevante returne  
la benon, kiu envolvas ĝin.**

**Amu do ĉiam.**



## PRI LA SURAT SHABD JOGO

Szilard Koczkas – *Slovakio*



Karaj geamikoj! Mi estas hungardevena esperantisto el Slovakio, Eŭropo. Bedaŭrinde mi havas kelkajn malsanojn, pro tio mi decidis tuj partopreni jagon, kiam mi trovis anoncon pri ĝi. Pri jago mi sciis nur tiom, ke ĝi havas multe da sekcioj, branĉoj, kaj ĝi estas tre utila kaj por la korpo, kaj por la animo.

Temas pri Surat Shabd Jogo, kiu signifas: “Instruoj de sanktuloj”, laŭvorte, “Surat”, ligiĝo kun Dio, “Shabd”, meditado.

La unua leciono instruis, ke “ni ĉiuj konsistas el tri partoj: fizika korpo, animo kaj intelekto”. La jago originas el hinduismo, Hindujo. Al ĝi povas adaptiĝi eĉ ateistoj! Vi ne devas esti religiemaj, sed se tamen, jes, vi restu ĉe viaj religioj, kaj vivu etikmaniere. Mi speciale kredas la universalan intelekton/racion kaj la reenkarniĝon.

Ni eklernis, ke ni ĉiam devas pensi pozitive, ni forlasu la negativajn sentojn kaj pensojn. Pensi pozitive kostas nenion, kiam la negativa pensado kaŭzas malsanojn, kaj ĉiu scias, ke malsanoj kaj resaniĝoj kostas multon. Ĉiujn niajn pensojn (kaj pozitivajn kaj negativajn) ni sendas en la universon, kaj ili multobliĝinte revenos. Ankaŭ pro tio estas pli utile pensi ĉiamaniere pozitive, ĉu ne?

Poste, ni lernis pri la animo. Ĝiaj ecoj, proprecoj, karakteroj estas la jenaj:

1. Senlima saĝo, prudenteco, konscienco.  
Dio. Se ni ne trovas helpanton aŭ



Hazur Baba Sawan Singh Ji Maharaj

respondojn, ni trankvile demandu nian propran animon. Ĝi estas tiom saĝa, ke respondas ĉion. En ni ĉiuj estas konscienco. Certe jam ĉiu aŭdis interne, en sia memo, ian voĉon, donatan konsilon, ke ni faru, aŭ male, ke ni ne faru ion, ĉu ne?

2. Senmorteco. La animo ne konas la morton. Ĝi ne havas fizikajn gepatrojn, ĝi ekzistis kaj ĉiam ekzistos.
3. Senkondiĉa amo. Tiamaniere amas nin Dio, kaj ni provu fari la samon! Ni ne faru kondiĉojn! Ni amu la aliulojn tiajn, kiaj ili estas.
4. Ekzistado sen timo, sentimeco. Nia animo estas la fonto de ĉiuj fortoj. Se ni kredas la reenkarniĝon, ke nur fizika korpo mortos, ke nia animo vivos plu, kial ni timu la morton? La animo vivas por eterne. Post la fizika morto, ĝi vivas plu en aliaj dimensoj, ĉiam prosperanta, evoluanta.
5. Universala kunaparteco, kohereco (aparteni unu al la alia). La animo estas lumo kaj amo. En la universo ĉio kuntenas, koheras, interrilatas kun ĉio, eĉ reciproke.
6. Beato (utilo, bono, feliĉo de la homaro). La animo en sia originala stato estas en ekstazo, ravita, sorĉita, febra kaj ĉiam, ĉie, ĉiel ĝi volas esti tia.

Ĝi neniam deziras malbonon, negativaĵojn, suferojn. Ĝi por eterne volas esti feliĉa.



Sant Kirpal Singh ji Maharaj

Karmo: pagado de niaj ŝuldoj faritaj pere de niaj pensoj, vortoj, agadoj, punitaj laŭ Dia projekto kaj reguloj naturaj.

1. Karmo samĉita: karma deponejo
2. Karmopralabda: karmosorta (sortkarmo).  
Nia propra destino
3. Karmo kriĵamana: (ĉiu)taga karmo

Aparte ekzistas ankaŭ jena, menciinda, specifa situacio: "Neh karmo": stato senkarma (dum la meditado).

La meditado estas procezo feliĉplena. En la cerbo ĝi, pere de nervosistemo, transformas niajn pensojn, nian konduton, nian vivon. Ĝi estas aliformiganto de nia personeco. La meditado estas speciala metodo por vojaĝado en nia propra memo pere de interna voĉo, sono, lumo, brilo.

La fajrero de dieco povas helpi nin ekkoni nian memon, nian propran internon, kaj retrovi Dion. Ĝi donas al nia animo flosforton por atingi vojaĝadon en la internaj regionoj. Ĉi tiun fajreron dum la adeptiĝo ekbruligas en ni majstro spiritala, klariĝinta persono, t.n. vivanta sanktulo. La meditada teĥniko, instruita pere de Li, malfermigas fenestron al nia internaĵo.

Laŭ Dia projekto la animoj vivas en multnombraj regionoj, post longega vagado revenontaj al Dio.

1. Fizika regiono. Regiono de la korpa konscienco. Nia nuna, tera mondo.
2. Transpasa regiono, inter tera kaj astrala regiono (tuja estado postmorta. De tie ĉi originas la mortproksimaj spertoj.)
3. Astrala regiono. Kaptilo de vidaĵoj, allogaĵoj, sonoraj muzikoj. La loĝantoj vivas en astralaj korpoj, en la formoj eteraj.
4. Regiono kaŭzala. Atento al deflankigitaj efikoj, esplorantaj ĉiujn niajn antaŭajn vivojn, eĉ pli brilanta regiono ol la regiono astrala.
5. Regiono suprakauzala. Mergiĝi en la lago nektara, t.n. "Mansarovar". Tie, nur la animo spertas, kiu estas vualita nure kun diafana tavolo. Ĝi konsistas el konscienco. La loĝantoj estas puraj animoj, t.n. Hanŝoj. Spertado sen bariloj de menso, intelekto, lingvo.
6. Regiono spiritala, t.n. "Sach Khand" (Saĉ Khand). Nia vera hejmo, la hejmo de ĉiuj animoj. La animoj estas gutoj el la oceano dieca. Senfina amo, tute spiritala regiono, la plej alta grado de amo kaj beato. Ne



Sant Darshan Singh Ji Maharaj

ekzistas materio, nek iluzio, kimerio. Nia animo mergiĝas en plenan diecon. Ĉesas: doloro, sufero, malĝojo, tristo, ĉagreno, tempo, morto.

Male, ekzistas, ĉeestas: pacemo, kvieto, senfina feliĉo, beateco, plenumiĝo, efektiviĝo, amo.

Dum nia vagado la faktoroj malhelpantaj la klaran interpreton povas esti: karmaj ŝuldoj, ŝarĝoj, negativaj pensoj, vortoj, agoj, niaj deziroj, aspiroj.

La karman saldon senkondiĉe ni estas devigataj pagi. Pro la bono ni ricevas rekompencan, donacon. Pro la malbono, kompreneble, ni ricevas punon, sankcion.



Sant Rajinder Singh Ji Maharaj



**Ne ekzistas infano – eĉ unu sola – kiu ne petas  
amon kaj helpon, edukadon kaj komprenon.**





## LA VIVO EN LA SPIRITA MONDO

Bob Phelp – Aŭstralio



Havis viro hundon. Tiu hundo certe ne estis Granda Dano kia mi, sed tamen hundo. Ĝi estis hundeto blanka! Mi eĉ tre bone scias, ke ne ĉiuj hundoj estas blankaj, ĉar mi vidis kelkajn brunajn kaj kelkajn nigrajn. Sed nun mia tasko estas transdoni al vi, miaj gelegantoj, la veron pri io, kio almenaŭ al mi estas tre grava, eĉ gravega, kaj espereble iom post iom tio sama fariĝos ankaŭ al vi gravega!

Sed tiu viro kun la hundo estis bona. Ankaŭ la hundo estis bona, sed la plej multaj hundoj estas tiaj, ĉu ne? Sed ĉar ankaŭ la viro estis bona, ŝajnas al mi, ke decas nomi lin “bonulo”, tio sufiĉas por li, tion farante ni plaĉas ja ankaŭ al nia majstro Zamenhof, ĉu ne? Tiu, kiu inventis ne nur la vorton “bonulo”, sed la tutan lingvon, kiun vi nun ĝuas legadi! Tiu eta blanka hundeto estis, de sia bona mastro, nomata Ĝivo. Tiu benata nomo signifas “vivanta animo”! Ĉu tio gravas? eble ne al vi, sed al la eta blanka hundeto tio eĉ treege gravis, ĉar tio estis ja ĝia nomo. Mi supozas, ke al vi gravas ja ankaŭ via nomo, kvankam ĝi plej verŝajne ne estas Ĝivo!

Nu, Ĝivo kaj ĝia homo estis eĉ bonegaj amikoj. Fakte la viro loĝis tute sola en sia domo ĝis, iun belan tagon, venis en lian vivon Ĝivo. Ekde tiam li ne plu estis sola kaj ankaŭ Ĝivo ne plu estis. Ni ne bezonas scii, ĉu ĝi estis sola antaŭ ol ĝi renkontiĝis kun la viro, kies nomo estis, ne, ĉion konsiderinte, mi subite memoras, ke ni jam decidis, ke ne gravas tio, kio estis lia nomo!

Pasis multaj jaroj kaj homaj kaj hundaj. La homaj jaroj estas, laŭ surteraj mezuroj, multe pli longaj ol hundaj. La bona viro fariĝis pli kaj pli laca, sed Ĝivo fariĝis eĉ pli laca ĝis iun belan matenon ĝi endormiĝis por ne plu vekigi. Almenaŭ ne sur tiu ĉi planedo!

Tio ne precize plezurigis la bonulon, kies hundeto Ĝivo estis. Li karesis la korpon de sia amata hundeto, portis ĝin en la ĝardenon kaj enterigis ĝin.

Li reeniris en la domon, fakte en la kuirejon, kaj preparis por si tason da teo. Nu, teo sugestas, ĉu ne, ke tiu bonulo, plej bona amiko de Ĝivo, loĝis en Aŭstralio aŭ alia lando, kies ĉefa lingvo estas la angla. Se mi estus skribinta "tason da kafo", oni povus supozi, ke li loĝus en kiu ajn alia lando, ĉu ne?, kie la angla lingvo ankoraŭ ne estas la ĉefa!

Tiam ekpasis ankoraŭ kelkaj jaroj, sed ne tiom, kiom pasis antaŭ ol Ĝivo forpasis. La bonulo fariĝis ne nur tre, sed multe pli laca, kaj iun belan tagon li simple ne vekigis en sia materia lito, sed anstataŭe vekigis en iu bela lito en iu belega regno de la Spirita Mondo.

Apud la lito, sur kiu li kuŝis, staris belega spirito, juna kaj belega, kaj tute ne laca. "Bonan matenon" diris tiu. Ĉu vi ĝuis vian tempon sur la Tero? "Jes, sed ĉu mi ne plu estas sur la Tero?" demandis la bonulo. "Ne plu", respondis la belega spirito, "vi nun estas en la Spirita Mondo" kune kun mi. "Jes, mi vidas vin, sed kiu vi estas?" demandis la bonulo. "Ĉu vi ne rekonas min?" demandis la spirito. "Mi estas via plej bona amiko, mia nomo estas Ĝivo, vi mem donis tiun belan nomon al mi, kiam vi kaj mi la unuan fojon renkontiĝis sur la Tero". "Jes, mi memoras Ĝivon, sed li estis eta blanka hundo", respondis la bonulo.

"Vi nun ripozu iom pli longe. Poste mi preparos por vi tason da kafo, ĉar ĉi tie en la Spirita Mondo kafo estas preferata al teo. Vi ne plu loĝas en Aŭstralio, sed baldaŭ vi mem eltrovos tion. Aŭstralio certe ne estas la plej grava loko en la universo!"

"En la Mondo de la Spiritoj oni ne laboras por gajni monon. Mono estas elpenŝaĵo de homoj. En la Spirita Mondo ĉiu helpas kaj subtenas unu la alian, mono estas superfluaĵo. En la Spirita Mondo neniu surhavas uniformojn, por kio surmeti uniformojn? Ĉu por ŝajnigi sin pli grava ol iu ajn? En la Spirita Mondo neniu mortigas iun aŭ ion ajn. Kaj tie neniu kuiras siajn dorlotbestojn nek manĝas ilin. Kiu ne preferus vivi tie ol sur la Tero?" "Sed mi tamen sopiras al mia surtera vivo", plendvoĉe elbuŝigis la bonulo.

"Ne maltrankviliĝu pri kio ajn" diris Ĝivo. "Vi nun reendormiĝu dum mi laboretos en la Spirita Kuirejo".

Baldaŭ poste la kafo estis preta, kaj Ĝivo trinkis ĝin, ĉar li sentis, ke la bonulo meritas iom pli da dormado. Sed post tri tasoj da kafo Ĝivo tamen kompatis la bonulon kaj vekis lin. “Jen via promesita bongusta taso da kafo”, li diris. “Koregan dankegon”, respondis la bonulo, kaj trinkis ĝin. “Vi faras eĉ tre bongustan kafon ĉi tie en la Spirita Mondo, sed ial mi ege sopiras al mia bona vivo surtera”. “Jes, ĉi tie ni ŝatas plaĉi unu al la aliaj,” respondis Ĝivo. “Ŝajnas ke sur la Tero tro multe da homoj preferas ignori unu la alian aŭ almenaŭ malpermesi al aliaj homoj vojaĝi kien ajn sur la Tero, kvankam ili ja naskiĝis tie! Mi aŭdis, ke iu malpli bona homo sur la Tero intencas konstruigi grandegan kaj malbelegan muron inter du landoj. Ĉu vi vere deziras ree loĝi tie, kie tia malpli bona homo loĝas? Ĉi tie ni faras ĉion eblan por amikiĝi kun kiu ajn! Sed ellitiĝu kaj venu kun mi, atendas por rerenkontiĝi kun vi multege el viaj bonegaj geamikoj el la Tero”.

Kaj vere, ili eliris el la domo kaj eniris en la ĝardenon. La belegan spiritan ĝardenon. Tie staris multege da belegaj spiritoj kun larĝe ridetantaj vizaĝoj. “Bonvenon, vi amuza, sed tamen bonega amiko”, ili ĉiuj diris. “Dankon, eĉ dankegon”, diris la bonulo, “sed mi ŝatus reveni al la Tero, kie mi pasigis tiom da tempo kune kun miaj multaj geamikoj dorlotbestoj! Sur la Tero mi povis perlabori multe da mono, poste elspezi ĝin aĉetante bieron, cigaredojn, viandon, drogojn kaj aliajn necesajojn. Mi povis amuzi min malĝojjigante aliajn homojn. Sed ĉu mi konas vin, viajn aspektojn mi ne bone memoras!”

“Ha, ha, ha”, ili respondis. “Ni ĉiuj estas viaj dorlotbestoj, kun kiuj vi ĝuis vian surteran vivon. Ni estas viaj birdoj, katoj, fiŝoj, ĉevaloj, hundoj, testudoj, kunikloj, anasoj ktp.” “Ĉu vere, mi apenaŭ povas rekoni vin?” “Bone, eĉ bonege, kamaradoj kaj kunuloj, ni montru al li nian tiaman aspekton. Li vere meritas memori ĉiun el ni, ĉu ne?” demandis Ĝivo.

Kaj eĉ treege rapide, eĉ rapidege, fakte fulmorapidege, ili ĉiuj ŝanĝiĝis en siajn iamajn surterajn aspektojn. La bonulo ridegis kaj ploris samtempe. Neniam antaŭe li estis tiom feliĉa. Li certe ne plu sopiris al sia surtera vivado, li ekde tiam komencis ĝuadi sian novan vivon en la Spirita Mondo kune kun siaj multaj bonegaj geamikoj, birdoj, katoj, fiŝoj, ĉevaloj, hundoj, testudoj, kunikloj, anasoj ktp. Jes, eĉ gekokoj, mi preskaŭ forgesis ilin!

“Nun, ĉar ekde nun ni ĉiuj rekonas unu la alian, ni ne plu bezonas surhavi la aspektojn de tiom multe da bestoj, aŭ ĉu? Ĉar en tiu ĉi regno de la Spirita Mondo ni ĉiuj egalas, io, kio ne fakte sur la Tero, mi proponas, ke ni ĉiuj restu en tiuj ĉi niaj spiritaj vestoj, ĉar plej verŝajne ni ne plu reenkarniĝos kiel bestoj!”

Kaj tiel fariĝis. La bonulo daŭrigis sian vivon en la Mondo Spirita kune kun siaj multaj veraj geamikoj.



**Studu vi mem, observante, ke la  
memkono portas humilecon kaj sen  
humileco estas neeble esti feliĉa.**





NE LA INFERA IDEO **LA INTERNA IDEO** DE ESPERANTO  
& LINGVA JUSTECO (P. UNU)

**PREZIDENTOJ TRUMP KAJ ĜI NEGOCAS  
PRI LA KORPORACIA ANGLA LINGVO (P. DU)**

Paul Desailly – Adelajdo, Aŭstralio

<https://paw.princeton.edu/article/language-idealists>



Alparolante naŭcent esperantistojn el tridek landoj, doktoro Ludoviko Lazaro Zamenhof, en Ĝenevo, 1906, skizis la internan ideon de sia 19-jara internacia helplingvo: “Ni ĉiuj konscias tre bone, ke al laborado por Esperanto instigas nin ne la penso pri praktika utileco sed nur la penso pri la sankta, granda kaj grava ideo, kiun lingvo internacia en si enhavas. Tiu ĉi ideo — vi ĉiuj sentas ĝin tre bone — estas frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj.”

Komercaj eblecoj de Esperanto fariĝas memevidentaj post kiam la bezono de internacia help-lingvo estas enkapigita. Ĝia eŭfonio en versado, precipe ĉe la kulmino de klasika poezio, same kiel kun ĝia fleksebleco rilate al dividado de humuraj rakontoj, estas bone dokumentita. <http://aea.esperanto.org.au/ftp-uploads/ESK-127-jun2017.pdf> (p. 24 - 26) <http://aea.esperanto.org.au/ftp-uploads/ESK-126-mar2017.pdf> (p. 19 - 22.) Kial do inter ni abundas tiuj, kiuj malakceptas, malkonfirmas aŭ mokas hom-raĵtajn dimensiojn de la principo de universala helplingvo, ĝia denaska utilo por protekti minoritatajn lingvojn kaj por citi Kavaliron Abdul Baha: “ĝi estas la ilo de la progreso kaj evoluo de ĉiuj rasoj”?

Unu celo — de miaj kvin vojaĝoj al Japanio kaj al tridek urboj de Ĉinio, eĉ trans la riveron Yalu al Norda Koreio, kaj al Mongolio (Huhehoto kaj Ulan Batoro), Barato, Nepalo, Turkio, Israelo, Irano kaj piede al Vjetnamio bone ekipita per la zamenhofa lingvo de la monda paco — celas plibonigi rilatojn inter aziaj landoj subigitaj de eŭropanoj en diversaj eraoj. Ke junaj aziaj aktivuloj ofte inter si komunikas balbute kaj paradokse en la nacia lingvo de iamaj imperiistoj estas problemo, kiun la politike nepartia kaj religie neŭtrala Esperanto-movado povas solvi en kelkaj monatoj.

**Unuiĝintaj Nacioj pledas por lingva justeco kaj celebras *Internacian Tagon de la Patrina Lingvo*:**

<https://www.un.org/en/observances/mother-language-day>

[http://www.linguistic-rights.org/21-02-2020/GEP\\_LINGV\\_2020\\_EN.jpg](http://www.linguistic-rights.org/21-02-2020/GEP_LINGV_2020_EN.jpg)



Paŭlo (ne la Apostolo) Desailly, Ĉina Radio Internacia. Beijing

En Tianjin Universitato de Komerco antaŭ du jardekoj, du ĵurnalistoj enketis ĉe mi pri mia Esperanto-kurso. Ankoraŭ ili apartenas al Esperanto-teamo de dek oficistoj de Ĉina Radio Internacia, organo de la registaro. Scivolemaj pri la bonefiko de Esperanto al miaj okupataj studentoj kaj kolegoj, ili dissendis bonegan programon pri mia klaso, ĉar ĝi inkluzivis ĉinajn kaj japanajn Esperanto-komencantojn, kiuj feliĉe enmiksiĝis kune en la kampuso-vivo sen travivi sino-japanan fremdiĝon, kiu ofte okazas en Ĉinio pro la 2-a Mondmilito. Ve, eĉ hodiaŭ multaj civitanoj de tiuj du potencaj nacioj restas neamikemaj pro politikaj eventoj antaŭ 75 jaroj aŭ ĉar la angla lingvo estas tro malfacila.

En Sud-Koreio, Japanio kaj Ĉinio, fruktodona triangulo de Esperanto-landoj, kie dum jardeko ĝis 2006 mia kariero baziĝis je instruado de la angla, mi malofte aŭdis plendon, kaj neniam de lokanoj, ke la eŭrocentrismo de Esperanto fortunigas azianojn aŭ tro malfacilas por ili. Kvankam vortigita el egalisma pensmaniero, tiu erara vidpunkto estas foje dirita en Ĉinio de unulingvaj instruistoj de Britio kaj Usono. Vizitante Japanion, kie anglalingva instruado restas deviga, malgraŭ jardekoj da magraj rezultoj, la vizitanto tuj rimarkas, ke la lingvo de Ŝekspiro estas fiasko por ĉiuj, escepte de iuj talentaj junaj lingvistoj. Simila cirkonstanco daŭras longtempe en Ĉinio, kie la komerco pri instruado de la angla estas enradikiĝinta. En ĉiu lernejo, pli ol 99% de la viktimoj (pardonon, t.e. lingvo-studentoj) sukcesas en ĉiuj ekzamenoj, diplomiĝante kun ĝojo kaj fiero sendistinge de ilia parolata angla nivelo, kaj tre kontentige al la nekonsciaj gepatroj, kies lernejo kotizoj pagis mian grandan salajron.

Absurda situacio ekzistas en kiu multaj *privataj* universitatoj, kune kun la ĉina registaro, ĉefrolas en ĉi tiu multekosta ŝarado. Apenaŭ unu diplomiĝinto el dek atingas interparolan fluecon malgraŭ sennombraj horoj por studi la 'diablan' anglan lingvon. La Komunista Partio de Ĉinio en siaj intertraktadoj kun Prezidento Trump rajtas demandi lin, ekvilibrigi import-eksportajn aferojn, kalkulante la lingvan orminejon de Usono posedata: la enormaj elspezoj de Ĉinio por allogi instruistojn de la angla kaj por sendi mult-multajn junulojn al usonaj lernejoj por ricevi subsojlan edukadon en lingvo, kiun multaj el ili ne regas, estas la plej granda malsukceso negoci justan interkonsenton, kiun unulingva Prezidento Trump povus ricevi. Aliflanke, instrui Esperanton estas multfoje pli rekompensa kaj relative facila, por studentoj kaj instruistoj egale!

Ĉar Germanio kaj Japanio estas riĉaj landoj, kaj la ekonomio de Barato rapide kreskas kaj popularaj estas la portugala kaj la hispana lingvoj, la nombro de oficialaj lingvoj ĉe Unuiĝintaj Nacioj eble atingos ok aŭ dek. Ĉar administraj kostoj por aldoni lingvojn tie fariĝas eksponenciale kostaj, tiel malhelpante elspezojn al urĝaj humanaj bezonoj, ni esperu, ke la sekva UN-lingvo efektive helpas solvi la mondan lingvo-problemon, aldonante en prudentaj stadioj ne-seksisman kaj facile lerneblan universalan helplingvon sen koloniaj makuloj.





**Amo estas la forto de la vivo kaj laboro ligita  
al la amo estas centralo produktanta feliĉon.**



## SERĈE DE SUPERA HEROO!

Araceli Aguilar – Meksiko



Estas vendrera vespero, kaj la labora kunsido ne okazis, do Mario alvenis hejmen frue. Estis tre laciga semajno, kaj ankoraŭ estas hejmaj farendaj taskoj.

Li fermis la pordon kaj piediris iomete. Li deziras nur ripozi, almenaŭ kelkajn minutojn... Baldaŭ lia filino Dany telefonos lin, kaj li iros preni ŝin.

Mario lasis la aĉetitan panon sur la tableto, kiu estas proksime de la pordo.

Li loĝas sole en negranda, sed tre komforta apartamento, ĉe trankvila strato, en la plej agrabla parto de la urbo Queretaro, en la mezo de la lando Meksiko. Li lasis sian teknon sur brakseĝo kaj demetis la kravaton kaj la jakon, lasante ilin senatente sur la sama brakseĝo; iom pli da paŝoj kaj li alproksimiĝis al sia preferata brakseĝo kaj sidiĝis.

Sur la plej proksima tableto estas unu el la libroj de li legataj. Li eksentas sin tiel agrable, kaj rigardas senzorge la fiŝojn, kie Blue loĝas. Blue estas lia beta fiŝo, blua kaj ĉarma, lia nura enhejma akompananto, kvankam Dany ankaŭ akompanas lin semajnfine.

Mura horloĝo markas la sesan, dum eta pluvsono ekplenas en la etoso.

Mario fermis siajn okulojn kaj pripensis tion, okazintan dum lia hodiaŭa prelego pri ekonomiko ĉe universitato.

Liaj studentoj diskutis profitojn kaj malprofitojn de la nuntempa socio, la piramidon de la monda riĉaĵo, la justecon de la vivo, la moralajn valorojn, la paradokson de la serĉado por memkontentigado, la mankon de la plej gravaj necesajtoj en multaj lokoj de la mondo, la malefikecon de la socio por akceli la atingon de kontenteco por ĉiuj individuoj sur la planedo.

La diskuto komenciĝs kiam Ana, studentino, prezentante sian esploron, klarigis al sia kolegaro la “Piramidon de Maslow”. Tiu piramido estas ankaŭ konata kiel “Hierarkio de la homaj necesajoj”. Per ĝi, en 1943, Abraham Maslow proponis sian “Teorio pri la homara motiveco”. Li klasifikis la necesajojn de la individuoj, kaj uzante piramidon, metis la plej gravajn en ĝian bazon kaj la malplej gravajn, supre.

Sekve, ŝi diris, ke, laŭ Maslow, oni devas unue satigi nin je la plej gravaj necesajoj, kaj poste, je tiuj pli supraj. Kiu ne havas ion por manĝi, tiu ne povas pensi pri studado aŭ ludado, ekzemple



## TEORIO PRI LA HOMARA MOTIVECO

Ana daŭre eksplikis la teorion, kaj diris, ke oni ne povas senpripense kredi la statistikojn de la bankoj. Ŝi klarigis, ke en 1970, bankoj informis, ke duono de la monda loĝantaro vivas en ekstrema malriĉeco, kaj la celo de la internaciaj bankoj kaj registaroj, precipe de Monda Banko, estas malaltigi tiun ciferon al 14.3%. Ŝi diris, ke la statistikoj montras, ke tiu celo estis atingita, kaj ke la Monda Banko klarigis, ke malriĉeco malpliĝas tutmonde.

Sed ŝi ankaŭ montris, ke bankoj preparis siajn statistikojn surbaze de ŝanĝo pri la taga monkvanto necesa por homo esti konsiderata en ekstrema malriĉeco.

Do, oni povas ne aparteni al la grupo de ekstremaj malriĉuloj nur per ŝanĝado de valoro de monsumo, kvankam tiu persono povas, fakte, esti pli malriĉa, laŭ paso de la jaroj. Ŝi ankaŭ klarigis, ke eĉ la interŝanĝa valoro de dolaro povus movi homon de unu klaso al alia. Do, ĝi ne estas reala kriterio por mezuri landan malriĉecon. Bona ekzemplo pri tio okazas tiam, kiam iu lando decidas deprecii sian valuton.

Iom poste, Ana parolis, ke por pli bone kompreni kiel la bankaj statistikoj ne estas utilaj por montri la kreskadon aŭ malkreskadon de la riĉeco, oni povas pensi, ke, por esti konsiderata en ekstrema malriĉeco, laŭ sciigoj de la Monda Banko, oni devas supervivi per po 1 dolaro tage. Ĉar tiu mezuro estis establita en 1976, ĉiujare oni devas rekalkuli ĝin. Ĉi tiuj datenoj estas de Oxfam: [www.oxfam.org](http://www.oxfam.org), Januaro 2017, Raporto: Ekonomio por la 99%. Oxfam estas neregistara organizaĵo fondita en 1995; ĝia nomo devenis el la komitato de Oxford por helpado kontraŭ la malsato, fondita en Britio, en 1942.

Do, kvankam la tipaj ŝanĝoj de la valutoj kaj aliaj aferoj povas variigi la realan kapablon de unu dolaro por akiri la necesajojn, kiujn oni bezonas. La simpla praktikado de kalkuloj por mezuri kiom da aĵoj oni povus aĉeti per unu dolaro multe helpas kompreni la realan atingon, kiun havas statistikoj faritaj de oficialaj bankoj.

Fine, ŝi proponis ĉi tion: “Bonvolu pripensi pri tio, kion ni povus aĉeti per po unu dolaro tage?”

Kaj ŝia propono startis la diskuton kolezare!

Tiam Jorge Luis stariĝis<sup>1</sup>, iris al la fenestro kaj demandis Marion: “Ĉu mi povas malfermi la fenestron?” Tutnature, Mario jesis kapmove. Li neniam malakceptus peton de sia preferata profesoro, kaj daŭre cerbumis.

Fakte, per unu dolaro ĉiutage, kion oni povus akiri? Mario memoris pri tio, kiel, la plej timida studento, surprize stariĝis kaj diris: “Ne estas juste! Por alveni universitaton mi devas pagi 14 pesojn, kaj mi opinias, ke mi estas bonŝanculo, ĉar mi scias, ke aliaj pagas ankoraŭ pli. Mia amikino Maria pagas duoblon, kaj aliaj piediras pli ol mi por atingi la diversajn transportilojn. Kiam mi revenas hejmen, mi pagas aliajn 14 pesojn, sed mia amikino Maria pagas refoje 28 pesojn. Mia

---


<sup>1</sup> Ne en la klasĉambro, sed en la apartamento de Mario.

matenmanĝo kostas 45 ĝis 60 pesojn, kondiĉe ke ĝi estu simpla. Alie, mi devus pagi plimalpli 80 pesojn.

“Plie, vespermanĝo kostas ĉirkaŭ 80 pesojn. Do, nur pensante pri du malmultekostaj ĉiutagaj manĝaĵoj, oni devas pagi minimume 125 meksikajn pesojn. Se la nuntempa kurzo inter dolaro kaj meksika peso estas unu dolaro kontraŭ 19 pesoj, oni bezonas pli ol 6 dolarojn por manĝi ĉiutage! Kaj, kio okazas kun la vivo de tiu persono? Se oni laborus, tiu persono pagus kromajn 28 pesojn ĉiutage por iri la laboron kaj hejmenreveni, kompreneble, se temas pri bonŝanculo kiel mi, kontraŭe oni pagus pli da pesoj por la transporto. Resume, oni bezonas, minimume 153 meksikajn pesojn por manĝi, ne sufiĉe, kaj veturi tien kaj reen de la laboro. Tio estas, proksimume, 8 dolaroj.”

Fine, la studento demandis: “Kaj, kiel oni lupagas loĝejon, vestaĵojn, kaj aliajn gravajn necesaĵojn?”


Ana dankis kaj gratulis sian kolegon pro lia partopreno, kaj montrante la “Piramidon de Maslow”, ŝi asertis, ke homoj prizorgantaj nur siajn problemojn rilate al la fiziologiaj kaj sekurecaj necesaĵoj vivas angore, ne revantaj pri iu ajn supra necesaĵo. Fakte, tiuj homoj priserĉas esence la bazajn manĝaĵojn, kvazaŭ bestoj. Tiel, ili estas pretmanipuleblaj, kaj sur tio kuŝas la kialo favoranta la neestingadon de la malriĉeco, ĉar la plej riĉaj volas kontroli la aliajn.




**TEORIO PRI LA HOMARA MOTIVECO**

Ŝiaj kolegoj komencis paroli ĉiuj samtempe! Mario memoris, ke li petis silenton, por ke Ana povu kontinui sian prezentadon.

Tiam ŝi vidigis alian grafikaĵon, la “Piramido de la Tutmonda Riĉeco”, kies fonto estas la “Raporto pri Tutmonda Riĉeco 2015” de la “Credit Suisse”, Svislanda Banko; publikigita en “El Pais”, hispana ĵurnalo.




Tiam, Ana diris, ke, fakte, por montri proporcie la distribuon de la tutmonda riĉeco, tiu piramido devas esti desegnata laŭ la sekva formo:



Tamen, ŝi ankoraŭ diris, ke tiu piramido ne estas tutkomprenebla. Do, eble, jene, ni povus kompreni pli, diris Ana.


1. 45.2% de la tutmonda riĉeco apartenas al 0.7% de la tutmonda loĝantaro
2. 39.4% de la tutmonda riĉeco apartenas al 7.4% de la tutmonda loĝantaro
3. 12.5% de la tutmonda riĉeco apartenas al 21% de la tutmonda loĝantaro
4. 3% de la tutmonda riĉeco apartenas al 71% de la tutmonda loĝantaro




Ŝi montris cirklan grafikaĵon. Mario memoris, ke tiam denove stariĝis tiu timida studento, kiu ekmovis sian brakon kaj diris: ‘Vidu! Kie justeco tiel?’

Ana daŭre alparolis: ‘Ni jam komencis kompreni, sed por tutkompreni oni devas pensi ne dolare sed uzante nian propran valuton. Tiel oni povas kompreni, ke persono posedanta pli ol 10,000, sed malpli ol 100,000 da dolaroj, estas homo, kiu havas dometon en urbeto kaj havas monon sufiĉe apenaŭ por aĉeti manĝaĵojn kaj aliajn bazajn necesaĵojn.

Do, 92% de la tutmonda loĝantaro estas pretmanipulebla, ĉar ili ne havas solvitaj siajn plej gravajn necesaĵojn.



7.4% de la tutmonda loĝantaro estas jam kapabla por pensi pli.



Kaj Ana daŭre provokis: ‘Laŭŝajne, 0.7% de la tutmonda loĝantaro volas, ke la distribuado de la tutmonda riĉeco sekvu tia, kia ĝi estas. Fakte, ĉiujare la malsameco kreskas kaj Oxfam publikigis, ke 82% de la riĉeco produktita en 2017 estis konsumita de la 0.7% plej riĉa parto de la loĝantaro tutmonda, kaj nur 8% de tiu riĉeco estis dividita inter la 99.3% de la tutmonda loĝantaro.

Ana finis sian prezenton dirante tion: ‘Vizitu la retpaĝon de Oxfam ([www.oxfam.org](http://www.oxfam.org)) kaj legu tie: “La pasintan jaron (2018), 26 personoj havis la saman riĉecon ol 3,800 milionoj da personoj plej malriĉaj de la mondo.” Kaj ankaŭ meditu pri tio, kion oni povas atendi, se 69 de la plej gravaj entreprenoj de la mondo estas privataj kompanioj, ne Ŝtatoj-Nacioj?

Jorge Luis demandis al Mario (ŝajne, li divenis liajn pripensojn), ĉu la mondo bezonas superan heroon por solvi tion?

Mario respondis: Jes, kiel oni povas solvi tiajn problemojn? Nur mirakle!

Jorge Luis denove demandis al Mario: ‘Ĉu vi jam komprenis, ke strikoj, trafikoj, militoj ktp, okazas en la 92 procenta parto de la tutmonda loĝantaro plej malriĉa? Do, ili damaĝas unu la alian dum la alia parto de la loĝantaro, ĉefe tiu, kiu reprezentas 0.7%, ĝuas la vivon kun multe pli da trankvilo. Neniam kaj neniel la problemoj de la 92 procenta parto povos damaĝi ilin.’



Mario, ekvidante la belegan ruĝan rozon, kiun lia amata profesoro flaras, memoris kiam li studis en la universitato, kaj lia profesoro estis konata kiel la plej bona instruisto de filozofio. Tiam, kiam oni vizitis lian oficejon, oni ĉiam povis vidi belegan ruĝan rozon ornamante lian skribo-tablon.

Profesoro Jorge Luis alproksimiĝis al Mario, donis al li la floron kaj per malrapidaj paŝoj alvenis al la sama brakseĝo, kie li estis sidanta antaŭ ol iri al la fenestro por malfermi ĝin.

Li sidiĝis kaj diris: ‘Por vi estas tre konata la helpo, kiun la spiritaj gvidantoj intencas kutime doni al la personoj sur la planedo. Vi scias, ke ĉiu persono havas plurajn spiritajn gvidantojn.’ Mario jesis kaj Profesoro Jorge Luis daŭrigis: ‘La eta 0.7 procento de la tutmonda loĝantaro, ankaŭ konata kiel 1%, povas havi tiun situacion surmonde per manipulado de la alia parto de la tutmonda loĝantaro.

‘Tiu manipulado antaŭkalkulas, diris Jorge Luis:

1. Ke la 99% de la loĝantaro havu multajn problemojn por solvi siajn kutimajn aferojn, do ili ne pripensu pri aliaj aferoj.
2. Ke ene de la 99% estu konfliktoj, ekzemple, de viroj kontraŭ virinoj, pro religiaj, landaj, rasaj, popolaj, tradiciaj, ekologiaj, sportaj, lingvaj, moralaj kaj politikaj aferoj ktp; fakte, klarigis Jorge Luis, la ideo estas, ke ene de tiu 99% de la loĝantaro estu la plej granda kvanto da eblaj konfliktoj inter ili mem, ĉar ene de tiu 1% oni tre bone konas la moton “Dividu kaj venku!”
3. Ke tiu 99% volas aĉeti pli da aĵoj, tiel ili bezonas pli da mono kaj restas okupataj. Por plistimuli tiujn dezirojn, tiu 1% ŝanĝas modajn, tendencojn, teknologiojn, kutimojn kaj kreas famulojn, stelulojn kaj idolojn, al kiuj tiu 99% deziras simili; kaj ke tiu 1% ĉion ŝanĝu periode. Ankaŭ por pligrandigi tiujn dezirojn estas la tutmonda kontrolo de la amasaj komunikiloj.
4. La kontrolo de la informo, kiun tiu 1% povas havi, precipe farante ke la 99% serĉos ĉion interrete; tiuvoje tiu 1% povas ŝanĝi tre facile la disponeblan informon laŭplaĉe. Ankaŭ por fari tion, tiu 1% instigas tiun 99% ne uzi fizikajn stokejojn da informo, tiel nur la interreta informo povas esti atingebla.

5. Krei informajn tendencojn, kiuj konfuzas la tutmondan loĝantaron, tiel neniu trovos la realajn kaŭzojn de la tutmonda nuna situacio.
6. Ke tiu 99% pensu, ke estas nenio por fari, ĉar la problemoj estas tro grandaj kaj nesolveblaj.
7. Ke tiu 99% kreu, ke ili mem estas malsukcesaj. Tiel ili sentas sin malbone. Ke tiu ĉi sento igu ilin kredi je tio, ke ili mem estas malkapablaj ion solvi. Do ili paraliziĝos kaj tiu 1% neniam havos problemojn por kontroli la alian 99 procentan parton.
8. Farante:
  - ke tiu 99% sentu sin kiel malsukcesulojn
  - ke ili havu multajn problemojn, kaj
  - ke ili kutime afliktiĝu,

la 1% parto faras:

- ke tiu 99% perdu sian komunikadon kun ties spiritaj gvidantoj,
- ke tiu 99% malsanu kaj
- ke tiu 99% malesperu.

Tiel mortokvanto kaj sinmortigokvanto kresku, kaj tiam la sufereco ankaŭ kresku.

9. Atingante tion, ke tiu 99% perdu sian komunikadon kun ties spiritaj gvidantoj, tiu 1% jam povas esti trankvila, ĉar la 99 procento ne trovos la vojon por memkontroli sin.

Mario estis tre surprizita.

Li ĉiam admiris sian profesoron, kaj nun li pensis, ke li estas pli mirinda ol li komprenis antaŭe, kaj Mario demandis lin:

Kion ni povas fari?

kiu povas ŝanĝi tiun situacion?

Jorge Luis respondis:

Vi povas ŝanĝi tion!

Vi estas la supera heroo, kiun la mondo bezonas!

Mario malfermegis siajn okulojn, demandante:

Ĉu mi?

Kaj Jorge Luis, jesante, asertis:

Jes! Vi estas la supera heroo, kiun la mondo bezonas!

Fakte, iu ajn persono, kiu estas ene de tiu 99%-a parto estas la supera heroo bezonata de la mondo!

Mario ridetante pensis malicete: Li priŝercas min!

Kaj lia profesoro, kvazaŭ li povus aŭskulti liajn pensojn, respondis serioze: Mi ne ŝercas vin. Estas kelkaj agoj, kiujn povas esti farataj por ŝanĝi la nuntempan situacion de la planedo kaj liberigi la 99 procenton. Ili redonos al la homaro la komunikadon kun siaj spiritaj gvidantoj kaj tiel la 99% forlasos la suferadon kaj trovos la vojon de sia evoluo. Kaj tiuj agoj estas de ĉiu el la 99% fareblaj.

Mario petis klarigon: Bonvolu doni ekzemplojn pri kelkaj el tiuj agoj?

Jorge Luis provis stariĝi sed sensukcese. Do, li sidiĝis denove kaj movetis la brakseĝon antaŭ ol diri:

Jen kelkaj el ili:

1. Akcepti tion, ke ĉiuj estas fratoj, filoj de unu sola Dio, egalaj kaj kun la samaj respondecoj kaj rajtoj. Do, eviti agojn kaj konfliktojn, kiuj povas dividi vin; kontraŭe, preferi agojn, kiuj fortigos la homaran kuniĝon, la solidarecon kaj la fratecon.
2. Intenci aĉeti nur bezonatajn aĵojn kaj akiri spiritajn kaj moralajn valorojn anstataŭ aĉeti kaj akumuli senutilajn aĵojn. Tio ne signifas, ke oni ne povas vivi komforte. Esence, ĝi signifas, ke oni ne plu povas esti manipolata de la amasaj komunikiloj.
3. Konservu fizikajn librojn kaj analizi la elektronikan informon.
4. Aĉeti samloke per fizika mono kaj ankaŭ preferi personajn agadojn ol elektronikaj movadoj, tiel ke Interreto ne havigu tiom da informoj. Ekzemple, uzi tradiciajn transportilojn anstataŭ Uber aŭ Didi.
5. Produkti samloke viajn proprajn manĝaĵojn.
6. Resti trankvilaj kaj fidemaj.

Tiel sufiĉos, diris Jorge Luis.

Mario estis dironta ion, sed lia telefono sonis. Estas Dany, kiu vokis lin preni ŝin.

Mario lasis la telefonon kaj turnis sian kapon por atenti al Jorge Luis...

Li jam ne estis tie!

La brakseĝo estas ankoraŭ sur ĝia nova pozicio!

Mario memoris, ke la pordo ne povas esti malfermata sen la ŝlosilo... kaj ĝi estas en lia poŝo, li pensis tion, kiam li ektuŝis ĝin!

Li rememoris, ke li mem estis en la funebraĵoj de Jorge Luis kelkajn jarojn antaŭe!

Li turnis sian kapon por vidi la fenestron kaj ĝi estis malfermita!

Mario sidiĝis...

*kaj tiam li vidis la belegan ruĝan rozon!*





**Helpo al proksimulo estas via plej bona investo.**

**Valorigu la aliajn, por ke la aliaj vin valorigu.**



## TUTAMERIKAJ LANDOJ

José Luis Montes de Oca – *Kubo*



Kuniĝu ni, ankaŭ en la kultura riĉeco!

La popola kulturo ne estas propraĵo sole de iu lando aŭ nacio. Tiu ĉi arta esprimo apartenas al la homaro, ĉar ĝi estas kiel ponto de solidareco, frateco, paco, kompreno kaj amo inter la diversaj landoj de nia terglobo.

Tiu spirito gvidas la dezirojn de la homoj, kaj pro ĝia graveco devas esti inkluzivigata en la sindeviga agendo de ĉiuj landaj registaroj, kiuj devas konsideri, taskigi en la ĉiutaga vivlaboro la temojn rilatajn al kultura diverseco, respekto al ĉiuj nacioj, kulturaj inklinoj, rasoj, religioj ktp. Tio ĉi devas esti programo en la Kariba kaj Latinoamerika regado, ĉar ni estas multgentaj socioj. Tial, la aprobo de tiuj valoroj estus grava kontribuo al la kultura havaĵo de la homaro.



Devas esti kreita spaco, kiu stimulos aŭ favorigos la kulturen interŝanĝon de la popoloj, kio, samtempe, bonŝancigas la kulturen dialogon en nia regiono.

La politika integro de Ameriko ne funkcios sen la kultura integro, sen la frata kulturinterŝanĝo.



Kultura evento en Kubo

Se oni rigardas la *ĉiujaran kariban festivalon, okazigatan* en la Kuba orienta urbo, Santiago de Cuba, kie multaj landoj de nia regiono partoprenas pere de prelegoj, dialogoj, dancoj, ekspozicioj, tradiciaj muzikoj, kina prezentado ktp, ĉiuj landoj diskonigas siajn kulturojn. Ĝi estas efektiva rimedo por lerni unuj el aliaj. Tio montras, ke nia revo povas esti plenumata.





egfmc




Se oni komprenas, antaŭvidas la kulturalan procezon kiel ilaron por la plena dignigo de la homo, tio postulas de ni fortigi laboradon krei kulturalan industrion. Ties diskonigon, Kubo jam entreprenas pere de Kariba Festivalo, Arta Kariba Festivalo (CARIFESTAS), Kariba Kina Festivalo, Festivalo de Kulturo en Latinameriko, Festivalo pri Malriĉa Kino ktp.



En ŝtataj organizoj, ne registaraj asocioj povas kunlabori al tiu ĉi celo. Esperanto estas la plej taŭga, pro sia kultura sento, internaciismo kaj paca agado.

Kiel diris nia kuba apostolo, José Martín: “Estas jam la ĝusta horo por la kunmarŝado, kaj oni devas piediri streĉe kiel estas la arĝento en la radikoj de la andaj montaroj.”

Do, marŝu ni kune!



La detalo de nia jarlibro: Almanako Lorenz

[joselmontes47@nauta.cu](mailto:joselmontes47@nauta.cu)



Vivu Esperanto, sed antaŭ ĉio vivu la celo  
kaj la interna ideo de la esperantismo, vivu  
la frateco de la popoloj, vivu, kresku kaj  
floru la verda standardo!

L. L. Zamenhof

## STELETO

Dank' al Dio.

Estis belega sunsubiro. Kaj sur la plej lumaj sunradioj, kiuj disŝutiĝis sur la Tero, bela kaj sentema por iliaj varmetaj karesoj, rajdis pluraj estuloj, laborantaj, transportantaj tien kaj reen energiajn amasojn el la suno, por provizi kaj purigi la Teron per la necesaj kaj el la venenaj, per la balzamaj kaj el la ekscitaj fluidaĵoj, kiuj portas al la vivo la apogon kaj la ruiniĝon, la ekvilibron kaj la abismon.

Rajdante sur tiuj lumradioj, inter estuloj senĉese laborantaj, estis Steleto, infaneto kiu, kune kun spertaj laboristoj, portadis plurajn sitelojn, jen portante ĉi tien lumajn energiojn, jen portante reen pezajn gangojn. Ridetante, ĉar ŝi, je la unua fojo, rajtis labori tie, Steleto portis kaj reportis malgrandajn sitelojn, laŭ sia forto. Ŝi laboradis kaj ŝvitadis, laciĝis kaj paŝadis, iradis tien kaj reen ĉe senĉesa laboro por ŝargi kaj malŝargi.

Kiam ŝi revenis al la lumoastro, aliaj etulinoj ofte venis paroli kun ŝi. Ili tute ne komprenis kiel Steleto povis porti, flanke de plenkreskuloj, tiujn pezajn sitelojn.

— Venu kun ni; ĉesu fari tian stultaĵon! Vidu, kion vi faras. Via siteleto estas nesufiĉe granda, kaj tio, kion vi faras, tute ne kontribuas al la laboro. Nur unu vojaĝo, kiun vi faras dum la tuta tago, ne sufiĉas por plenigi eĉ unu sitelon de la plenkreskuloj. Ne plu volu fari, kion vi ankoraŭ ne povas, kaj ĉesu paradi

Ofendiĝinte pro tia humiligo, Steleto sentis sian malvigliĝon. Ŝi ankoraŭ ne sciis kontraŭstari premojn de la klaĉado kaj de la mallaboremo, kaj, sentante la forton de la rutina envio, ŝi laciĝis kaj sidiĝis. Ŝi restis en plena stato de indiferenteco, anhelante, kun siaj siteletoj plenaj de lumo, pli pezaj pro la aldono

de la malbonaj ideoj. Ĉiuj plenaĝuloj, kiuj preterpasis ŝin, ŝin rimarkis kaj tediĝis, vidante tiun infanon sur la vojo al la laboro.

Jen unu el tiuj plenaĝuloj, kies nomo estis Maternal (Patrineca), pacienca matrono, jam de pluraj jarcenton ĉe la laboro de ŝarĝo, haltis kaj rimarkis la plorantan knabinon.

— Kial vi restas survoje, infano? Kial vi provas labori, se tio malfeliĉigas vin? Pli bone estus, se vi ludus kun la aliaj infanoj. Diru al mi, via Maternal, kio okazas. Kio malĝojigas vin, se, en la komenco de la labortago, vi kantetis, ĝojigante nin ĉiujn!

Kuntirante la lipojn, Steleto ekploris kaj, alpremiĝante al ŝia patrineca brusto, Steleto ekserĉis konsolon kaj respondis:

— Mi volis labori, kiel la plenaĝuloj. Mi scias, kiel grava estas al tiuj, kiuj vivas en la blua planedo, ia laboro de ŝarĝo kaj malŝarĝo. Mi vidas kiom multe da lumradiaj energioj ni portas el la suno, kaj kiom multe da malpuraĵoj ni reportas por bruligi. Sed mia koro estas premegita, ĉar mi ne sukcesas fari tion saman, kion vi faras. Mia sitelo estas tiel malgranda, ke en ĝi preskaŭ estas neentenebla eĉ ia lumeto. Mia opinio, pli bone estus, se mi restus kun la aliaj infanoj. Sed, se mi restos tie, mi ne sukcesos amuziĝi. Kion mi povas fari, Maternal? Mi ankoraŭ estas tre malgranda por fari ion ajn.

Viŝante larmoguton, kiu obstine provis fali, Maternal ankoraŭ pli forte brakumis Steleton, ŝin kareseme kisante.

— Amata mia, ne rigardu vin senutila. Ni ĉiuj povas fari ion sur la laborkampo de Dio. Ni mem, kiujn vi rigardas kiel fortulojn, nenion faras se oni komparas nin kun aliaj laboristoj de la Sinjoro. Ni estas nur sableroj en la labormaro, kaj tio, kion ni faras, kontribuas al la tutajto, al la ekvilibro de la Universo. Ni faru ion, por ke via eta koro ne plu estu premata. Venu kun mi kaj prenu tiun verdan farbon.

Obeema, Steleto prenas malgrandan flakonon kun verda farbo kaj sekvas Maternal-on, scivola pri tio, kion ŝi montros.

Ili ambaŭ revenis al la suno kaj Maternal ordonis, ke ŝi plenigu sian sitelon per suna lumo. Miksiĝinte kun la farbo, tiu guteto da lumo troviĝanta en la sitelo

prenis al si brilverdan koloron. Tiamaniere ĝi distingiĝis de la ceteraj lumenergioj kaj ĝia transportado facile distingiĝis de ĉiuj aliaj.

— Iru nun, filino mia, kaj plenumu plu vian laboron.

Nenion plu ŝi diris.

Dezirante pliajn klarigojn, sed tamen tro modesta por fari demandon, Steleto daŭrigas sian ŝarĝlaboron, iom disreviĝinta, ĉe la laboro, kiu komence tiel multe ŝin feliĉigadis.

Ŝi alvenis al la Tero, forlasis sian verdaĵon kaj revenis al la suno kun egala ŝarĝo da senvaloraĵoj. Ŝi plurfoje venis kaj revenis kun novaj komunaj ŝarĝoj. Kaj la tago forpasis, kaj venis la bonfara nokto sur la Tero.

Konfuzita, komprenante nenion ajn, ŝi atendis la revenon de Maternal, kiu estis tre okupita kaj ne povis veni helpe al ŝi.

Post mallonga atendado, Maternal alvenas ridetante, kaj petis ŝian manon.

— Venu, infano. Vidu, kion vi faris. Ni iru al la Tero.

— Onklineto Maternal, nun sur la Tero jam estas nokto. Nenion ni povas fari tie.

— Hodiaŭ ni iros tien, por ke vi lernu. La plej bona laboro en la Universo estas la akiro de scio. Dio tre amas vin, kaj tute ne malpermesus al vi tian okazon.

Revenante al la Tero, la du laboristinoj serĉis tiun sunan verdetan lumstrion. Ili ektrovis ĝin en la sino de la tero, lulanta kaj fortikiganta la malfacilegan, simplan kaj kaŝitan laboron de iu semo.

— Vidu, infano, kiom multon vi faris! Per via laboro vi nutris etan tritiksemon: komenco de bela, estonta trigoplantejo, genezo de la faruno konsistigonta la panon, kiu estingos la malsaton de multegaj estuloj. Ne opiniu vin senutila laŭ la kvanto de viaj klopodoj. Kelkajn fojojn ĉi tiu eta porcio, kiun vi hodiaŭ fordonas povas esti la ŝlosilo de nobla pordego, tra kiu eniros kamionoj da lumo por la blua Tero.

Kaj, kun signifa brilo en la okuloj, Steleto komprenis, laŭ sia infana kapablo, la valoron de sia ofico. Mano en mano kun Maternal, ŝi rigardas supren kaj kareseme diras:

— Dankon, Maternal; vi diris al mi, ke mi povas daŭrigi mian laboron. Do, mi povas fari kion mi pli multe volas, kaj mi do amuziĝos.

— Ĝuste tiel, infano! Faru kion vi volas kaj vidu vian laboron perdiĝi en la vastaĵo de la Universo. Ni estas tre malgrandaj, sed ĉi tiuj lumogutoj ege feliĉigas tiujn, kiuj ege sopiras pacon, kiuj estas perditaj en de la dezerto de malamo, de orgojlo aŭ de maldanko. Ni helpis la Teron kreski kaj vi partoprenas en la laboro de Dio. Estu feliĉa. Nun ni revenu al la Suno, ripozu kaj multe laboru. Venu kun mi.

La tempo pasas kaj la laboro daŭras plu tute sama. Steleto estas pli kaj pli feliĉa, kune kun Maternal, portante sian siteleton kun lumo kaj reportante sian porcion da rubaĵo el la Tero.

Kaj tiu verdeta radieto fortikigis la semon, kiu fariĝis tritikplantejo, kiu fariĝis pano, kiu siavice nutris tiel multe da homoj.

Sed io stranga okazis...

Kaj la surteraj sciencistoj nomadis tion spontana genetika mutacio. Temis pri ia nova speco de tritikosemo, pli rezista al malsanoj, pli produktema, kaj kiu estis multe pli profita ol la aliaj specoj, laŭ la grandeco de la kultivebla tereno. Kaj ankoraŭ estis plia interesa kaj kurioza faktoro: tiu nova "raso" de tritiko prezentis, en sia jam maturiĝinta frukto, ian misteran verdetan nuancon.

Dank' al Dio.

Spirito: Antônio Francisco

Mediumo: Manuel Francisco

El la portugala lingvo tradukis esperanten, Benedicto Silva

Kunlaboris: João Ângelo



i povos fari plimulte favore al la homaro,  
se vi tion decidis.

Etendu la manon al falinta persono,  
diru ĝentilan vorton al alia; ridetu al soleca  
persono, elmontrante fratecon; donacu floron  
al amiko; ĝojigu tristulon, kareseme brakumu  
malfeliĉulon...

Tiuj estas amaj moneroj, kiuj valoras pli ol  
bankaj trezoroj, kiam bonkore adresitaj en taŭga  
momento.

Neniu rifuzas amikon, nek malestimas helpan  
geston.

Disputu la honoron esti konstruanto de pli  
bona mondo kaj de pli feliĉa socio.

Spirito: Joanna de Ângelis  
Mediumo: Divaldo Pereira Franco

# ALMANAKO LORENZ

**Estas unika en la esperantismo**

Ĝi pritaktas ĉiujn temojn, kiuj interesas la modernan homon laŭ la spirita vidpunkto, kaj ĝi ampleksas vastan kampon de la filozofio, de la scienco kaj de la religio.

**Filozofio**

**Scienco**

**Informoj**

**Transmondo**

**Religio**

**Generalajō**

**Cismondo**

